

Nova Esperanto-Biblioteko

No. 9

Gotth. Ephr. Lessing
Natan la Saĝulo


Drameca Poemo



Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel

G.m.b.H.

Berlin & Dresden



Nova Esperanto-Biblioteko

No. 9

GOTTHOLD EPHRAIM LESSING
NATAN LA SAĜULO

Drameca poemo en kvin aktoj

Introite, nam et heic Dii sunt!
Apud Gellium

Tradukita el la Germana lingvo
de
Karl Minor, L. K.



1923

ESPERANTO-VERLAG ELLERSIEK & BOREL G.M.B.H.
BERLIN KAJ DRESDEN



Esp.

821.112R-2=922

Alle Rechte an der Übersetzung vorbehalten.
Ĉiuj rajtoj rilate al la traduko estas rezervitaj.
Copyright 1923 by Ellersiek & Borel G. m. b. H.,
Berlin.

Antaŭparolo

Tradukante klasikan dramon aŭ dramecan poemon, kia estas „Nathan der Weise“, oni povas procedi laŭ diversaj manieroj, kiuj dependas de la vidpunkto, de kiu oni rigardas la verkon.

Paul Bennemann en la Antaŭparolo al sia „Gyges kaj lia Ringo“ tre detale parolas pri tio. Mi ĉi tie defendos mian opinion nur, kie ĝi devias de tiu de s-ro Bennemann kaj aliaj.

Se oni tradukas en alian lingvon poeziaĵon de 30 versoj (linioj), ankaŭ la traduko nepre estu 30 linia. Se oni tradukus Esperanten triaktan operon, ankaŭ la Esperanta traduko devus havi la saman nombron da versoj, ja eĉ da silaboj. Kial do oni rajtus traduki en 2528 versojn tekston, kiu estas nur 2076-versa („Ifigenio“)? Mi al mi rifuzis ĉi tiun rajton, malgraŭ la modelo de nia Majstro mem. Mia „Natan la Saĝulo“ havas eĉ ne unu verson plian, ol „Nathan der Weise“.

Kompreneble ĉi tio postulas kroman devion de la opinioj de aliaj tradukintoj: s-ano Bennemann diras, „ke la pensoj de l' verkisto estu nepre precize reproduktataj“. Ĉi tiuj pensoj — rilate al „Nathan der Weise“ almenaŭ — estas engrupigeblaj en tri grupojn:

- 1) banalaĵoj,
- 2) veraj ideoj klaraj,
- 3) pensoj nekompreneblaj;

ĉar ekzemple la ekzakta traduko de

Und wie die Spangen, wie die Ohrgehenke,
Wie Ring und Kette dir gefallen werden,
Die in Damaskus ich dir ausgesucht

estus pli mallonga, ol la Germana teksto, mi estigis la bukojn „oraj bukoj“; kaj ĉar ekzemple

Laß meiner Geckerei
 Mich doch nur auch erwähnen! — Was? es wäre
 Nicht Geckerei, an solchen Geckereien
 Die gute Seite dennoch auszuspiiren,
 Um Anteil, dieser guten Seite wegen,
 An dieser Geckerei zu nehmen? He?
 Das nicht?

estas je unu verso pli longa, ol estus la laŭvorta traduko, mi eĉ aldonis tutan version:

Ĉu eble tion vi aprobi povas?

Aŭ tria ekzemplo: En la tria sceno de la kvina akto Sittah tute koncize, kvazaŭ interjekcie, esprimas sian kompaton al Recha, kaj Lessing skribis:

SITTAH

Gutes Kind!

Ĉu mi do malutilas al la verko, ne tradukante „infano bona“, sed skribante:

SITTAH (*kompate*)

Recha!

ĉar la ritmo tion postulas? —

Alie estas rilate al veraj ideoj klaraj, kiajn multnombre enhavas „Nathan der Weise“. Tiuj estas nepre laŭsence reproduktitaj!

Arbitreco, aplikita de Dro Zamenhof kaj aliaj tradukintoj, ankaŭ estas, ke ili ofte, eĉ tre ofte metis „kiel“, „kiam“, „tion“, „lia“ ktp. tiamaniere, ke la akcento kuŝas sur la lasta silabo, kaj ke laŭritme oni devus paroli „tiél“, „kiám“, „tión“, „liá“ ktp. Mi nepre evitis tion, kaj nur unu verso en „Natan la Saĝulo“ estas nekorekta laŭ la ritmo:

La siaj. — Jes, vizaĝ' kontraŭ vizaĝo . . . (1/2),

sed mi povas senkulpiĝi min, dirante, ke ankaŭ Lessing ne ĉiam sukcesis neriproĉeble estri la ritmon: la plej malbona verso en „Nathan der Weise“ estas

Von diesem heiligen Berg aller Berge.

Rilate al kunmetitaĵoj de „i“ kun alia vokalo mi faru alian rimarkigon: Certe nia Majstro ne intencis, ke ekzemple „piedo“ estu dusilaba vorto. Sed en la praktiko ankaŭ ne estas eble aserti, ke „piedo“ estas nepre trisilabe prononcata. Laŭ mia opinio „piedo“ estas, en poezio, samrajte dusilabe aplikebla kiel trisilabe. Mi do kelkfoje metis „piedo“ tiel, ke ĝi estu elparolata dusilabe, „fianĉino“ — trisilabe, „konscienco“ — trisilabe, ktp.

La malmultaj versoj 4- kaj 6-piedaj de mia traduko ankaŭ estas 4- resp. 6-piedaj en la originalo.

Al la malmultaj novaj vortoj, kiujn mi uzis, mi aldonis eksplikantan „piednoticon“ kaj dufoje mi ankaŭ uzis la sufikson „-enda“:

Kaj se ĝi mankas, ĝi havenda ŝajnas. (II/1)

Ho, honorinda patro, kio estus

Farenda nun?

(IV/2)

ĉar mi opinias, ke ĉi tiu sufikso, kvankam ĝi ĝis nun ne estas jam aprobita, (sed eĉ multe kaj forte kontraŭbatalata,) plie kaj plie enradikiĝos en nian lingvon.

Kvankam do „Natan la Saĝulo“ estas traduko, mi verkis ĝin kun la celo, ke la leganto havu la impreson, legi *Esperantan* poeziecan verkon, kaj oni legu ĝin, konsiderante ĝin unue kiel Esperantan poemon kaj nur duavice kiel tradukitan el alia lingvo klasikan dramon.

Hamburg, la 29an de Septembro 1921.

Karl Minor

Gotthold Ephraim Lessing

(* 22. 1. 1729 en Camenz [Saksujo]; † 15. 2. 1781 en Braunschweig)

havas pleje grandan gravecon por la Germana alta dramo pro tio, ke li verkis la unuan grandan Germanan dramon kun kvinpiedaj jamboj, nome

Natan la Saĝulo.

Lessing per tio sekvis la modelon de la Angloj, precipe de Shakespeare, kiu — en ĉiuj altstilaj dramoj — reliefigis la efikajn partojn de la dialogo per la kvinpieda jamba ritmo.

La Angloj nomas „blank verse“ ĉi tiun senriman, kvinpiedan, jamban verson, kaj tiu nomo ankaŭ enkondukiĝis en aliajn lingvojn, tiel ke same en Esperanto ni povas nomi ĝin *blankverso*.

Ĝia karakteriza eco — krom la ĉi supre menciitaj: esti kvinpieda, jamba, senrima — estas, ke ĝi havas nefiksitan cezuron, per kiu ĝi ricevas la egan viglecon, kiu estigas ĝin tiel taŭga por ampleksa poeziaĵo.

Lessing ŝategis speciale fortan (nefiksan) cezuron kaj ĉiam atentigis pri ĝi per plej kuraĝaj verskunigoj. —

Kompreneble — kiel karakteriza eco de la Lessing-a dramo — ĉi tiu verkmaniero estas respektita kaj respegulita en la jena traduko „Natan la Saĝulo“.

En temp' nememorebla viro vivis
 En oriento; || ringon altvaloran
 De mano kara li posedis. || — Ŝtono,
 Opal', enestis centkolora, || kiu
 Sekretan forton havis: || ĝi estigis
 Agrabla antaŭ Di' kaj homoj || la
 Kun fido ĝin portantan. || — Ne mirinde...

Ci tiuj vortoj de Natan montras, kiel — per transtiro de frazo el unu verso en alian — la versoj estas interligataj. Ekz. la frazpartoj *kiu sekretan forton havis* kaj *ĝi estigis agrabla* estis nepre ne disigeblaj en la parolado, kaj tie la cezuro estas pli forta ol la versfino.

Per ĉi tiu verkmaniero la poeto ja entute — teorie! — konservas la kvinpiedan ritmon kaj tamen — praktike! — evitas monotonecon, ĉar la aktoro parolas sendevige, nature:

En temp' nememorebla viro vivis en oriento;
 ringon altvaloran de mano kara li posedis. —
 Ŝtono, opal', enestis centkolora,
 kiu sekretan forton havis:
 ĝi estigis agrabla antaŭ Di' kaj homoj
 la kun fido ĝin portantan...

Jen la granda graveco de la blankverso; jen la granda merito de Lessing, kiu enkondukis ĉi tiun verson en la Germana dramo; jen la granda valoro de la verko „Natan la Saĝulo“, la unua tiuspeca verko en la Germana literaturo!

Karl Minor

PERSONOJ

Sultano Saladin

Sittah, ties fratino

Natan, riĉa judo en Jeruzalem

Recha*), ties adoptita filino

Daja, kristanino, sed en la domo de Natan kiel virino
por kompanio de Recha

Juna Templano

Derviŝo

La Patriarko de Jeruzalem

Monaĥejo

Emiro kaj diversaj mamelukoj de Saladin

La sceno okazas en Jeruzalem

*) „Recha“ prononcu proksimume „Reja“.

AKTO UNUA

1a SCENO

Ejo: Koridoro en la domo de Natan.

NATAN, revenanta de vojaĝo; DAJA renkonte al li.

DAJA

Jen li! Ho, Natan! Dankon al Kardio,
Ke fine, tamen, vi nun ja revenas.

NATAN

Jes, dankon al Kardi'! Sed kial „fine“?
Ĉu ja pli frue mi reveni volis?
Reveni povis? Babilono estas
Je ducent mejloj de Jeruzalem,
Se oni devas — kiel mi ja devis —
Jen dekstren, jen maldekstren devojiĝi.
Kaj enkasigi ŝuldojn ankaŭ estas
Afer' ne rapideca.

DAJA

Natan, ho!

Dumtempe mizerego vin ektrafis
Ĉi tie! Ĉar la domo via . . .

NATAN

Brulis.

Mi tion jam ekaŭdis. Volu Dio,
Ke baldaŭ mi la tuton jam elsciui!

DAJA

Ĝi preskaŭ ĝis la fundament' forbrulis.

NATAN

Ne grave, Daja; estus ni farantaj
Eĉ pli komfortan kaj pli novan.

DAJA

Tamen!

Sed preskaŭ krome ankaŭ Recha estus
Brulinta.

NATAN

Mortbrulinta? Recha? Ŝi?

Mi tion ne jam sciis! — Tiukaze
Mi ne bezonus domon plu! — Ŝi preskaŭ
Mortbrulis? — Sed ĉu vere „preskaŭ“ nur?
Aŭ ĉu ŝi fakte mortis? — Diru do!
Parolu! — Min mortigu! Sed ne min
Turmentu plu! — Ho, jes, ŝi mortis!

DAJA

Ĉu vi

De mi ĝin aŭdus, se ĝi fakte estus?

NATAN

Do kial vi timigas min? — Ho, Recha,
Ho Recha mia!

DAJA

Via? Via Recha?

NATAN

Se iam ree devus mi rezigni
Pri nomi ŝin la mia . . . !

DAJA

Ĉu vi ĉion,

Pri kio vi disponas, nomas via
Kun sama rajt'?

NATAN

Nenion kun pli granda!

La tutan havon mian al mi donis
Naturo kaj bonŝanc'; sed ŝin mi dankas
Al virto!

DAJA

Natan, kiom do karege
Mi devas al vi pagi vian bonon!
Se bono povas plu sin nomi bono,
Se ĉi-intence . . .

NATAN

Kia do intenco?

Do kia?

DAJA

Mia konscienco . . .

NATAN

Daja,

Unue lasu min rakonti, . . .

DAJA

Mia

La konscienc', mi diras . . .

NATAN

. . . kian ŝtofon

En Babilono mi por vi aĉetis,
Belegan, gustoriĉan! Mi alportis
Apenaŭ eĉ pli bonan ja por Recha.

DAJA

Ne helpas! Konsciencon mian mi ne
Pli longatempe povas nun mutigi.

NATAN

Mi volus vidi, kiel al vi plaĉos
La oraj bukoj, la orel-pendaĵoj,
La ringoj, la ĉenetoj, kiujn mi en

Damasko plej zorgeme mem elektis
Por vin ĝojigi.

DAJA

Tia vi ja estas!

Se vi donaci nur, donaci povas!

NATAN

Akceptu same ĝoje — kaj silentu!

DAJA

„Silentu“! — Kiu dubas, ke vi estas

La honesteco kaj bonfaro mem?

Kaj tamen . . .

NATAN

Tamen mi nur estas judo!

Jen via penso!

DAJA

Mian penson vi ja

Pli bone scias.

NATAN

Do silentu!

DAJA

Bone!

Por punindaĵ', ĉi tie okazanta,

Kaj kiun mi ne povas aliigi

Kaj ne malhelpi, vi respondu!

NATAN

Estu!

Sed kie nun ŝi estas, restas? — Daja,

Se vi min trompis! — Ĉu do Recha scias,

Ke mi alvenis?

DAJA

Tion mi demandas!

Ankoraŭ tremas ĉiu ĝia nervo,

Kaj ĝia fantazio pentras fajron

Al ĉiu pens'. En dormo ŝi maldormas,
Kaj en maldorm' spirito ŝia viglas:
Jen eĉ ne besto, jen pli ol anĝelo!

NATAN

Ho, kompatinda! Kio estas homo!

DAJA

Longtempe, kun okul' fermita, kuŝis
Ŝi ĉi-matene, kvazaŭ morta. Eke
Ŝi kriis: „Jen de l' patro la kameloj!
Aŭskultu! Jen eĉ kara voĉo lia!“
Kaj ree obtuziĝis ŝia vido.
La kapo, senigita de apogo,
Sur la kusenon falis. — Mi elkuris!
Kaj jen! vi fakte venis, fakte venis!
Ne estas strange! La animo ŝia
Ja estis nur ĉe vi — kaj li.

NATAN

Ĉe li?

Ĉe kia „li“?

DAJA

Li, kiu el la fajro

Ŝin savis.

NATAN

Kiu estis? Kiu? Kie?

Ho, kiu savis mian Recha'n? Kiu?

DAJA

Templano juna estas; venigita
Kaptito tien ĉi malmultajn tagojn
Antaŭe. — Saladin lin amnestiis.

NATAN

Templano, kiun la sultano lasis
Vivanta? Per miraklo malpli granda
Ne estis ŝi savebla? Dio!

DAJA

Se

Ne estus li riskinta l' vivon propran,
 Ŝi estus sian per la fajr' perdinta.

NATAN

Do kie, Daja, estas la noblulo?
 Ho kie? Gvidu min al liaj piedoj.
 Vi espereble al li donis ĉiujn
 Trezorojn, kiujn mi postlasis? Ĉiujn!
 Promesis kromajn?

DAJA

Ne! Ni ja ne povis.

NATAN

Ne?

DAJA

Venis li: de kie ni ne scias.
 Foriris li: kaj ni ne scias, kien.
 Sen scio pri la dom', nur direktate
 De l' aŭdo; kun mantelo disiĝanta
 Tra flam' kaj fum' li saltis al la voĉo,
 Vokanta nin por helpo. Jam ni kredis
 Lin pereinta, sed el flam' kaj fumo
 Subite li alpaŝis nin, portante
 Ŝin sur la fortaj brakoj. Ne tuŝate
 De la ĝojkrioj niaj dankaj, li nun
 Demetas ŝin, ŝoviĝas inter l' homojn —
 Kaj malaperas!

NATAN

Sed vi lin revidis?

DAJA

La postajn tagojn li ja promenadis
 Sub tiuj palmoj, kiuj ombrumadas
 De la Savinto sankta la tombejon.

Mi ĝoje proksimiĝis, dankis, petis;
Proponis unufoje nur revidi
La pian kreitaĵon, kiu estas
Sen trankvilec', ĝis ke ŝi plori povis
Por danko ĉe piedoj liaj.

NATAN

Kaj?

DAJA

Sed vane! Li la petojn malatentis;
Per sarkasmaĵoj nur li min verŝumis.

NATAN

Kaj fortimigis vin . . .

DAJA

Ho ne, eĉ male!

Mi ĉiutage ree proksimiĝis
Kaj lasis min primoki ĉiutage.
Ho, kiom mi suferis! Kaj volonte
Mi estus suferinta multe pli!
Sed jam de longa temp' li ne plu venas
Viziti la tombejon de l' Savinto.
Neniu scias, kie nun li estas. —
Vi miras? Vi meditas?

NATAN

Mi pripensas

L' efikon de ĉi ĉio sur l' animon
De mia Recha. Esti forpuŝata
Kaj tamen altirata! — Kor' kaj kapo
Tutcerte disputadas, ĉu malamo
Aŭ ĉu melankolio fine venkos.
Neniu ofte venkas: Fantazio
Aliĝas kaj revulojn faras,
Ĉe kiuj jen la kapo ludas rolon

De koro, jen la kor' de l' kap' la rolon.
Malbona ŝanĝo! Se mi ne eraras,
La lasto jam okazis: Recha revas!

DAJA

Sed tiom pie, ĉarme!

NATAN

Sed ŝi revas!

DAJA

Precipe unu, nu — kapricon ŝi ja
Dorlotas: La Templano, ŝi asertas,
Ne estas hom' surtera, ne homido;
El la anĝeloj — sub, protekto, kies
De l' infaneco la koreto ŝia
Jam kredas esti — unu ekelpaŝis
En formo de Templan' el nubo sia,
Kaŝanta ĝenerale lin, ŝvebanta
Eĉ ĉirkaŭ ŝi en fajr'. Ne ridu! Lasu
Al ŝi revaĵon tiun, ridetante,
Pri kiu jud', kristan' kaj islamano
Samopinias — la revaĵon dolĉan.

NATAN

Al mi eĉ dolĉan! — Iru, Daja, vidu,
Ĉu ŝi bonfartas, min paroli povas.
Kaj poste mi elserĉos la kaprican
Protekt-anĝelon. Kaj se li bonvolas
Ankoraŭ esti inter ni surtere
Kaj montri tian strangan templecon,
Mi certe trovos lin kaj alvenigos.

DAJA

Ne tro esperu!

NATAN

Kaj se poste cedos

La dolĉa revo al pli dolĉa vero,
 Ho, tiam . . . ! Daja, kredu min: la homo
 Preferas ĉiam homon al anĝelo. —
 Vi certe ne koleros ja pri mi,
 Se prianĝela revantin' saniĝos.

DAJA

Bonulo kaj samtempe malbonulo!
 Mi iros! — Aŭdu! vidu! — Jen, ŝi mem!

2a SCENO

RECHA kaj LA ANTAŬAJ.

RECHA


Ĉu fakte estas vi, ho patro mia?
 Mi preskaŭ kredis, ke vi antaŭsendis
 La voĉon vian. — Kie do vi restis?
 Dezertoj, montoj, riveregoj kiaj
 Ankoraŭ estas inter ni? — Vi spiras
 Kun mi aeron saman kaj ne kuras
 Por ĉirkaŭpreni min, la preskaŭ mortan?
 Jes, mortbrulintan! Preskaŭ nur! Ne tremu!
 Terura morto estas, ho, mortbruli!

NATAN

Infano kompatinda!

RECHA

Kaj vi devis
 Transpaŝi da riveroj tiom: Eŭfrat
 Kaj Tigris, Jordan! — Ho, por vi mi ofte
 Tremetis, antaŭ kiam fajr' min tuŝis.
 Sed de post kiam min la fajro tuŝis,



En akvo morti al mi ŝajnas savo,
 Plezuro, refreŝiĝo. — Sed ja vi
 Ne dronis! Kaj ja mi, mi ne mortbrulis!
 Ho, kiom ĝoju ni kaj gloru Dion!
 Li portis vin kaj portis la boaton
 Sur la flugiloj de la nevideblaj
 Anĝeloj trans riverojn la perfidajn.
 Li igis la anĝelon mian porti
 Videble min tra fajro sur la blankaj
 Flugiloj siaj.

NATAN

(flanken)

Blankaj la flugiloj!

Jes, la mantelo blanka disiĝanta
 De la Templan'.

RECHA

Videble, ho videble

Min porti tra la fajro per flugiloj
 La siaj. — Jes, vizaĝ' kontraŭ vizaĝo
 Anĝelon elizean vidis mi,
 Anĝelon mian!

NATAN

Tion vi valorus;

Kaj ne plibelon vidus vi sur li,
 Ol li sur vi.

RECHA

(ridetante)

Al kiu do vi flatas?

Al la anĝelo aŭ al vi?

NATAN

Sed eĉ

Se homo nur natura, ĉiutaga
 Al vi farinta estus tiun servon:
 Por vi li devus ja anĝel' fariĝi!

RECHA

Anĝel' ne tia! Ne! Anĝelo vera;
 Li certe estis vera! — Ĉu ne vi,
 Vi mem instruis min, ke ja ekzistas
 Anĝeloj, kaj ke Dio eĉ miraklas.
 Pro l' bon' de tiuj, kiuj Dion amas?
 Mi lin ja amas!

NATAN

Kaj li amas vin.
 Por vi kaj viaspecaj li miraklas
 Ja ĉiuhore, kaj li tion faris
 Jam de eterne.

RECHA

Bone tio sonas!

NATAN

Nu, ĉar ja ŝajnus nepre triviale,
 Se vera, homa nur Templano estus
 Savinta vin: ĉu tial malpli estus
 Miraklo do? — Miraklo pleja estas,
 Ke la mirakloj vere veraj tiel
 Malstrangaj por ni povas, devas esti.
 Sen tiu ĉi miraklo ĝenerala
 La meditanta homo ja ne nomus
 Miraklo tion, kion tiel nomus
 Infanoj nur, ĉar tiuj nur rigardas
 Plejstrangon kaj plejnovon.

DAJA

(al Natan)

Ĉu vi do

Intencas diskrevigi per tielaj
 Subtilegaĵoj ŝian cerbon tro jam
 Streĉitan?

NATAN

Lasu min! — Al Recha estus

Miraklo ne sufiĉe granda, ke
 Ŝin savis homo, kiun devis savi
 Mem grandmiraklo? Jes, miraklo granda!
 Ĉar kiu aŭdis jam, ke Saladin
 Templanon indulgumis? Aŭ ke iam
 Templano jam de li esperis, petis
 Indulgon? aŭ eĉ nur al li proponis
 Por sia liberec' pli ol la zonon,
 Portantan lian feron aŭ ponardon?

RECHA

Jen, tio min pravigas! — Do pro tio
 Ne estis li Templan', nur tia ŝajnis. —
 Ĉar se Templan' kaptita ĉiam nur
 Por certa morto venas al Jeruzalem,
 Kaj se neniu en Jeruzalem
 Libera estas: kiel dum la nokto
 Min povis savi tia?

NATAN

Ho, sagace!

Parolu vi nun, Daja. Mi de vi
 Ja aŭdis, ke kaptita li alvenis.
 Sendube vi pli multe pri ĝi scias.

DAJA

Jes. — Tion oni diras; sed cetere
 La fam' asertas, ke l' sultan' indulgis
 Pro tio la Templanon, ke similas
 Li unu fraton, kiun li prefere amis.
 Sed ĉar jam antaŭ dudek jaroj mortis
 Ĉi tiu frat' — la nomon mi ne scias,
 Kaj mi ne scias, kio li fariĝis —
 Ĉi ĉio ŝajnas tute ne kredebla,
 Kaj ne verŝajna estas la afero.

NATAN

Aj, Daja, kial estas nekredebla
 La famo? Ĉu por kredi eĉ prefere
 Pli nekredeblan ion? — Tio ankaŭ
 Okazas. — Kial Saladin ne povis
 En temp' malnova speciale ami
 Ĉi tiun fraton? Li gefratojn siajn
 Ja ĉiujn tiom amas. — Ĉu ne ofte
 Similaj estas du vizaĝoj? — Ĉu
 Impres' malnova devas tut-perdiĝi? —
 Ĉu samo ne plu povas sam-efiki? —
 De kiam? — Kio estas nekredebla? —
 Mi scias, saĝa Daja, vi ne kredus
 Ĝin plu miraklo, kaj mirakloj viaj
 Bezon . . . , pardonu min, meritas fidon.

DAJA

Vi mokas!

NATAN

Ĉar vi min primokas! — Sed
 Sen tio, Recha, via savo restas
 Miraklo, ebla nur al tiu, kies
 Ludado — aŭ eĉ moko — estas, gvidi
 Decidojn plej severajn kaj projektojn
 Senbridajn de regantoj per fadenoj.

RECHA

Se mi erarus! Tion mi ne ŝatas.

NATAN

Sed vi volonte lasas vin instrui. —
 Aŭskultu: Frunto ĝuste tiuvolba;
 Aŭ naz' hazarde tia, ne alia;
 Du brovoj tiu- aŭ ĉi-tiuformaj
 Sur akra aŭ malakra ost'; linio,
 Angulo, fendo, sulko aŭ makulo,

Nenio, sur vizaĝ' de Eŭropano,
 Kaj vin ne brulas fajro en Azio!
 Ĉu tio ja ne estas jam miraklo,
 Mirakl-avidaj homoj? Kial do
 Vi speciale mendas eĉ anĝelon?

DAJA

Ĉu malutilas — Natan, min pardonu —
 Prefere tamen pensi, ke anĝelo
 Ol ke homido estas la savinto?
 Ĉu al la kaŭz' nekomprenebla de
 La savo oni pli proksima sin
 Ne kredas?

NATAN

Fiereco nur! La potu

El fero volas esti ellevata
 El ardo per pinĉil' arĝenta, por
 Al si imagi, esti mem arĝenta!
 Kaj vi demandas min, ĉu malutilas?
 Al kio helpas? mi demandi povus. —
 La „kredi sin ĉe Dio pli proksima“
 Ja estas sensencaĵo aŭ blasfemo. —
 Sed: malutilas; eksterdube malutilas! —
 Aŭskultu min. — Ĉu ne: al la estaĵo
 Savinta vin — ĉu homo, ĉu anĝelo —
 Vi ambaŭ volus, aŭ vi speciale,
 Volonte fari multajn grandajn servojn? —
 Ĉu ne? — Nu, al anĝelo, kiajn servojn
 Eĉ grandajn servojn oni povus fari?
 Al li vi povas danki, ĝemi, preĝi,
 Aŭ disfandiĝi pro pri li ekstazo;
 Aŭ fasti je la tag' de lia festo;
 Almozojn doni. — Jen nenio. — Ĉar al
 Mi ŝajnas, ke vi mem kaj l' proksimulo

Per tio gajnas multe pli ol li.
 Lin ne grasigas via fasto; lin
 Donacoj viaj ne riĉigas; kaj la
 Ekstaz' ne plialtigas lin; la fido
 Ne plifortigas lin. Ĉu jes? — Sed hom' . . .!

DAJA

Jes fakte, oni havus ja pli multajn
 Okazojn por al homo fari bonon.
 Kaj Dio scias, ke ni estis emaj!
 Sed li ja volis, eĉ bezonis ja
 Nenion tute; por si, per si tiom
 Modera estis li; anĝelo tiel
 Nur estas.

RECHA

Kiam eĉ li malaperis . . .

NATAN

Do kiel? — Malaperis? — Ĉar sub palmoj
 Li ne plu videbliĝis? — Aŭ ĉu vi
 Jam fakte kaj denove serĉis lin?

DAJA

Ne, tion ne.

NATAN

Ne, Daja? ne? — Jen vidu
 Pro kio malutilas! — Revulinoj
 Kruelaj! — Se l' anĝelo — malsaniĝis?

RECHA

Malsana, ho!

DAJA

Malsana, ho!

RECHA

Mi tremas!

Ho, Daja! — Mia frunto, ĝenerale
 Varmeta — palpu! — estas nun glacia.

NATAN

Li estas Franko, juna, ne kutimis
Al nia la klimato; ne kutimis
Al laboreg', malsat', maldorm' . . .

RECHA

Malsana!

DAJA

Ke estas eble, Natan ja nur diris.

NATAN

Nun jen li kuŝas, sen amik', sen mono,
Por pagi la amikojn.

RECHA

Patro mia!

NATAN

Sen flego, sen konsilo, sen konsolo,
Doloro lin sieĝas kaj — la morto!

RECHA

Ho, kie?

NATAN

Li sin ĵetis en la fajron
Pro ino, kiun li ne vidis, konis . . .
Li estis homo . . .

DAJA

Natan, ŝin kompatu!

NATAN

Ne volas koni, nek plu vidi la
De li savitan — por al ŝi ŝparigi
La dankon . . .

DAJA

Ŝin indulgu!

NATAN

Li ne emis

Revidi ŝin — krom se li eble devos
 Ŝin savi el danĝero duan fojon —
 Ĉar li ja estas hom' . . .

DAJA

Sufiĉe! Vidu!

NATAN

Al kiu la morthoron nur dolĉigas
 Konscio pri la far'.

DAJA

Ekfinu, Natan!

Vi ŝin mortigas!

NATAN

Kaj vi lin mortigis. —

Vi tiel povus lin mortigi. — Recha!

Vi kuracilon, ne venenon, glutas.

Li vivas, aŭdu! — estas ne malsana,

Eĉ ne!

RECHA

Ĉu ne? — Ne morta? ne malsana?

NATAN

Ne morta, certe! Di' sur ter' kompensas

La bonon tie ĉi faritan. — Ĉu vi

Komprenas, ke pli simple estas revii,

Ol bone agi? ke senforta hom'

Volonte revas, por ke li bezonu

Ne bone agi — kvankam kelkafoje

Li mem ja la intencon ne konscias —?

RECHA

Ho, patro mia! Plu neniam lasu

Min sola. — Ĉu ne vere: eble li

Nur forvojaĝis? —

NATAN

Jes, infano, certe! —

Jen, vidu, islamano ekzamenas
Avide la kamelojn ŝargûmitajn.
Ĉu vi lin konas?

DAJA

Estas la derviŝo.

NATAN

He?

DAJA

La derviŝo, via ŝakkunulo!

NATAN

Al-Hafi? Jen Al-Hafi?

DAJA

De l' sultano

Nun trezorestro.

NATAN

Ĉu vi ree revas?

Jen li! — Jes, li! — Al ni li proksimiĝas.
Eniru tuj! — Nu, kion mi ekaŭdos!

3a SCENO

NATAN kaj la DERVIŜO.

DERVIŜO

Ne tiom ege streĉu la okulojn!

NATAN

Ĉu estas vi aŭ ne? — Derviŝ' en tia
Lukseco?

DERVIŜO

Kial ne? Ĉu el derviŝ'
Nenio devas esti do farebla?

NATAN

Eĉ multe, jes! — Sed ĉiam mi ja pensis,
Derviŝ' — derviŝo vera — el si volas
Nenion lasi fari.

DERVIŜO

Je l' Profeto!

Ke mi ne estas vera, povas esti.
Se oni devas tamen . . .

NATAN

Oni devas?

Neniu devi devas! Kaj do kion
Derviŝo devus?

DERVIŜO

Kion oni petas,
Kaj kion krome li ekkonas bona.

NATAN

Je nia Di'! Vi estas prava! — Viro,
Mi ĉirkaŭprenu vin! — Ni ja amikoj
Ankoraŭ estas?

DERVIŜO

Vi eĉ ne demandas

Min, kio mi fariĝis?

NATAN

Malgraŭ tio!

DERVIŜO

Ĉu mi ne eble estas altrangulo
Vin malkonvena?

NATAN

Se nur via koro

Derviŝo restis! Ĉar la altrangulo
Nur estas via vesto . . .

DERVIŜO

... kiu volas

Ŝatata esti. — Kio do mi estas

Ĉe la korteg'? — Divenu!

NATAN

Nur derviŝo.

Sed krome? Eble — kuirist'!

DERVIŜO

Ho ne!

Ĉu por ĉe vi forgesi la metion?

Ĉu ne kelestro eĉ? — Ho, Saladin

Pli bone konas min! — Jes, trezorestro

Li faris min.

NATAN

Li? vin?

DERVIŜO

Sed sciu:

De la trezor' malgranda. — Lia patro

La grandan estras, tiun de la domo.

NATAN

Jen granda dom'!

DERVIŜO

Pli granda ol vi pensas;

Li taksas almozulon samrangulo.

NATAN

Sed almozulojn Saladin malamas ...

DERVIŜO

Ke li ekstermi ilin ĉiujn volus,

Eĉ se per tio almozul' li mem

Fariĝus.

NATAN

Prave! Tion ĵus mi pensis.

DERVIŜO

Kaj li jam estas tia! — La trezoro
 Je ĉiu sunsubiro estas pli
 Malplena ol malplena; ĉar la fluso,
 Matène alta, ĉiam jam defluis
 Tagmeze . . .

NATAN

Ĉar forglutas ĝin kanaloj
 Neplenigeblaj kaj krom tio ankaŭ
 Ja neŝtopeblaj.

DERVIŜO

Jes, vi estas prava!

NATAN

Mi tion konas.

DERVIŜO

Tamen ja ne taŭgas,
 Se princ' vulturo estas ĉe kadavroj.
 Sed se kadavr' li estas ĉe vulturoj,
 Dekoble malpli taŭgas.

NATAN (*kontraŭdire*)

Nu, derviŝo!

DERVIŜO

Facile estas babiladi! — Bone:
 Do ofru¹⁾ sumon por ofico mia!

NATAN

Nu, kiom ĝi al vi do enspezigas?

DERVIŜO

Ne multe. Sed por vi ĝi profitiĝus.
 Ĉar se malpleno estas — kiel ofte —
 Malfermu viajn kluzojn: pruntedonu
 Kaj por vi prenu kiom ajn procentojn.

¹⁾ ofri = F: offrir, A: offer, G: offerieren, anbieten.

NATAN

Procentojn por procentoj ankaŭ?

DERVIŜO

Jes!

NATAN

Ĝis mia tuta havo procentiĝis.

DERVIŜO

Ĝi vin ne logas? — Tio tuj ĉesigas
La amikecon nian. — Ĉar mi vere
Je vi esperis!

NATAN

Fakte? Kiel do?

DERVIŜO

Nu, mi esperis, ke vi helpus min,
Honore resti en ofico mia;
Ke mi ĉe vi malferman kason trovus.
Vi skuas?

NATAN

Nu, ni bone nin komprenu.

Jen estas diferenco: vi, vi trovus!
Al-Hafi, la derviŝo, ĉiel estas
Ĉe mi bonvena ĉiam. — Sed Al-Hafi,
La defterdar¹⁾ de Saladin, al tiu . . .

DERVIŜO

Mi ĝin supozis! Ĉiam estas vi
Ja same tiom bona kiom saĝa! —
Sed la du Hafi, kiujn vi menciis,
Apartigitaj baldaŭ estos. — Jen
La vesto de honor' de Saladin.
Jam antaŭ ol ĝi perdos la koloron
Kaj ĉifoniĝos, kia ĝi min decas.

¹⁾ defterdaro = arabe por „trezorestro“.

Ĝi pendos en Jeruzalem de najlo,
Kaj mi ĉe l' Ganges paŝos nudpiede
En sablo kun la instruistoj miaj.

NATAN

Vi tia estas!

DERVIŜO

Kaj ni ludos ŝakon.

NATAN

Jen via cel'!

DERVIŜO

Nu, kio min allogis?

Ĉu ne bezoni plu almozojn peti?

Ĉu ŝajni riĉegul' por almozuloj?

Ĉu povi fari el la almozulo

Plej riĉa la riĉulon plej senhavan?

NATAN

Ne tio, certe.

DERVIŜO

Io pli senbela!

Unuafoje estis mi flatata,

Flatata de l' mani' de Saladin . . .

NATAN

De kia?

DERVIŜO

Ke nur almozulo konas

De almozuloj senton; almozul'

Nur scias, kiel doni al petisto.

Li diris: „Antaŭulo via estis

Tro kruda. Nevolonte li nur donis.

Li ĉiufoje antaŭinformiĝis

Pri l' ricevonto; ne kontenta, ke

Li scias nur la mankon, li esploris

La kaŭzon de la manko, por elpesi

Ekzakte donon laŭ ĉi tiu kaŭzo.

Al-Hafi ĝin ne faros! Saladin
 Nemilde-milda ne per Hafi ŝajnos.
 Li ne similos al ŝtopitaj tuboj
 Refordonantaj ŝpruce kaj neklare
 La akvon klarkvieta ricevitan.
 Al-Hafi pensas, sentas kiel mi!“ —
 De l' birdkaptist' fajfilo ĉarme sonis,
 Ĝis la pirolo estis en la reto!
 Ho mi, vantulo de vantulo!

NATAN

Kalme¹⁾,

Derviŝo mia!

DERVIŜO

Ha! Ĉu ne vanteco,
 Centmilojn da gehomoj elpremadi,
 Turmenti kaj sufoki kaj rabumi
 Kaj voli ŝajni filantrop' al kelkaj?
 Ĉu ne vanteco estas, ne havante
 La ĉiam plenan manon de l' Plejalta,
 Imiti de l' Plejalta la mildecon,
 Pruvatan tute same al bonulo
 Kaj malbonul' kaj kampo kaj dezerto
 En sunobriilo kaj en pluvvetero?

NATAN

Sufiĉe! Finu!

DERVIŜO

Lasu min mencii
 Vantecon mian ankaŭ! — Ĉu ne estas
 Vanteco, serĉi flankon bonan, tamen,
 De tia ĉi vantec', por partopreni
 En la vantec', pro tiu bona flanko?
 Ĉu eble tion vi aprobi povas?
 Ĉu jes?

¹⁾ kalma = F: calme, A: calm, G: ruhig (innerlich).

NATAN

Rapidu, Hafi, ke vi baldaŭ
Revenu en dezerton; ĉar mi timas,
Ke ĝuste inter homoj vi mallernos
Estadi hom'.

DERVIŜO

Mi ankaŭ tion timas.

Adiaŭ!

NATAN

Tiom urĝas? Restu, Hafi.
Ĉu la dezert' forkuros? — Do atendu!
Ĉu li min aŭdas? — He! Al-Hafi, he! —
Li estas for! Kaj mi volonte volis
Demandi pri l' 'Templan'. Opinieble
Li konas lin.

4a SCENO

DAJA alrapidas. NATAN.

DAJA

Ho, Natan, Natan!

NATAN

Nu?

Do kio?

DAJA

Li revidebliĝas! Li
Revidebliĝas!

NATAN

Kiu, Daja?

DAJA

Li!

NATAN

Li? — Kiam Li ne videbliĝas? — Ha,
Nur lin vi nomas „li“. — Ne estas ĝuste.
Eĉ ne, se fakte li anĝelo estus!

DAJA

Li ree promenadas sub la palmoj,
De temp' al temp' daktilojn deŝirante.

NATAN

Manĝante? Kaj en formo de Templan'?

DAJA

Vi min turmentas! — Post la densaj palmoj
Divenis lin okul' avida ŝia
Kaj sekvas lin senĉese. Ŝi vin petas,
Petegas, senprokraste kapti lin.
Rapidu! Ŝi per signo al vi montros
Tra la fenestro, ĉu li supreniris
Aŭ flankeniĝis. Kuru!

NATAN

Tiel, kiel

Mi debestiĝis? — Ĉu do decas? — Vi
Ekiru, diri ke mi nun revenis.
La honestulo certe volis nur
Ne veni, ĉar mi ne ĉi tie estis;
Kaj li nun venos, se la patro mem
Invitas lin. — Tuj diru, ke mi lin
Tutkore petas . . .

DAJA

Vane! Ho, li ne

Akceptos. — Li — ne iras ja al judo!

NATAN

Almenaŭ iru, iru lin haltigi;
Almenaŭ akompanu lin per viaj
Okuloj. — Iru do; mi tuj vin sekvos.
(NATAN rapidas enen kaj DAJA eksteren)

5a SCENO

Ejo: Placo kun palmoj,

sub kiuj la TEMPLANO promenas; MONAĤEJANO sekvas lin malproksimete de flanke, ĉiam kvazaŭ li volus alparoli lin.

TEMPLANO

Li ne min sekvas pro enuo! — Li
Alstrabas miajn manojn! — Bona frato ...
Aŭ ĉu mi povas nomi vin eĉ patro ...?

FRATO

Nur frato ... Nur laika frat', mi petas.

TEMPLANO

Ho, kara frat', se mem mi iom havus!
Je Dio, mi neniom havas ...

FRATO

Tamen:

Koregan dankon! Di' vin rekompencu,
Ĉar vi donaci volis; nur la volo
Kaj ne la dono montras donemulon.
Cetere mi ne estas ja sendita
Pro la almozo.

TEMPLANO

Tamen do sendita?

FRATO

Jes, de la monaĥejo.

TEMPLANO

Kie mi

Pilgriman manĝon ĵus ja priesperis?

FRATO

La tabloj estis malvakantaj; tamen
Kun mi revenu via moŝto.

TEMPLANO

Kial?

De longa temp' viandon mi ne manĝis,
Sed la daktiloj estas ja maturaj.

FRATO

Al tiu frukt', sinjoro, ne tro fidu.
Ne taŭgas tro' da ĝi, ĉar la lienon
Ĝi ŝtopas kaj la sangon malgajigas.

TEMPLANO

Mi eble ŝatas, senti min malgaja. —
Sed certe ne pro tiu ĉi averto
Vi devis sekvi min.

FRATO

Ho ne! — Mi devas

Pri vi nur informiĝi kaj ekpalpi
La denton vian.

TEMPLANO

Kaj vi mem ĝin diras?

FRATO

Pro kio ne?

TEMPLANO

(Ruzeca frato!) — Ĉu

Ekzistas multaj viaspecaj fratoj?

FRATO

Ho, mi ne scias. — Mi obei devas.

TEMPLANO

Kaj vi obeas tute senripense?

FRATO

Alie ne obei estus!

TEMPLANO

(Ĉiam

Naivo estas prava!) — Sed vi certe
 Al mi konfidis, kiu deziregas
 Pli bone koni min. — Mi povus ĵuri,
 Ke ne vi mem . . .

FRATO

Ĉu tio al mi decus?

Kaj estus inda?

TEMPLANO

Do: al kiu decas,

Kaj estas inda tia scivoleco?

FRATO

Nu, al la Patriark', mi opinias. —
 Li sendas min al vi.

TEMPLANO

La Patriarko?

Ĉu li mantelon blankan, krucon ruĝan
 Ne konas?

FRATO

Mi eĉ konas ĝin!

TEMPLANO

Do: kio?

Templan' mi estas kaj militkaptita. —
 Aldonu mi: kaptita ĉe Tebnin,
 Kastelo, kiun ni volonte estus
 Prenintaj je la fin' de l' batalhalto,
 Por iri al Sidono. — Mi aldonu:
 Kaptita kun dudeko kaj nur sole
 Amnestiita de l' sultan'. — Nun scios
 La Patriarko, kion li ja celis. —
 Eĉ pli ol tion.

FRATO

Tamen pli, apenaŭ,
 Ol li jam scias. — Li volonte scius,
 Pro kio Saladin vin amnestiis,
 Nur sole vin.

TEMPLANO

Ĉu eĉ mi mem ĝin scias?
 Kun kol' jam nuda mi sur la mantelo
 Genuis, atendente jam la baton, kiam
 Min ekrigardas Saladin, alsaltas,
 Mansignas, oni min senkatenigas;
 Mi volas danki; jen li ploras; mutaj
 Ni ambaŭ estas; li foriras, kaj mi
 Postrestas. La motivojn nun divenu
 La Patriarko mem.

FRATO

Nu, li supozas,
 Ke al aferoj grandaj, vere grandaj
 Kardio vin destinis.

TEMPLANO

Jes, al grandaj!
 El fajroflamoj savi judidinon;
 Al Sinai konduki scivolemajn
 Pilgrimojn, jes, kaj tiel plu.

FRATO

Atendu
 La estontecon! — Dume kontentiĝu. —
 La Patriarko mem ja eble havas
 Aferojn gravajn por sinjora moŝto.

TEMPLANO

Vi kredas, frato? — Ĉu li eble jam
 Menciis tion?

FRATO

Jes! — Sed mi antaŭe
 Esploru vin, por vidi, ĉu vi estas
 La taŭga viro.

TEMPLANO

Bone; min esploru!
 (Mi volus vidi, kiel li esploros!)

FRATO

Plej bone estus, se mi rekte dirus
 Al via moŝto la de l' Patriarko
 Deziron.

TEMPLANO

Prave!

FRATO

Li vin volus igi
 Leteron transmanigi.

TEMPLANO

Mi ne estas
 Leterportisto! — Ĉu jen la okupo
 Pli honorinda ol el fajro savi
 Hebreidinon?

FRATO

Eble jes! — Ĉar — laŭ
 La Patriarko — la letero estas
 Valora por la tuta kristanaro.
 Kaj la portinton de l' letero — laŭ
 La Patriarko — iam la ĉielo
 Per speciala krono rekompencos.
 Kaj tiun kronon — laŭ la Patriarko —
 Plej inda estas via moŝto.

TEMPLANO

Mi?

FRATO

Por, krome, gajni tiun kronon — laŭ
La Patriark' — neniu homo estas
Pli lerta ja ol vi.

TEMPLANO

Ol mi?

FRATO

Vi estas

Libera, povas iri kien ajn;
Konkeri urbon vi scipovas kaj
Ĝin ŝirmi; certe — laŭ la Patriarko —
Vi povas taksi kaj priskribi klare
Al la por Dio batalantoj la
Malforton kaj la forton de la duaj
De Saladin tutnove konstruitaj
Internaj muroj.

TEMPLANO

Kara frato, se mi

Nur scius la enhavon de l' letero.

FRATO

Nu, tion — mi ja mem ne certe scias.
Sed estas la leter' por reĝo Philipp¹⁾. —
La Patriarko . . . Mi jam ofte miris,
Ke tia sankta viro, kiu tuta
Vivadas ĝenerale en ĉiel',
Bonvolas tamen esti instruita
Pri la aferoj de la mond' surtera.
Ho, tio devas esti malfacila!

TEMPLANO

Daŭrigu! Nu? La Patriarko . . . ?

¹⁾ pron: Filip.

FRATO

Scias

Ekzakte, kiel, kie, kiom forte,
De kiu flanko Saladin komencos
Militon, se ĝi ree komenciĝos
Denove.

TEMPLANO

Li ĝin scias?

FRATO

Kaj li volus

Volonte priinformi reĝon Philipp,
Por ke ĉi tiu proksimume povu
Eltaksi, ĉu l' danĝero vere estas
Sufiĉe granda por, kun Saladin,
Denove funkciigi batalhalton
Malrespektitan brave ja de via
Ordeno.

TEMPLANO

Kia Patriarko! — Sekve:

La brava, kara vir' min ne rigardas
Sendoto ordinara, sed — spiono. —
Ho, frato, diru al la Patriarko:
Laŭ via esplorado jen ne estas
Afero mia. — Mi min konsideras
Ankoraŭ ja militkaptito; kaj
Metio sola de Templano estas,
Kuraĝe svingi sian glavon, ne
Spioni malkuraĝe.

FRATO

Mi ĝin pensis! —

Mi eĉ pro tio ne al vi koleras. —
Aŭskultu plu: La Patriark' esploris
La nomon ankaŭ de la fortikaĵo,

Kaj kie sur la Libanon' ĝi kuŝas,
 En kiu estas la kolosaj sumoj,
 Per kiuj de l' sultan' la ruza patro
 La kostojn pagas de la militiro
 Kaj de l' armeo. Saladin nu iras
 De temp' al temp' al tiu ĉi kastelo
 Sur flankaj voj', sen akompanantaro.
 Ĉu vi komprenas?

TEMPLANO

Tute ne!

FRATO

Nenio

Pli simple estus ja ol ĉi-okaze
 Ekkapti la sultanon kaj mortigi.
 Vi tremas? — Ho, jam kelkaj Maronidoj
 Diamaj ja deklaris esti pretaj,
 La faron fari, se nur ilin gvidus
 Kuraĝa viro.

TEMPLANO

Kaj la Patriarko

Elektis min, por esti tiu viro
 Kuraĝa?

FRATO

Kaj li kredas, ke reĝ' Philipp
 Plej bone povus al li fari helpon
 De Ptelemis.

TEMPLANO

Min? Min, frato mia?

Min? — Ĉu vi do ne aŭdis? nur aŭdetis
 Pri tio, kion ja al Saladin
 Mi ŝuldas?

FRATO

Certe mi ĝin aŭdis!

TEMPLANO

Nu?

FRATO

Jes — laŭ la Patriarko — bone estas:
Sed Dio kaj orden' . . .

TEMPLANO

Nenion ŝanĝas

Kaj ne ordonas malindaĵon!

FRATO

Ne! —

Nur — laŭ la Patriarko — malindaĵo
Ĉe homoj estas tia ne ĉe Dio.

TEMPLANO

Al Saladin mi ŝuldas mian vivon
Kaj rabus lian!

FRATO

Fi! — Sed tamen — laŭ

La Patriarko — Saladin ja estas
De l' kristanaro malamik', kaj via
Amik' ne rajtas esti.

TEMPLANO

Ĉu amiko?

Mi nur al li ne agos malindule,
Sendanke malindule!

FRATO

Certe ne! —

Sed — laŭ la Patriarko — ja ni dankon
Pro Di' kaj homoj ne bezonas prui,
Se ia serv' okazis ne pro ni.
Kaj ĉar la famo diras — laŭ la Patriarko —,
Ke Saladin nur tial vin indulgis,
Ke en kondukt' kaj trajtoj viaj io
Lin memorigis pri la frato lia . . .

TEMPLANO

Eĉ tion scias Patriark'? — Kaj tamen . . . ?
 Ho, tio estu certa! — Saladin!
 Nur unu trajton faris la natur'
 Sur mi similan al la frato via:
 Kaj la animo ne je ĝi respondas?
 Kaj se respondas io: ĉu mi tion
 Subpremus por al Patriarko plaĉi? —
 Natur', vi tiel ne mensogas! — Tiel
 Ne fuŝas Dio siajn verkojn! — Frato,
 Foriru! — Ne ekscitu min! — For! For!

FRATO

Mi iras — pli kontenta ol mi venis.
 Pardonu min, sinjor'. Monaĥejanoj
 Obei devas ja al sia estro.

6a SCENO

La TEMPLANO kaj DAJA, kiu jam de kelke da tempo
 observis la Templanon kaj nun proksimiĝas.

DAJA

Tre bonhumora — kiel al mi ŝajnas —
 Ne lasis lin la frato. — Sed mi tamen
 Ja devas nun ĝin provi.

TEMPLANO

Jen! — Ja prave
 Proverbo diras: Ino kaj monaĥo
 De la diablo la ungegoj estas.
 De unu en alian jen mi falas.

DAJA

Ha! — Via moŝto, vi? — Al Dio dankon,
 Mil dankojn! — Kie do vi estis
 La tutan tempon? — Ĉu vi eble estis
 Malsana?

TEMPLANO

Ne.

DAJA

Do sana?

TEMPLANO

Fakte, jes!

DAJA

Ho, ni pro vi jam tute ĉagreniĝis.

TEMPLANO

Ĉu vere?

DAJA

Vi verŝajne forvojaĝis.

TEMPLANO

Pravege!

DAJA

Kaj revenas nun.

TEMPLANO

Hierau.

DAJA

De Recha l' patro ankaŭ nun revenis.
 Nun Recha do esperi povas...?

TEMPLANO

Kion?

DAJA

Nu, kion ŝi de vi jam ofte petis.
 Plej kore nun hodiaŭ ŝia patro
 Invitas vin. De Babilon' li venas

Kun dudek virkameloj ŝarĝumitaj
 De ĉiuj specoj de spicaĵoj, gemoj
 Kaj ŝtofoj de Hindujo kaj Persujo
 Kaj de Sirio kaj de malproksima
 Ĉinujo!

TEMPLANO

Mi ne estas aĉetema.

DAJA

La judoj lin adoras kiel princon.
 Ke „Natan la Saĝul“ lin oni nomas,
 Anstataŭ „la Riĉul“, min jam mirigis.

TEMPLANO

Por ili saĝo kaj riĉego eble
 La samo estas.

DAJA

Sed unue oni

Lin nomu „la Bonul“. Vi ne supozas,
 Ĉis kia grado li bonega estas.
 Ĵus eksciinte, kiom al vi Recha
 Ja ŝuldas, ĉion tiam li al vi
 Tuj fari kaj donaci volis.

TEMPLANO

Fakte?

DAJA

Ĝin provu, venu, vidu!

TEMPLANO

Kion? — Kiom

Rapide pasas la momento?

DAJA

Ĉu mi

Ĉe li restadus tiom longan tempon,
 Se li ne estus bona? — Mi konscias

Valoron mian kiel kristanino!
 Ĉe la lulilo oni ne profetis
 Al mi, ke mi nur sekvos mian edzon
 Al Palestino, por hebreidinon
 Eduki. — Mia kara edzo estis
 Nobela ano de l' armeo de
 Imperiestro Friedrich¹⁾. —

TEMPLANO

Jes! — Kaj Sviso

Laŭ la naskiĝo; kaj li havis la
 Honoron, droni en la sama akvo
 Kun la imperiestra moŝto. — Ho!
 Kioman fojon tion vi rakontos?
 Ĉu vi sen ĉeso min persekutados?

DAJA

Ho, persekuti! Dio!

TEMPLANO

Persekuti!

Kaj mi ne volas vin revidi plu!
 Nek aŭdi! — Mi ne volas ĉiam esti
 Memorigata pri la faro, kiun
 Mi ne pripensis; kiu, se mi pensas
 Pri ĝi, ekestas enigmaĵo. — Mi
 Ne volus ĝin bedaŭri; tamen: se
 Okazus ree io tia, mi —
 Pro vi — ne same tuje ekdecidus;
 Mi informiĝus — kaj mi lasus bruli
 La brulantajon!

DAJA

Dio!

¹⁾ pron: Fridrij.

TEMPLANO

Mi vin petas:

De post hodiaŭ ne plu konu min!
Plenumu mian peton. — Lasu for
La patron ankaŭ. Judo estas judo.
Mi estas kruda Ŝvabo. — La knabino —
Se ŝi enestis — jam el mia koro
Forestas.

DAJA

Sed ne vi el ŝia koro!

TEMPLANO

Al kio do utilas?

DAJA

Kiu scias!

Ne ĉiuj estas, kiaj ili ŝajnas.

TEMPLANO

Sed ne pli bona io! (*Li foriras*)

DAJA

Nu, atendu!

Pro kio urĝi?

TEMPLANO

Ho, ne igu min

Malami l' palmojn, kiujn mi amegas.

DAJA

Ho, iru! urs' Germana! Iru! — Sed
Mi ne ekperdu liajn postesignojn.

(*Ŝi sekvas lin malproksime*)

AKTO DUA

1a SCENO

Ejo: La palaco de la sultano.

SALADIN kaj SITTAH, ŝakludante.

SITTAH

Nu, kio estas? Kiel vi ludadas?

SALADIN.

Mi pensas: bone!

SITTAH

Eble, jes, por mi.

La movon tuj reprenu.

SALADIN

Ne.

SITTAH

Ĉevalo

Ja senŝirmiĝas.

SALADIN

Ha! Nu, jen!

SITTAH

Kaj nun

Mi vin avertas!

SALADIN

Ree! — Sekve: ŝak'!

SITTAH

Neniel helpas! — Mi nun movas. — Jen
Por vi la sama stato!

SALADIN

Mi eliros

El tiu embaras' ne sen ŝtonperdo.
Nu, bone! prenu la ĉevalon!

SITTAH

Ne!

Mi preterŝovos.

SALADIN

Tio min ne savas.

La movo pli valoras ol ĉevalo.

SITTAH

Jes, eble.

SALADIN

Sen la mastro vi kalkulon

Ne faru! — Jen! — Ĉi tion vi ja ne
Supozis!

SITTAH

Fakte ne! Mi ne supozis,

Ke vi ne plie gardos la reĝinon!

SALADIN

Mi, la reĝinon?

SITTAH

Vere mi jam vidas,

Ke mi hodiaŭ ree gajnos mil
Denarojn, kaj ne nazerinon nur.

SALADIN

Do kial?

SITTAH

Nu, ĉar vi ja nepre volas
 Malgajni. — Tamen tio tute ne
 Min kontentigas. — Ĉar krom tio, ke
 Tiela ludo tute ne amuzas:
 Ĉu mi ne pleje gajnis, kiam vi
 Min venkis? Ĉu ne ĉiam vi
 Al mi duoblan enmetaĵon pagis,
 Por min konsoli pro perdita ludo?

SALADIN

Do ŝajne vi intence eĉ malvenkis,
 Se en la lud' vi malsukcesis, franĵo?

SITTAH

Almenaŭ via donacemo estas
 Kialo, kara frato, se mi ne
 Pli bone lernis tiun ĉi ludafon.

SALADIN

Ni deflankiĝas de la ludo. — Finu!

SITTAH

Ĉu restas? — Bone: ŝak', duoble ŝak'!

SALADIN

Nu, fakte: mi ne vidis tiun ĉi
 Duoblan ŝakon, renversantan mian
 Reĝinon!

SITTAH

Ĉu ĝi estis evitebla?
 Ni vidu.

SALADIN

Ne! Forprenu la reĝinon.
 Kun tiu ŝton' neniam mi sukcesis.

SITTAH

Nur kun la ŝtono?

SALADIN

Prenu ĝin! — Ĝi plu

Ne servos. — Ĉio nun denove bone
Funkcias.

SITTAH

Ke ĝentile oni traktu
Reĝinojn, tion mi bonege lernis
De frato mia. (*Ŝi ne prenas ĝin*)

SALADIN

Prenu aŭ ne prenu!

Mi kroman nun ne havas.

SITTAH

Kial preni?

Ŝak'! — Ŝak'!

SALADIN

Tuj plu!

SITTAH

Kaj ŝak' kaj ŝak' kaj ŝak'!

SALADIN

Kaj mat'!

SITTAH

Ho, ne jam tute; intermetu
Ĉevalon aŭ ekfaru kion ajn. —
Egale!

SALADIN

Bone! — Vi ja gajnis kaj
Al-Hafi pagos. — Oni lin venigu! —
Vi, Sittah, estis ne malprava: mi
Dum la ludado estis malatenta.
Cetere: kiu ĉiam al ni donas
La ŝtonojn glatajn, tiom signifajn,

Lacigajn? — Ĉu mi ludis kun la Iman?¹⁾
 Ha ba! Malgajn' pretekston volas. — Ne
 La ŝtonoj mortaj, Sittah, estas, kiuj
 Perdigos min, sed via arto, via
 Percept' rapida, kalma...

SITTAH

Ho, vi volas

De l' perdo la pikilon malakrigi.
 Vi estis neatenta — pli ol mi.

SALADIN

Ol vi? — Kaj kio distritigis vin?

SITTAH

Ne via distriteco! — Kiam ni
 Denove tiel diligente ludos?

SALADIN

Ni ree ludos do des pli avide!²⁾
 Vi pensas, ĉar rekomenciĝos? — Estu! —
 Ne mi ja faris la unuan movon.
 Mi tre volonte volis plilongigi
 La halton; mi al mia Sittah volis
 Havigi bonan edzon ja samtempe;
 Kaj estu frato de Rikardo: li
 Ja estas lia frato.

SITTAH

Se vi nur

Rikardon laŭdi povas!

¹⁾ Al la ortodoksaj Islamanoj estas malpermesite, formi bildojn. Tial ili ankaŭ ne uzas ŝakfigurojn, sed ŝtonojn, kiuj havas surskribojn montrantajn la valoron. Tiajn ŝtonojn ĝenerale uzis Saladin, ludante kun la Iman, la kantoro de la moskeo. Ankaŭ ĉi-foje, por la ludo kun la fratino, oni donis al li ĉi tiujn ŝtonojn, kiuj postulas pli multe da atento, ol ŝakfiguroj.

²⁾ La senco de ĉi tiu verso ankaŭ en la Germana teksto ne estas klara.

SALADIN

Kaj se Melek,

La frato nia, havus de Rikardo
 Fratinon: kia familio estus!
 Plej bona famili' el la plej bonaj! —
 Vi aŭdas, ke min eĉ ne ĝenas, laŭdi
 Min mem. — Mi taksas inda min je miaj
 Amikoj. — Homojn tio ja estigus!

SITTAH

La belan revon mi ja tuj priridis!
 Sed vi ne konas la kristanojn, ilin
 Ne koni volas. Ili celas, esti
 Kristan', ne homo. Kio superstiĉon
 Spicadas per homeco — de post Kristo —
 Eĉ tion ili amas, ne ĉar homa
 Ĝi estas, sed ĉar Kristo mem ĝin faris. —
 Ho, ĝoju ili, ke li estis tia
 Bonul'! ke ili povas kredi lian
 Virtecon! — Sed ne lia virto, ne:
 La nomo devas disvastiĝi ĉie
 Kaj gluti kaj malhonorigi ĉiujn
 Aliajn bonajn nomojn. Nur la nomon,
 La nomon ili celas.

SALADIN

Kaj vi pensas,

Ke ili tial nur postulas, ke
 Aliaj, vi kaj Melek, kristaniĝu,
 Por povi geedziĝi kun kristano?

SITTAH

Jes! Kvazaŭ nur kristan' kaj kristanino
 La rajton havus al la am', donita
 De la Plejalta ja al vir' kaj ino!

SALADIN

Kristanoj kredas multajn mizeraĵojn;
 Pro kio ili do ne kredu tiun? —
 Kaj tamen vi eraras. — La Templanoj,
 Ne la kristanoj estas kulpaj — kiel
 Templanoj, ne kristanoj; ili nur
 Malhelpas la aferon. Ili ja
 Pri Akka ne rezignas, kiu devus
 La doto esti de l' fratino de
 Rikard' al Melek. — Por ke la profito
 De l' kavalir' ne kuru riskon, ili
 Monahon stultan ludas. Kaj por ke
 Sukcesu krome bona rabo, ili
 Apenaŭ povis priatendi l' finon
 De l' batalhalto. — Bone! Do daŭrigu!
 Sinjoroj, do daŭrigu! — Mi konsentas! —
 Se ĉio kroma nur funkcius.

SITTAH

Nu?

Kaj kio krome vin turmentas? Kio
 Do krome povus vin eksciti?

SALADIN

Kio

Min ĉiam forte ja jam ekscitegis:
 Sur Libanon mi estis, ĉe la patro.
 Ankoraŭ lin sieĝas zorgoj...

SITTAH

Ve!

SALADIN

De l' embaras' eliron li ne vidas.
 Ja ĉie mankas...

SITTAH

Mankas? Kio mankas?

SALADIN

Nu, tio ja apenaŭ menciinda!
 Se mi ĝin havas, mi ĝin ne avidas,
 Kaj se ĝi mankas, ĝi havenda ŝajnas. —
 Sed kie restas Hafi? — Ĉu neniu
 Venigas lin? — La malbenita mono! —
 Jen Hafi, bone!

2a SCENO

LA DERVIŜO AL-HAFI. SALADIN. SITTAH.

HAFI

Nu, el Egiptujo
 La monoj supozeble jam alvenis.
 Nur estu multe!

SALADIN

Ĉu avizo venis?

HAFI

Al mi? Ne! Sed mi kredis, ke vi volas
 Al mi ĝin doni.

SALADIN

Pagu mil denarojn
 Al Sittah! (*Expense promenant*)

HAFI

Pagu! Ne: akceptu! Bone!
 Eĉ estas pli malmulte ol neniom. —
 Al Sittah? — Ree do al Sittah? Kaj
 Perdite? — Ree per ŝaklud' perдите? —
 Jen la tabul'!

SITTAH

Ĉu vi do min envias
 Pro la bonŝanc'?

HAFI

(rigardante la tabulon)

Envii? — Vi ja scias.

SITTAH

(farante signojn)

Bst! Hafi!

HAFI

(ankoraŭ ĉe la ludo)

Al vi mem ĝin malenviu!

SITTAH

Al-Hafi, bst!

HAFI

(al Sittah)

La blankaj estis viaj?

Vi diras: „ŝak’!“

SITTAH

Feliĉe li ne aŭdas!

HAFI

Nun sekvos lia movo.

SITTAH

Diru do,

Ke mi la monon povas havi.

HAFI

Jes!

Vi ĝin ricevos, kiel ĵam kutime.

SITTAH

Ho, frenezul’!

HAFI

La ludo ja ne ĉesis!

Ankoraŭ vi ne perdis, Saladin!

SALADIN

(apenaŭ aŭskultante)

Jes! Tamen! Pagu! Pagu!

HAFI

Pagu! Pagu!

Jen via la reĝino.

SALADIN

(same)

Ne validas;

Eksiĝis el la ludo.

SITTAH

Fine diru,

Ke mi la monon tuj prenigi povas.

HAFI

(ankoraŭ meditante pri la ludo)

Jes, certe! kiel ĉiam! — Tamen: eĉ
 Se la reĝino ne valoras plu,
 Vi tamen ne jam perdis.

SALADIN

(alpaŝas kaj renversas la ludon)

Jes, mi perdis;

Mi volas!

HAFI

Tial! — Ludo kiel gajno!

Kaj gajno kiel pago!

SALADIN

Kio estas?

SITTAH

(de temp' al tempo farante signojn al Hafi)

Nenio! Li volonte kontraŭstaras;
 Li ŝajne estas iom enviema.

SALADIN

Nu? Ĉu pri vi? — Pri mia fratineto?
 Vi, Hafi, estas enviema?

HAFI

Eble!

Mi volus nomi mia ŝian cerbon,
Boneca esti tiom, kiel ŝi.

SITTAH

Sed ĉiam li korekte al mi pagis.
Li ankaŭ pagos nun. Do lasu lin! —
Foriru, Hafi! Mi serviston sendos
Pro mia mono!

HAFI

Ne! mi ne daŭrigos

La komedion! Li, sen tio, iam
Ĝin scios.

SALADIN

Kion? Kion do?

SITTAH

Al-Hafi!

Nu, kion vi promesis? — Ho, respektu
La vorton vian!

HAFI

Ĉu mi ja supozis,

Ke tio ĉi okazos?

SALADIN

Min sciigu!

SITTAH

Mi petas vin, Al-Hafi, modestiĝu.

SALADIN

Jen strange! — Kian intimaĵon varman,
Solenan, Sittah povus kun fremdulo,
Eĉ kun derviŝ', prefere havi ol
Kun mi, kun sia frat' samsanga? — Hafi,
Derviŝ'! Nun mi ordonas! Ekparolu!

SITTAH

Ho, frato mia, malgravaĵo tuŝu
 Vin ne pli multe, ol ĝi ja valoras.
 Vi scias, ke mi gajnis kelkajn fojojn
 De vi la saman sumon, ŝakludante.
 Kaj ĉar mi nun la monon ne bezonas;
 Ĉar nun en via kaso ja la mono
 Ne estas tro abunde, mi enlasis
 La sumojn. Tamen vi pro ĝi ne zorgu.
 Mi ja intencas ĝin donaci nek
 Al vi, nek al la kaso, nek al Hàfi.

HAFI

Ho, se nur estus tio!

SITTAH

Eĉ kromaĵo:

Eĉ tio restis en la kaso, kion
 Krom tio iam vi por mi destinis.
 Ĝi restis en la kaso de monatoj.

HAFI

Kaj krome?

SALADIN

Kio? — Tuj parolu!

HAFI

De kiam de l' Egiptoj ni atendas
 La monon, ...

SITTAH

(al Saladin)

Ne aŭskultu!

HAFI

Neniom prenis ...

... ŝi ne nur

SALADIN

Bonulin'! — Sed eĉ

Pruntdonis, jes?

HAFI

Kortegon tutan ŝi

Subtenis, kaj vivkoston vian sola

Ŝi pagis.

SALADIN

Ha! Jen mia fratineto! (*Li ĉirkaŭprenas ŝin*)

SITTAH

Ja vi nur, frato, tiom min riĉigis,

Por tion povi.

HAFI

Kaj li ŝin estigos

Samgrade malriĉega, kiel estas

Li mem.

SALADIN

Malriĉa, mi? Ho, kiam mi

Pli multe havis, kiam pli malmulte?

Ĉevalo, vesto, glav' kaj — unu Dio!

Sufiĉas tio! Kiam tio mankos?

Kaj tamen, Hafi, mi pro vi koleras.

SITTAH

Ho, ne koleru. — Kial mi ne povas

La patron tiel same senzorgigi?

SALADIN

Ha, Sittah, nun vi ree subpreme gas

Gajecon mian! — Jes, al mi, por mi

Nenio mankas, povas manki. — Sed

Ja li malhavas, kaj ni ĉiuj sekve. —

Ho, diru, kion fari! — Egiptujo

Nin atendigos eble longe. — Kial,

Nur scias Di'. — La land' kvieta estas. —

Limiĝi, ŝpari, ĉion mi ja volas,

Suferi eĉ, se tio tuŝas nur

Min mem, min mem nur, kaj se ne alia
 Pro ĝi suferas. — Sed al kio helpos?
 Ĉevalon, veston, glavon mi bezonas;
 Kaj eĉ kun Di' marĉandi mi ne povas.
 Li jam sen tio nur malmulte havas:
 Nur mian koron. — Sed kun la abundo
 De via kaso, Hafi, mi treege
 Kalkulis.

HAFI

Ha? Abundo? — Diru mem,
 Ĉu vi ne estus ponardinta min,
 Aŭ eĉ min sufokinta, se vi min
 Trovinta estus kun abundo. Jes,
 Kun tromporabo! tio estus ebla.

SALADIN

Do: kion ni nun faru? — Ĉu vi ne
 Alie povis pruntepreni, ol
 Ĉe Sittah?

SITTAH

Ĉu mi volis lasi preni
 De mi privilegion tiun, frato?
 Eĉ nun mi ĝin defendas. Mia kaso
 Ne estas elĉerpita jam.

SALADIN

Pro Dio!

Ne tio! Ne! — Rapidu, Hafi, iru!
 Pruntprenu kie ajn, de kiu ajn!
 Promesu! garantiu! — Nur ne plu
 De tiuj pruntu, kiujn mi riĉigis.
 De tiuj prunti, ŝajnus repostulo.
 Vizitu la plejavarulojn: ili
 Volonte donos; ili bone scias,
 Ke inter miaj manoj mon' kreskegas.

HAFI

Mi tiajn ja ne konas.

SITTAH

Mi ĵus pensis,

Ke laŭ la famo, Hafi, ja revenis
Amiko via.

HAFI

(frapite)

Kiu do amiko?

Do kiu estas?

SITTAH

La glorata judo!

HAFI

Glorata judo? Kaj de mi glorata?

SITTAH

Vi diris — mi tre bone rememoras
Esprimon vian — ke Kardio lia
El ĉiuj valoraĵoj al li donis
Abunde la plej grandan kaj la plej
Malgrandan.

HAFI

Mi ĝin diris? — Kion mi

Esprimi volis?

SITTAH

Saĝo: la plej granda.

La plej malgranda: Riĉo.

HAFI

Kio? Mi?

Pri judo? Mi? Pri judo mi ĝin diris?

SITTAH

Ĉu eble vi pri via Natan ne
Ĝin diris?

HAFI

Jes! pri li! pri Natan! Jes! —
 Mi ĵus pri li ne pensis. — Fakte? Li
 Nun fine hejmen venis? — Sekve lia
 Situacio ne malbona ŝajnas!
 Jes: lin popolo nomis „la Saĝul’“
 Kaj „la Riĉul’!“

SITTAH

„Riĉul’“ lin oni nomas
 Nun pli ol iam. Tuta urbo laŭdas
 La valoraĵojn, la trezorojn, kiujn
 Kunportis li.

HAFI

Se ree li „Riĉulo“,
 Li ree ankaŭ estas „la Saĝulo“.

SITTAH

Se eble, Hafi, vi kun li parolus?

HAFI

Pri kio? — Eble eĉ pri pruntedono?
 Vi lin ne konas! — Prunti? — Lia saĝo
 Ja estas, ke li ne pruntedonas.

SITTAH

Iam

Pri li vi pentris tutalian bildon.

HAFI

Li eble al vi pruntedonos varojn.
 Sed monon? — Monon? ne! — Li estas judo
 Ja tia, kiaj judoj ne ekzistas
 Tre multaj. Nu, li estas saĝa, scias
 Vivadi, bone ludas ŝakon. Sed
 Laŭ bono kaj malbon’ li diferencas
 Malmulte de aliaj judoj. — Lin
 Ne priesperu. — Li al malriĉuloj

Ja donas, donas malgraŭ Saladin;
Ne tiom multe, sed tutsamvolonte
Kaj sen prefero. Li egalmezuras
Kristanon, judon, islanan kaj
Eĉ parson¹⁾.

SITTAH

Tia homo ...

SALADIN

Kial do

Neniam mi pri tiu viro aŭdis?

SITTAH

...al Saladin ne pruntedonus? Ne
Al li, nur bezonanta por aliaj,
Ne por si mem?

HAFI

Ja judo Natan estas,
Malinda judo! — Ĝin al mi do kredu! —
Li tiom vin envias, eĉ ĵaluzas,
Ĉar vi donadas! Tute por si mem
Li volas ĉiun „Di'-vin-rekompencu“
De l' tuta mond'. Nur tial li ne pruntas,
Ke ĉiam li donaci povu. Ĉar
La leĝ' mildecon nur ordonas, ne
Komplezon, mildo lin estigas la plej granda
Malkomplezul' de l' mondo. Ni ja estas
De kelka temp' ne plu amikoj bonaj;
Ne pensu tamen, ke pro tio eble
Mi juĝas lin maljuste. Certe ne!
Al ĉio ajn li taŭgas, jes! sed ne
Al tio; fakte ne. — Mi iru tuj,
Aliajn pordojn frapi. — Mi ekpensas
Pri unu maŭro, kiu estas riĉa
Kaj avarega. — Tuj mi iros, tuj!

¹⁾ parso = fajro-adoranto.

SITTAH

Ĉu tiom urĝas, Hafi?

SALADIN

Lasu lin!

3a SCENO

SITTAH. SALADIN.

SITTAH

Li kuras, kvazaŭ li sin savi volus!
 Nu, kio tio estas? — Ĉu li vere
 Pri li trompigis? — Aŭ ĉu li intencas
 Nin trompi?

SALADIN

Ĉu vi min demandas? Mi

Apenaŭ scias ja, pri kiu estas
 Parolo. — Mi pri via judo Natan
 Unuafoje aŭdis.

SITTAH

Fakte? Ĉu

Kaŝita al vi restis vir', pri kiu
 La famo diras, ke li priesploris
 La tombon de David' kaj Salomono,
 Solvante per sekret' sigelon ĝian.
 De tie li de temp' al temp' alportas
 Riĉaĵojn netakseblajn, kiuj estas
 En tiu ejo ja nur supozeblaj.

SALADIN

Se tiu viro prenis la riĉaĵojn
 El tomb', tutcerte ĝi ne estis tiu
 De Salomono kaj David', sed tombo
 De malsaĝulo!

SITTAH

Aŭ de malindulo!

Kaj lia font' pli havodona estas,
Kaj pli neelĉerpebla ol ĉerkejo
Monplena.

SALADIN

Li komercas, laŭ la famo.

SITTAH

Sombesto¹⁾ lia paŝas ĉiujn vojojn,
Dezertojn ĉiujn; liaj ŝipoj naĝas
En ĉiuj akvoj. Iam tion diris
Al-Hafi mem, kaj rave li aldonis,
Ke tiom saĝe, bone tiu viro
Disponas pri la mono, kiun li
Saĝece, diligente enspezigas;
Ke plena estas de justeco lia
Spirito, kaj de virto lia koro,
Kaj ke li mem plenplena de belamo.

SALADIN

Kaj nun Al-Hafi juĝis tiel strange,
Malvarme.

SITTAH

Ne malvarme, embarase.

Li ŝajne timis, pri li diri laŭdon,
Kaj tamen volis ne mallaŭdi lin.
Aŭ ĉu de tiu gent' eĉ plejbonulo
Ne povas malkonfesi sian genton?
Ĉu tio fakte estas? Ĉu Al-Hafi
Do ĉi-rilate devas honti pri
Amiko sia? — Estu kiel ajn! —
Li estu pli ol jud' aŭ malpli! Se
Li estas riĉa: tio nin sufiĉas!

¹⁾ sombesto = G: Saumtier; A: sumpter horse; F: bête de somme;
I: bestia da soma.

SALADIN

Sed vi de li ne prenu lian havon
Perforte!

SITTAH

Kiel do perforte, frato?
Per fajro kaj per glavo? — Tute ne!
Vi por de malfortulo malforteco
Perforton ne bezonas. — Venu dume
En la serajlon mian, por aŭskulti
De mi ĵus aĉetitan kantistinon.
En mi dumtempe maturiĝos plano
Rilate tiun Natan. — Venu, frato!

4a SCENO

Ejo: Antaŭ la domo de Natan, kie ĝi tuŝas la palmojn.

RECHA kaj NATAN elvenas. Al ili DAJA.

RECHA

Vi longe restis, patro mia. Li
Apenaŭ estos renkontebla.

NATAN

Nu!

Se eble ne ĉi tie sub la palmoj,
Sed aliloke. — Nur kviete. — Vidu!
Ĉu tie Daja ne alvenas?

RECHA

Certe

Ŝi perdis lin.

NATAN

Ho nel Versajne ne!

RECHA

Ŝi alikaze venus pli rapide.

NATAN

Ŝi eble ne jam vidis nin...

RECHA

Nun ŝi

Nin vidas.

NATAN

Kaj jam pli rapide paŝas.
Do nun kalmiĝu!

RECHA

Ĉu vi ekdezirus

Filidon, kiu nun ja estus kalma?

Kaj ne sopirus lin, al kiu ŝi

La vivon dankas? tial al ŝi karan

Nur, ĉar al vi unue ŝi ĝin dankas.

NATAN

Mi volus ne alia vin, ol tia;

Eĉ se mi scius, ke en via koro

Troviĝus io tut-alia.

RECHA

Kio,

Ho patro?

NATAN

Vi demandas? tiom honte?

Ho, kio ajn en via koro kuŝas,

Natur' ĝi estas kaj virgec'. — Ne zorgu.

Mi ankaŭ ja ne zorgas. Nur promesu:

Se iam via koro sin deklaras

Pli klare: Recha, ĝin al mi ne kaŝu!

RECHA

Eĉ la ideo, eble al vi kaŝi

La senton mian, ege min tremigas.

NATAN

Sufiĉas! — Glatigite kaj finite! —

Jen estas Daja. — Kion vi sciigas?

DAJA

Ankoraŭ sub la palmoj li promenas,
Sed tuj li tiun muron ĉirkaŭiros. —
Jen li!

RECHA

Kaj ŝajne li ne scias, kien?
Ĉu rekte? ĉu malsupren? ĉu maldekstren?
Ĉu dekstren?

DAJA

Ne; li certe ĉirkaŭiros
La monaĥejon, kaj li tiukaze
Ĉi-preterpaŝos.

RECHA

Prave! — Ĉu vi lin
Parolis? — Kiel li kondutis?

DAJA

Same.

NATAN

Plej bone estos, se li vin ne vidos.
Ekstaru malantaŭe; aŭ, pli bone,
Eniru.

RECHA

Unu vidon nur! — Barilo
Lin kaŝas, ho!

DAJA

La patro estas prava:
Envenu! Tuj! Se li vin vidos, eble
Li tuj reiros.

RECHA

Ha, la plektbarilo!

NATAN

Kaj se subite li el ĝi elpaŝos:
Ne estas eble, ke li vin ne vidos.
Do iru for!

DAJA

Jes, venu! De fenestro
Ni povos ilin rigardadi.

RECHA

Jes? (*Ambaŭ eniras*)

5a SCENO

NATAN kaj baldaŭ poste la TEMPLANO.

NATAN

Mi preskaŭ timas la strangulon. Preskaŭ
Min frapas lia kruda virto. — Strange,
Ke unu homo tiom embarasas
Alian! — Ha, li venas. — Jes, je Dio!
Junulo kvazaŭ viro. Al mi plaĉas
La bona, spita vid'! la forta paŝo!
La ŝel' maldolĉa povas esti, sed
La kerno, ne! — Sed kiam mi jam vidis...?
Pardonu, nobla Franko...

TEMPLANO

He?

NATAN

Permesu...

TEMPLANO

Do kion, judo? Nu?

NATAN

Ke mi arogas,

Al vi paroli.

TEMPLANO

Tio min ne tuŝas!

Do kio?

NATAN

Ne grimacu kaj ne paŝu
 Fiere, malestime preter viro,
 Ŝuldanta al vi dankon ĝis la morto.

TEMPLANO

Pro kio? — Mi divenas! Ĉu vi estas...?

NATAN

Mi estas Natan, patro de l' knabino,
 Savita el la fajr' per via faro.
 Mi venas...

TEMPLANO

Ne por danki, mi vin petas.
 Pro tiu malgravaĵo mi jam devis
 Toleri tro da dank'. — Precipe vi
 Al mi neniom ŝaldas. — Ĉu mi sciis,
 Ke estas la knabin' filino via?
 La devo estas de Templano, helpi
 Al kiu ajn estanta en danĝero.
 Kaj krome: mia vivo tiutempe
 Min nur malhelpis. Kaj volonte mi
 Ekkaptis la okazon, por ĝin riski
 Por san' kaj vivo de alia homo;
 De hom' alia, eĉ se tiu estis
 Nur judidino.

NATAN

Grande! — Grande, jes,
 Kaj abomene! — Sed la sekvo estas
 Ja klara: la grandec' modesta savas
 Sin post la abomenon por eviti
 Admiratecon. — Kaj se ĝi tiome
 Malŝatas, esti admirata: kion
 Ĝi malpli do malŝatos? — Ho, sinjoro,

Se vi ne estus fremda kaj kaptita,
 Mi ne arogus, tiel vin demandi.
 Sinjoro, ho, ordonu, diru: kiel
 Mi povus servi vin?

TEMPLANO

Neniel!

NATAN

Mi

Riĉulo estas.

TEMPLANO

Riĉa jud' pro tio

Ne estas judo bona.

NATAN

Ĉu vi tial

Ne povas uzi tion, kion bonan
 Li havas? uzi la riĉaĵojn liajn?

TEMPLANO

Nu, tion mi ne volas tute nei,
 Jam pro mantelo mia. — Iam, kiam
 Ĝi estos tute eluzita kaj
 Nek drapo, nek kunkudro plu valoros,
 Mi venos, por de vi pruntpreni monon
 Aŭ drapon. — Ne rigardu malbonmiene! —
 Mi ne jam celas vian poŝon! Mia
 Mantelo ja ankoraŭ iom taŭgas.
 Nur tiu ĉi angulo jam posedas
 Makulon; estas eta bruldifekto.
 Kaj ĝi estiĝis, kiam mi elportis
 Filinon vian el la fajro.

NATAN

(ekprenante la mantelangulon kaj rigardante ĝin)

Strange:

Makulo tia, tia bruldifekto

Atestas pli favore eĉ pri viro,
 Ol lia propra buŝ! — Mi volus kisi
 Makulon tiun! — — Estis malgraŭvole!

TEMPLANO

Nu kio?

NATAN

Larmo sur ĝin falis.

TEMPLANO

Lasu!

Surfalas multaj gutoj jam. (Sed preskaŭ
 La jud' min embarasas!)

NATAN

Ĉu vi ne

Bonvolus foje sendi la mantelon
 Al mia filineto?

TEMPLANO

Kaj pro kio?

NATAN

Ŝi ankaŭ sian buŝon sur ĝin premu.
 Ĉar brakĉirkaŭi la genuojn viajn
 Ŝi certe vane nur deziras.

TEMPLANO

Judo! —

Ĉu — Natan? — Vere, Natan, vi esprimas
 Bonege — akre — viajn pensojn — tre
 Akrege — vi min embarasas — mi...

NATAN

Ho, ŝajnu kaj ŝajnigu kiel ajn —
 Mi tamen konas vin. Vi estas tro
 Honesta, bona por ĝentila esti.
 Knabino — sentoplene; senditino —

Serveme; kaj la patro — malproksime.
Vi zorgis pro reputacio ŝia,
Evitis ŝian dankon por — ne venki.
Pro tio mian dankon —

TEMPLANO

 Mi konfesas,
Ke vi la pensojn de Templanoj konas.

NATAN

Nur de Templanoj? nur ĉar ĝin postulas
La regularo de ordeno sankta?
Mi scias, kiel pensas bonaj homoj,
Kaj ke posedas tiajn ĉiuj landoj.

TEMPLANO

Kun diferencoj, kompreneble.

NATAN

 Jes.
Pri vest', kolor', staturo diferencoj.

TEMPLANO

Kaj diference tie kaj ĉi tie.

NATAN

Ho, jen ne granda diferenco, tamen.
Bezonas vastan ejon grandkorulo,
Kaj multaj, tro proksimaj, reciproke
Disbatas siajn branĉojn. — Mezbonuloj
De nia speco ĉie multaj estas.
Nur: unu ne kritiku la alian;
Tubero ne malamu ŝvelitaĵon;
Kaj la monteto ne forgesu, ke
Ĝi estas ja ne sola sur la tero.

TEMPLANO

Komparoj bonaj! — Sed ĉu vi ne konas
 Popolon, kiu tiel kritikadis
 Unua? — Ĉu vi scias, kiu gento
 Unua nomis sin la elektita?
 Kaj se mi — kvankam mi popolon tiun
 Ne malamegas — tamen malestimas
 Ĝin pro fiero jena, kiun ĝi
 Transdonis al kristan' kaj islamano —:
 Nur ĝia Dio estas vera Dio —? —
 Vi miras, ke kristano, mi, Templano,
 Parolas tiel? — Kiam do kaj kie
 Fanatikeco tiu: havi Dion
 Plej bonan kaj surprimi lin al ĉiuj,
 En formo plej terura, montris sin
 Pli ol ĉi tie, pli ol nun? — Al kiu
 La vido nun, ĉi tie ne klariĝas...
 Sed kiel ajn! — Forgesu la parolojn
 Kaj lasu min! (*Li volas foriri*)

NATAN

Ho, nun eĉ pli proksime
 Mi ligos min al vi! — Ni nepre devas
 Ekamikiĝi! — Kiom ajn malamu
 Popolon mian! — Nian genton ni
 Ja ne elektis. — Ĉu ni estas nia
 Popolo? — Kio do: popolo?
 Ĉu judo kaj kristan' ne estas homo
 Pli frue ol kristan' kaj judo? — Ho!
 Vi estas unu inter tiuj ja,
 Al kiuj jam sufiĉas, esti homo!

TEMPLANO

Jes, tia estas mi! — Ho, donu manon!
 Mi hontas, ke mi vin ne tuj ekkonis!

NATAN

Kaj mi pri ĝi fieras! — Nur vulgaron
Malofte ni malkonas.

TEMPLANO

Kaj la raron

Malsimple ni forgesas. — Natan,
Ni devas, devas amikiĝi!

NATAN

Jam

Okazis. — Kiom ĝojos mia Recha! —
Kaj kian gajan perspektivon vidas
Okulo mia! — Ho, nur konu ŝin!

TEMPLANO

Mi tion sopiregas! — Kiu jen
Elkuras vian domon? — Ĉu ne Daja?

NATAN

Jes, jes! Sed tiom time?

TEMPLANO

Ĉu al Recha

Okazis io?

6a SCENO

LA SAMAJ kaj DAJA, rapidece.

DAJA

Natan! Natan!

NATAN

Nu?

DAJA

Pardonu, via moŝto, ke mi vin
Malhelpas.

NATAN

Kio estas?

TEMPLANO

Kio estas?

DAJA

Sultano sendis. La sultano volas
Paroli vin. — Ho, la sultano!

NATAN

Min?

Li volos scii, kion novan mi
Alportis. — Diru, ke malmulte aŭ
Nenion ja ĝis nun mi elpakigis.

DAJA

Ne, li ne volas vidi, sed paroli
Kun vi persone kaj plejplej rapide.

NATAN

Mi venos. — Ree nun foriru, Daja.

DAJA

Ne ekkoleru, ho sinjora moŝto. —
Ni tiom ĉagreniĝas: kion la
Sultano volas? (*Si eniras*)

NATAN

Mi ĝin baldaŭ scios.

7^a SCENO

NATAN kaj la TEMPLANO.

TEMPLANO

Ĉu vi lin do ne konas? tio estas:
Persone?

NATAN

Saladin? Ne jam. — Mi ne
Evitis, nek klopodis, lin ekkoni.
La famo tro lin laŭdis tiel, ke

Mi pli volonte volis kredi, ol
 Mem vidi. — Tamen nun — ĉar fakto pruvas —
 Li per indulg' al via vivo...

TEMPLANO

Jes!

Jen vere fakto. — Mia vivo estas
 Donaco lia ja.

NATAN

Per kiu li

Al mi donacis du-, trioblan vivon.
 Jen kio ŝanĝis ĉion inter ni,
 Kaj ĉirkaŭ min ŝnuregon ĵetis, kiu
 Al li ĝismorte miŝ katenas. — Mi
 Apenaŭ povas priatendi, kion
 Unue li al mi ordonos. Mi
 Je ĉio estas preta, ja, eĉ preta
 Konfesi, ke pro vi mi tia estas.

TEMPLANO

Ĝis nun mi mem ne povis al li danki.
 Mi tamen ofte penis, lin renkonti.
 Al li ĉimpro mia venis same
 Rapide, kiel ĝi remalaperis.
 Li eble eĉ pri mi jam ne memoras;
 Kaj tamen: unufoje li almenaŭ
 Pri mi memori devos, por decidi
 Pri mia sorto. — Ne sufiĉas, ke
 Pro li ankoraŭ mi ekzistas, vivas
 Per lia volo: nun mi atendadu,
 Laŭ kies volo mi vivadi devos.

NATAN

Jes, prave. — Des pli multe mi rapidu. —
 La interparolado eble eĉ

Ebligos, vin menciĵ. — Do pardonu:
Mi kuras. — Kiam, kiam ni vin vidos
Ĉe ni?

TEMPLANO

Laŭ via volo.

NATAN

Ne, laŭ via!

TEMPLANO

Hodiaŭ jam.

NATAN

Kaj via nom', mi petas?

TEMPLANO

Ĉi estis — estas Kurd von Stauffen — Kurd.

NATAN

Von Stauffen? — Stauffen? — Stauffen?

TEMPLANO

Vin frapas?

Kial ĝi

NATAN

Stauffen? — Ĉu de tiu gent'

Jam kelkaj...?

TEMPLANO

Jes! Ĉi tie estis, putras

Jam kelkaj idoj de ĉi tiu gento;

Eĉ mia onklo — ne! eĉ mia patro. —

Sed kial do vi min rigardas pli

Kaj pli fiksege?

NATAN

Ho, nenial! Ĉu min
Lacigi povas, vin rigardi?

TEMPLANO

Mi

Do iros for! — Rigard' de esploranto
Eltrovis ofte pli ol li intencis.
Mi tion timas, Natan. — Ni nin konu
Per tempodaŭro, ne per scivolemo. (*Li iras for*)

NATAN

(mirante rigardante post lin)

„La esploranto trovis ofte pli
Ol li intencis“. — Fakte ŝajnas, kvazaŭ
En mia kor' li legus. — Fakte jes,
Jen kio povus eĉ al mi okazi. —
Ne nur statur' kaj paŝ' de Wolf; eĉ voĉo!
Ekzakte tiel Wolf la kapon tenis;
Eĉ same li la glavon kaptis; kaj
Eĉ tiel Wolf ekpalpis siajn brovojn,
Por kvazaŭ kaŝi de l' okul' la fajron. —
Kaj tiaj bildoj enbatitaj povas
En ni dormadi longan tempon, ĝis
Ke sono, vorto ilin vekas! —
Von Stauffen! — Jes! — Filnek kaj Stauffen.
Ho, baldaŭ pli ekzakte mi ĝin scios.
Sed nun al Saladin. — Sed kio? ĉu
Jen Daja ne aŭskultas? — Venu, Daja!

8a SCENO

DAJA. NATAN.

NATAN

Ĉu ne? nun jam vi ambaŭ sopiregas
Ekscii ion tut-alian, ol
De Saladin la volon.

DAJA

Ŝin pardonu!

Vi ĝuste ja komencis, pli intime
Kun li paroli, kiam la sendito
De Saladin nin fortimigis de l'
Fenestro.

NATAN

Nu, sciigu ŝin, ke ŝi
Lin tuj atendu.

DAJA

Certe?

NATAN

Ĉu mi povas
Fidegi vin, ho Daja? — Ŝin gardumu,
Mi petas vin. Vi tion ne bedaŭros.
Eĉ via konscienco kontentiĝos.
Nur, Daja, ne malsukcesigu mian
Projekton. — Nur rakontu kaj demandu
Kun modesteco kaj rezervo granda.

DAJA

Ĉu vi pri tio do bezonas, min
Rememorigi? — Tuj ni ambaŭ iru. —
Ĉar jen! mi kredas: de l' sultano venas
Sendito dua: Hafi, la derviŝo. (*Ŝi foriras*)

9a SCENO

NATAN. Al-HAFI.

HAFI

Mi ĝuste volis ree vin viziti.

NATAN

Ĉu urĝas? Kion do li ekpostulas
De mi?

HAFI

Do kiu?

NATAN

Saladin. — Mi venos.

HAFI

Al kiu? Al sultan'?

NATAN

Ĉu Saladin

Ne sendas vin?

HAFI

Ne! Ĉu li do jam sendis?

NATAN

Jes, certe!

HAFI

Vere? Nu, do estas ĝuste.

NATAN

Nu kio? Ĝuste?

HAFI

Mi ne estas kulpa!

Jes, Dio scias, mi ne estas kulpa! —

Por ĝin eviti — kiom mi pri vi mensogis!

NATAN

Eviti kion? — Kio estas ĝusta?

HAFI

Ke vi nun estas lia defterdar'.
 Mi vin kompatas. — Sed mi ne ĉeestu!
 Mi tuj foriros. — Vi jam scias, kien.
 Vi konas mian vojon. — Ĉu mi ion
 Por vi aranĝu sur la vojo? Vi
 Pri mi disponu. — Sed ne estu plio,
 Ol kion povas porti tutnudulo.
 Parolu tuj, mi iros.

NATAN

Ne forgesu,
 Al-Hafi, ke mi ja neniom scias.
 Pri kio vi babilas?

HAFI

Vi do tuj
 Kunportos viajn sakojn?

NATAN

Sakojn?

HAFI

Nu,
 La monon, kiun vi al li pruntdonu.

NATAN

Nenio kroma?

HAFI

Ĉu mi do ĉeestu,
 Ke tagon li post tago vin elĉerpos
 Ĝis la piedfingroj? Ĉu mi do ĉeestu,
 Ke malŝparemo pruntas, pruntas, pruntas
 De la aliatempe ĉiam plena
 Garbejo de la saĝa mildo, ĝis

Ke eĉ en ĝi naskita mus' malriĉa
Ekmortmalsatas? — Ne al vi imagu,
Ke tiu, kiu volas vian monon,
Konsilon vian sekvos! — Li, kaj sekvi
Konsilon! — Kiam Saladin permesis,
Ke oni lin konsilu? — Aŭdu, kio
Ĵus ekkazis.

NATAN

Nu? — Mi vin aŭskultas.

HAFI

Mi al li venas, kaj li ĝuste ŝakon
Kun la fratino ludis. — Sittah ludas
Bonete, kaj la ludo, kiun li
Jam kredis, jam deklaris eĉ perdita,
Ankoraŭ tie staras. — Mi rigardas
Kaj vidas, ke ĝi tute ne jam estas
Perdita!

NATAN

Jen por vi eltroviĵo!

HAFI

Li nur bezonis movi per la reĝo
Al la soldato, kaj — se mi nur povus
Al vi ĝin montri!

NATAN

Ho, mi vin ja kredas!

HAFI

La tur' libera estus, kaj ŝi perdus.
Mi ĉion tion al li montri volas
Kaj lin alvokas.

NATAN

Sed li ne konsentas?

HAFI

Eĉ ne aŭskultas! Male: malestime
Li ĉion kuneĵetas!

NATAN

Ĉu do eble?

HAFI

Li diras, ke li volas esti mat'!
Li volas! Ĉu jen ludo?

NATAN

Certe ne!

Jen ludo per la ludo.

HAFI

Tamen ili

Ne ludis bagatele.

NATAN

Kio: mono?

Jen malgravaĵo. Sed vin tute ne
Aŭskulti! — Pri afero tiom grava
Vin tute ne aŭskulti! — Ne admiri
Vidsenton vian kvazaŭ ja aglecan!
Jen la venginda faro, ha! — Ĉu ne?

HAFI

Ja, ne! Mi tion nur rakontas, por ke
Vi vidu, kian kapon li posedas. —
Nu, unuvorte, mi ĝin ne eltenas!
Al ĉiuj kotaj maŭroj jen mi kuras,
Por vidi, kiu iom pruntedonos.
Mi, kiu por mi mem neniam petis,
Por li nun prunteprenu. Pruntepreni
Ne estas pli' ol almozpeti: same,
Tutsame kiel pruntedon' uzura

Nur estas ŝtelo. — Inter miaj anoj
 Ĉe l' Ganges mi ĉi ĉion ne bezonas,
 Eĉ ne peranto estas. — Ĉe la Ganges,
 Ĉe l' Ganges nur ekzistas homoj. Sed
 Ĉi tie vi nur sola estas inda,
 Vivadi ĉe la Ganges. — Ĉu vi volas? —
 Al li postlasu simple la rubaĵon
 De li celatan. — Iom li post iom
 Sen tio ĝin ja rabos. — Mi al vi
 Havigos delkon¹⁾. — Venu!

NATAN

Nu, mi pensas,

Ĉi ĉio restos ja por fari. — Sed
 Mi ĝin pripensos.

HAFI

Kio do? — Pripensi? —

Ne pripensote estas!

NATAN

Nur ĝis kiam

Mi de l' sultan' revenis; ĝis ke mi
 Adiaŭdiris...

HAFI

Kiu pripensadas,

Motivojn serĉas, por ne fari. — Kiu

Ne tuj decidas, vivi per si mem,

Jen kiu vivas sklavo de aliaj

Ĝis morto. — Tamen: kiel ajn! — Adiaŭ! —

Laŭ plaĉo agu. — Nia voj' disiĝas.

NATAN

Al-Hafi, ĉu antaŭe vi ne volas

Glatigi vian konton?

¹⁾ Vesto de derviŝo.

HAFI

Sensencaĵo!

La kaso kalkuladon ne valoras;

La konton garantios — vi kaj Sittah. (*Li foriras*)

NATAN

(postrigardante lin)

Mi garantios! — Bona, nobla, brava —

Do kiel mi lin nomu? — Vera reĝo

Nur sole estas vera almozulo!

(Li foriras aliflanken)

AKTO TRIA

1a SCENO

Ejo: en la domo de Natan.

RECHA kaj DAJA.

RECHA

Do kion, Daja, diris mia patro?
„Mi tuj atendu lin“? — Nu, tio sonas
— Ĉu ne? — ekzakte, kiel se li volis
Jam esti tie ĉi. — Kaj kiom jam
Da temp' de tiam pasis! — Ha, mi ne
Pripensu la pasintan tempon! — Mi
Nur vivu por momentoj la venontaj,
El kiuj unu ja venigos lin.

DAJA

La malbenita sendo de l' sultano!
Sen tio Natan certe estus tuj
Kunveniginta lin.

RECHA

Kaj se ĝi nun

Alvenis, la momento; kiam vere
Do realiĝis la dezir' plej varma,
Plej kora: kio poste?

DAJA

Kio poste?

Ho, mi esperas: poste ankaŭ mia
Dezir' plej varma realiĝos.

RECHA

Kio

En mia brust' ĝin poste anstataŭos?
Ĉar mi mallernis jam, vivadi sen
Dezir' de la deziroj. — Ĉu nenio?
Ho, mi ektimas! —

DAJA

Mia dezirogo

La faktiĝintan vian anstataŭos:
Deziro mia, scii en Eŭropo
En manoj vin, estantaj je vi indaj.

RECHA

Ho, vi eraras. — Kio tiun celon
Estigas via, ĝin malhelpas povi
Fariĝi mia. — Vin patrujo logas;
Kaj mia, mia min ne retenadu?
Bild' de la viaj, ne jam foriĝinta
El via kor', efikus pli ol tiuj
De mi videblaj kaj palpeblaj kaj
Aŭdeblaj, ol la miaj?

DAJA

Kontraŭstaru

Nur kiom ajn! — La voj' de Dio estas
La voj' de Dio! — Kaj se nu eĉ volus
Vin gvidi lia Di', por kiu li
Batalas, al la lando, la popol',
Por kiu vi naskiĝis, ĝuste per
Savinto via?

RECHA

Kion do vi celas?

Vi fakte havas viajn pli ol strangajn
 Ideojn! — „Lia Di', por kiu li
 Batalas!“ — Kies estas Dio? — Kia
 Do Dio al homido apartenas?
 Kaj por si devas bataligi? — Kiel
 Ni scias, por terbulo kia ni
 Naskiĝis, se ne estas por la sama,
 Sur kiu ni naskiĝis? — Ho, se l' patro
 Vin aŭdus! — Kial vi al mi do montras
 Feliĉon mian ĉiam malproksima
 De li? — Ho, kial vi do ĉiam miksas
 Kun floroj kaj herbaĉoj vialandaj
 La semon de racio, disĵetitan
 En mian koron tiel pura? — Daja,
 Li viajn florojn multkolorajn ja
 Ne volas sur la ejo mia! — Mi
 Mem sentas mian ejon elsuĉita,
 Senforta pro la floroj viaj, kvankam
 Ja ili belaj estas; jes, mi sentas
 Min kapturnita, surdigita per
 Ilia dolĉ-maldolĉa odorego. .
 Ja cerbo via pli pri ĝi kutimis.
 Mi tial ne mallaŭdas viajn nervojn
 Pli fortajn. Mi ĝin ne digesti povas. —
 Kaj eĉ anĝelo via! Preskaŭ li
 Ja ridindigis min. — Ankoraŭ min
 Hontigas antaŭ l' patro tiu farso!

DAJA

Nu? Farso? — Farso? — Ĉu nur vi posedas
 Prudenton? — Se mi rajtus diri...

RECHA

Ĉu vi

Ne rajtas? Kiam mi vin ne aŭskultis,
 Se vi bonvolis distri min per viaj
 Herooj religiaj? Ĉu mi ne
 Admiris ĉiam ties farojn kaj
 Proploris la suferojn? — Ja ilia
 Kredado ne al mi ekŝajnis la
 Plej heroeca el iliaj trajtoj.
 Des pli konsola estas la ideo,
 Ke nia humileco ne dependas
 De nia kredo je l' Plejalta. — Tio
 La patro tiom ofte al ni diris! —
 Pri tio eĉ vi mem ja tiom ofte
 Konsentis. — Kial sola vi subfosas
 Nun, kion vi komune ja konstruis? —
 Ho, Daja, jen ne temo por plej bone
 Atendi la amikon nian. — Jes,
 Por mi ĝi tia estas, ĉar por mi
 Ĝi estas valorega, sed ĉu li...
 Aŭskultu!... Ĉu ne estas nia pordo...?
 Se estus li! Aŭskultu!

2a SCENO

RECHA, DAJA kaj la TEMPLANO,
 al kiu iu malfermas la pordon de ekstere, dirante:

Do eniru!

RECHA

*(ektimiĝas, retranskviliĝas kaj volas falpuŝiĝi
 antaŭ liajn piedojn)*

Jen li! — Savinto mia!

TEMPLANO

Por eviti

Ĉi tion, mi nur venis nun; sed...

RECHA

Mi

Ĉe l' piedoj de ĉi tiu fiera viro
 Ja Dion volas danki, ne la viron.
 La vir' ne volas dankon, tiom, kiom
 Ĝin la sitel' ne volas, kiu helpis
 Dum la estingo tiom laboreme.
 Ĝi lasis sin plenigi, malplenigi
 Indiferente: same ja la viro.
 Li ankaŭ enpuŝiĝis en la fajron.
 Hazarde mi en liajn brakojn falis;
 Hazarde mi sur la mantelo restis,
 En liaj brakoj kvazaŭ fajr-ereto,
 Ĝis ke nin ambaŭ, mi ne scias kio,
 Reĵetis el la ardo. — Kio jen
 Dankinda? — En Eŭrop' la vino kaŭzas
 Aliajn farojn eĉ. — Templanoj devas
 Ja tiel agi, ili devas savi
 El fajro kaj el akvo kiel bone
 Dresitaj hundoj.

TEMPLANO

(mire kaj maltrankvile observante sin)

Daja, Daja, ho!

Se, en momentoj de ĉagren' kaj galo,
 Humoro mia malbontraktis vin:
 Do kial vi ripetis al ŝi ĉiun
 Stultaĵon, kiun mia lang' eligis?
 Jen tro senteblo venĝo, kara Daja!
 Sed antaŭ ŝi de nun almenaŭ pledu
 Por mi pli bone.

DAJA

Via moŝto, mi
 Esperas, ke pikilo la malgranda,
 Ĵetita en koreton ŝian, vin
 Ne malutilis tro.

RECHA

Vi ĉagreniĝis?
 Kaj estis pli avara pri l' ĉagreno
 Ol pri la viv'?

TEMPLANO

Infano bona, ĉarma!
 Ho, kiom diferencas ja la vid-
 Kaj la aŭdsento! — Jen ne la knabino,
 Ne! jen ne ŝi, de mi savita el
 La fajro. — Kiu — ŝin konante — ne
 Ŝin savus el la fajro? — Kiu estus
 Min atendinta? — Sed la timo... tamen...
 Ja aliigas...
(Paŭzo, dum kiu li enpense rigardas ŝin)

RECHA

Sed vi restis sama!
(Same; ĝis kiam ŝi daŭrigas, rompante lian miran rigardadon)
 Nun, via moŝto, diru, kie vi
 Dumtempe estis. — Preskaŭ mi demandus:
 Kaj kie nun vi estas?

TEMPLANO

Nun? Nu, kie
 Mi eble ne troviĝi devus. —

RECHA

Kaj
 Vi estis? — Eble ankaŭ, kie vi
 Ne devis? — Jen ne bone!

TEMPLANO

Sur... sur...? Kiel

La mont' nomiĝas? — Sinai!

RECHA

Ha, bone!

Do nun fidinde mi ekscii povas,
Ĉu fakte...

TEMPLANO

Kio? Kio do? Ĉu fakte

Ankoraŭ tie estas eble, vidi
La lokon, kie antaŭ Di' Moseo...

RECHA

Ne tio! Ĉie antaŭ Di' li staris!
Pri tio mi sufiĉe scias. — Mi
De vi volonte aŭdus, ĉu laŭfakte
Eĉ estas malpli malfacile, grimpi
Sur tiun monton, ol malsupren iri? —
Ĉar vidu: ĉiufoje, kiam mi
Grimpadis supren, estis male. — Nu?
Nu, kio? — Vi deturnas vin de mi?
Ne volas vidi min?

TEMPLANO

Mi vin nur aŭdu!

RECHA

Ĉar vi ne volas lasi vidi min,
Ke vi priridas mian sensaĝecon;
Ke vi ridetas, ĉar nenion mi
Pli gravan scias vin demandi pri
La mont' plej sankta. — Ne?

TEMPLANO

Mi do

Denove vidu en okulojn viajn. —
Nun ilin vi mallevas? Vi subpremas

Rideton? Mi nun volus legi el
 Mieno via pridubebla, kion
 Mi aŭdas tiom klare, kion vi
 Aŭdeble diras. — Vi silentas? — Recha!
 Li prave diris: „Ho, nur konu ŝin!“

RECHA

Pri kiu? — kiu — tion diris?

TEMPLANO

„Ho,
 Nur konu ŝin!“ — min diris via patro;
 Pri vi li diris.

DAJA

Ĉu ne ankaŭ mi?
 Ne ankaŭ mi?

TEMPLANO

Sed kie li nun restas?
 Do kie estas via patro? Ĉu
 Ankoraŭ ĉe l' sultan'?

RECHA

Sendube.

TEMPLANO

Fakte?
 Ho, mi forgesemulo! — Ne! Li tie
 Ne estas plu! — Li min ĉe l' monaĥejo
 Atendas. Certe! — Tion reciproke
 Ni ja aranĝis, mi ekpensas. — Tuj
 Mi lin renkontu!

DAJA

Jen afero mia.
 Restadu, via moŝto; mi rapidu.

TEMPLANO

Ne, ne! Li ja atendas min persone,
 Ne vin. — Cetere ... eble ... kiu scias? ...
 Li eble ĉe l' sultan' ... Vi ja ne konas
 Sultanon! ... Eble li embarasiĝis ...
 Ho, kredu min, danĝere povos esti,
 Se mi ne iros.

RECHA

Kia do danĝero?

TEMPLANO

Danĝer' por mi, por vi, por li, se mi
 Ne forrapidas! (*Li eliras*)

3a SCENO

RECHA kaj DAJA.

RECHA

Kio estas, Daja?

Jen tiom urĝe? — Kion li ekcelas?
 Do kio lin kurigas?

DAJA

Lasu lin!

Jen ne malbona signo.

RECHA

Kia signo?

DAJA

Pri tio, ke interne io bolas
 Kaj ne transboli devas. — Lasu lin.
 Nun venas via vico.

RECHA

Mia vico?

Nun mi vin ambaŭ ne komprenas!

DAJA

Baldaŭ

Vi povos venĝi vin pro l' ekscitiĝo.
 Al vi de li igita. Sed ne estu
 Nun tro severa kaj ne tro venĝema.

RECHA

Vi mem ne scias, kion vi parolas.

DAJA

Ĉu do vi ree estas tute kalma?

RECHA

Mi estas; jes, mi estas...

DAJA

Sed konfesu,

Ke vin ĝojigas lia malkvieto;
 Ke vi al lia malkvieto dankas
 La kalmon vian nunan.

RECHA

Mi ne scias.

Plej eble mi konfesi povus, ke
 Min — min mirigas, ke post tia bruo
 En mia kor' subite regi povas
 Kalmeco tia. — Lia plena vido,
 Parol', konduto min...

DAJA

Satigis jam?

RECHA

Satigis? Tion mi ne diru! Ne!
 Ho, tute ne!

DAJA

Ĝi nur forigis la —

La malsategon.

RECHA

Bone, se vi volas.

DAJA

Ho ne, mi tute ĝin ne volas!

RECHA

Mi

Lin ĉiam ŝatos, eĉ pli multe ŝatos
 Ol mian vivon: kvankam mia puls'
 Per lia nura nom' ne jam ŝanĝiĝas;
 Ne plu la kor', se mi pri li ekpensas,
 Pli forte, pli rapide batas. — Kion
 Mi nun babilas? — Venu al fenestro
 La palmojn rigardanta.

DAJA

Sekve tamen

La malsatego ne forestas tuta.

RECHA

Nun ja la palmojn ree mi perceptos:
 Ne nur sub palmoj lin.

DAJA

Malvarmo tiu

Verŝajne novan febron komencigas.

RECHA

Malvarm'! Nu, ne! — Ja ne malpli volonte
 Mi vidas, kion mi kviete vidas!

4a SCENO

Ejo: Aŭdienca ĉambrego en la palaco de Saladin.

SALADIN kaj SITTAH.

SALADIN

(envenante, parolante en la direkto al la pordo)

La jud' eniru, kiam li alvenos.
Li ŝajne ne tro multe rapidegas.

SITTAH

Li eble ne jam preta estis, aŭ
Ne tuj trovebla.

SALADIN

Franjo!

SITTAH

Vi kondukas

Ja kvazaŭ antaŭ la batal'.

SALADIN

Batalo

Per batalilo ne al mi kutima.
Mi submetiĝu, ektimigu, eĉ
Kaptilojn metu, ankaŭ falglitigu.
Ho, kiam mi ĝin povis? Kiam mi
Ĝin lernis? — Kaj pro kio mi ĝin devas? —
Pro kio? — Por ekkapti monon! Por
El judo elperforti monon! Monon!
Jen fine mi aplikas tiajn ruzojn,
Por ekricevi el la bagateloj
La plej malgrandan!

SITTAH

Ĉiu bagatelo

Tro evitita punas!

SALADIN

Bedaŭrinde!

Kaj se la judo estas tiu bona,
Prudenta viro, kia lin antaŭe
Priskribis la derviŝ'?

SITTAH

Ne grave, tamen!

Do kio estos? — Vi kaptilon metos
Ja nur por la avara, singardema,
Timema judo; ne por la boneca,
Nek saĝa viro. Tiu ĉi jam estas
La nia sen kaptilo. — La plezuron,
De tia viro aŭdi elturniĝon:
Per kia fort' kuraĝa li disŝiras
Tuj la ŝnuregojn, aŭ per kia ruza
Singardo li sukcesas, eĉ eviti
La retojn: tiun plezuregon vi
Ja krome havos.

SALADIN

Estas vere. — Tio

Min jam ĝojigas.

SITTAH

Sekve vin nenio

Ja embarasi povas. Ĉar se estas
El la amaso unu, se li estas
Nur judo kiel judo: kontraŭ tia
Vi ja ne hontos ŝajni tia, kiel
Li ĉiujn imagadas? Male: kiu
Al li pli bone ŝajnas, al li ŝajnas
Stultulo, dando.

SALADIN

Mi do eĉ malbone

Agadu, por ke l' malbonulo ne
Pri mi malbonon pensu?

SITTAH

Se vi nomas

Tiele: ĉion uzi laŭ merito.

SALADIN

Ĉu ion jam elpensis kap' virina,
Ne mem juĝante ĝin favore?

SITTAH

Frato!

SALADIN

Mi timas nur, ke la delikataĵo
En mia man' mallerta disrompiĝos!
Afero tia estu praktikata
Samkiel elpensita: ruze, lerte.
Sed kiel ajn! Mi dancos, kiel mi
Scipovas. — Mi preferus ja, ĝin povi
Eĉ malpli bone.

SITTAH

Vin ne tro malfidu!

Mi garantias! Se vi nur bonvolas! —
Ke viroj viaspecaj ĉiam volas
Kredigi nin, ke nur ilia glavo,
Kaj nur la glavo ilin sukcesigis!
Leono ja, ĉasante kun la vulpo,
Pro l' vulpo hontas, sed ne pro la ruzo. —

SALADIN

Kaj ke virinoj ĉiam nur klopodas,
Malsupren tiri viron! — Nu, sufiĉas! —
Mi kredas scii mian lecionon.

SITTAH

Mi iru for?

SALADIN

Ĉu vi restadi volis?

SITTAH

Ne resti ja . . . ne resti ja videbla . . .
Sed en apuda ĉambro . . .

SALADIN

Por aŭskulti?

Ne, franjo, eĉ ne tion, mi vin petas. —
For, for! — Susuras la kurten'! — Li venas! —
Kaj ne apude restu! — Mi kontrolos!
(*Ŝi iras tra unu pordo. Natan envenas tra alia kaj
Saladin estas sidiĝinta.*)

5a SCENO

SALADIN kaj NATAN.

SALADIN

Envenu, jud'! — Alvenu, tutproksimen!
Sen timo!

NATAN

Al la malamikoj timon!

SALADIN

Vi estas Natan?

NATAN

Jes.

SALADIN

La saĝa Natan?

NATAN

Ne!

SALADIN

Se ne laŭ vi mem, sed laŭ popol'.

NATAN

Jes, eble laŭ popol'!

SALADIN

Ĉu vi do kredas,
Ke mi malŝatas de l' popol' la voĉon?
De longe mi deziris, koni viron,
De ĝi nomatan „la saĝul'!“

NATAN

Kaj se
Nur estus moko? Se por la popolo
„Saĝega“ estus „klera“? kaj eĉ „klera“
Nur, kiu bone kaptas la profiton?

SALADIN

Profiton veran, vi ja volas diri.

NATAN

En tiu kazo plejprofitemulo
Plej saĝa estus; kaj la samo: „saĝa“
Kaj „lerta“.

SALADIN

Vi ja pravas, kion vi
Refuti volas. — La profitojn verajn —
Eĉ nekonatajn de l' popol' — vi konas.
Almenaŭ vi klopodis, ilin koni,
Kaj vi pripensis ilin: tio sole
Estigas jam „saĝulon“.

NATAN

Kia ĉiu

Sin kredas esti.

SALADIN

Ne pli' da modesto!
Naŭzigas, ĉiam aŭdi modestaĵojn,
Se oni prudentaĵojn ja atendis. (*Li salte leviĝas*)
Al la afero! — Sed mi petas vin:
Malkaŝe, judo!

NATAN

Ho, sultan', mi volas
Vin servi tiel, ke estonte mi
Meritos plu la klientecon vian.

SALADIN

Min servi?

NATAN

Vi la plejbonaĵon havos
El ĉio; vi ĝin havos plej malkare.

SALADIN

Pri kio vi parolas? Mi esperas,
Ke ne pri varoj? — Ja kun vi marĉandos
Fratino mia. (Jen, subaŭdantino!) —
Ne al la komercisto mi min turnis.

NATAN

Do vi sendube volas scii, kion
Dumvoje mi rimarkis aŭ renkontis
De l' malamiko, kiu removiĝas? —
Nu, se malkaŝe mi paroli devas...

SALADIN

Ne, ankaŭ tion mi kun vi ne celis...
Pri tio mi jam scias, kion mi
Bezonas. — Unuvorte...

NATAN

Do ordonu.

SALADIN

Mi volas, ke vi min instruu pri
Afer' alia, tutalia. — Ĉar vi
Ja estas tiom saĝa: al mi diru —
Do kia leĝo, kia religio
Plej saĝa al vi ŝajnas?

NATAN

Ho, sultan',

Mi judo estas!

SALADIN

Kaj mi islaman'.

Kristan' troviĝas inter ni. — De tiuj
 Tri religioj unu nur ja povas
 La ĝusta esti. — Viro kiel vi
 Ne haltas tiĉ, kien ĵetis lin
 Hazardo de naskiĝ'; kaj se li haltas,
 Li haltas pro prudent', pro kaŭzoj, pro
 Elekto de l' plejbono. Do sciigu
 La opinion vian. Al mi diru
 La kaŭzojn, kiujn mi ne havis tempon
 Elserĉi. Lasu — konfidence! — scii
 La kaŭzojn de la opinio, por ke
 Mi faru ilin miaj. — Natan, nu?
 Vi taksas min observe? — Vi hezitas? —
 Unua mi sultano eble estas
 Kun tiaj kapricetoj, tamen ne
 Malindaj nepre je sultano, kiel
 Mi opinias. — Nu? Ĉu jes? — Parolu!
 Do diru! — Aŭ ĉu vi por pripensadi
 Bezonas momenteton? — Mi konsentas. —
 (Ĉu ŝi subaŭdas? Tuj mi ŝin demandu,
 Por aŭdi, ĉu mi prave agis!) — Nu?
 Pripensu! Jes! Mi ne hezitos, tuj
 Reveni.

(Li iras en la apudan ĉambron, en kiun antaŭe iris Sittah)

6a SCENO

NATAN

(sola)

Hm! Hm! — Strange! — Kion do Mi sentas? — Kion li deziras? — Mi Jam kredis: monon, kaj li volas veron! Kaj volas ĝin kontanta, brila — kvazaŭ La ver' monero estus! — Ja, se ĝi Moner' malnova estus, elpesita! — Jes, tiam estus eble! — Sed ĝi ja Moner' ne estas denombrebla kaj Farebla per stampil'. — Ĉu oni povas La veron enkapigi, kiel oni Monerojn enpoŝigas? — Kiu nun Do estas judo? — Li aŭ mi? — Aŭ ĉu Li eble ne deziras veran veron? — Sed la suspekto, ke por li la vero Kaptil' nur estas, ŝajnas tro malnobla. — Malnobla? — Kio por nobelo estas Malnobla? — Jes, sed li demandis min Tro rekte! — Oni ja unue frapas, Amike alproksimiĝante. — Mi Singarde estu! — Tamen: kiel? — Nu, Ne eble estas, ŝajni tro jud-juda. — Kaj malpli eble, ŝajni eĉ maljuda. — Ĉar: „Se ne judo“, li demandi povus; „Kaj kial do ne islamano?“ — Jen! Jen la eliro! — Ne nur por infanoj Fabeloj taŭgas. — Jen li! — Ha, li venu!

7a SCENO

SALADIN kaj NATAN.

SALADIN

(Ŝi ne subaŭdas!) — Ĉu mi nun revenas
Tro frue? — Ĉu vi finis meditado? —
Parolu do! Neniu nin aŭskultas.

NATAN

Kaj tamen nin la tuta mondo aŭdu!

SALADIN

Vi tiom certa estas pri l' afero?
Jen vera saĝegul', neniam veron
Kaŝanta! sed por ĝi riskanta ĉion!
La vivon kaj la korpon! Sangon kaj
Havaĵon!

NATAN

Se necese estas kaj

Utile.

SALADIN

Mi de nun esperi povas,
Ke prave mi meritas unu el
Titoloj miaj: „De la mond' kaj leĝo
Pliboniganto“.

NATAN

Jen titolo bela!

Sed antaŭ ol eldiri ĉion, vi
Permesu, moŝto, ke mi historion
Rakontu.

SALADIN

Kial ne? Mi ĉiam estis

De bone rakontitaj historioj
Amiko.

NATAN

Bone rakontadi . . . nu,

Jen ne afero mia.

SALADIN

Ĉu do ree

Fier-modesta? — Tuj al mi rakontu!

NATAN

En temp' nememorebla viro vivis

En oriento; ringon altvaloran

De mano kara li posedis. — Ŝtono,

Opal', enestis centkolora, kiu

Sekretan forton havis: ĝi estigis

Agrabla antaŭ Di' kaj homoj la

Kun fido ĝin portantan. — Ne mirige,

Ke tial ĝin la vir' en oriento

Neniam metis for kaj testamentis,

Ke en la gento ĝi eterne restu.

Do jene: li postlasis sian ringon

Al plejamata inter siaj filoj

Kaj testamentis: ankaŭ tiu lasu

La ringon al la plejamata filo;

Kaj tiu poste ĉiam estu kapo

Kaj princ' de l' famili' — nur pro la ringo,

Ne laŭ la leĝo de l' naskiĝo. — Ĉu

Vi min komprenas?

SALADIN

Mi komprenas vin!

NATAN

La ringo venis do — de fil' al filo —

Al patro, fine, de tri filoj, kiuj

Egale ĉiuj estis obeemaj,

Kaj kiujn ĉiujn tri li povis nur

Egale ami. — Nur de temp' al tempo

Jen tiu, jen ĉi tiu, jen la tria —
 Laŭ tio, ĉu li estis sola kun
 La unu, kaj la du aliaj ne
 La patran koron tuŝis — al li ŝajnis
 Pli inda je la ringo tiel, ke
 Al ĉiu li la ringon ekpromesis. —
 Ja certan tempon tio funkciadis. —
 Sed morto venas kaj la bonan patron
 Ekembarasas. — Lin doloras, ke
 Li igos ĉagreniĝon al du filoj,
 Fidintaj lian vorton. — Kion fari? —
 Sekrete li artiston alvenigas.
 Kaj mendas laŭ model' de sia ringo
 Aliajn du, kaj ne ŝparigas monon
 Nek penon, por ke ili ja similu,
 Similu nepre al la unu. — Nu,
 Sukcesas la artist'. — Kaj kiam li
 Alportis la tri ringojn, eĉ la patro
 Ne konas la modelon. — Ĝoje li
 Alvokas siajn filojn, ĉiun sola,
 Al ĉiu sola donas sian benon —
 Kaj ringon — kaj formortas. — — Ĉu vi aŭdas?

SALADIN

(kiu konsternite forturniĝis)

Mi aŭdas, jes! — Sed baldaŭ la fabelon
 Jam finu! — Ne hezitu plu!

NATAN

Mi finis;

La sekvo ja memkomprenebla estas. —
 Tuj post la mort' de l' patro ĉiu filo
 Alvenas kun la ring' kaj volas esti
 La princ' de l' famili'. — Esplor', disputo,
 Plendado. — Vane: ne montrebla estis
 La ring' malfalsa.

(Post paŭzo, dum kiu li atendas la respondon de la sultano)

Same nemontrebta

Al ni la religi' malfalsa estas!

SALADIN

Ĉu jen respondo al demando mia?

NATAN

Ĝi nur min senkulpigu, se mi ne
Kuraĝas diferenci la tri ringojn,
Faritajn — laŭ ordon' de l' patro — por ke
Ne estu eble, ilin diferenci.

SALADIN

La ringojn! — Ne min moku! — Ho, mi pensas,
Ke la tri religioj, kiujn mi
Menciis, estas bone distingeblaj.
Ne esceptite eĉ nutraj' kaj vestoj.

NATAN

Sed sole ne rilate la kialojn.
Ĉu Histori' ne ĉiujn ja kialis?
Tradiĉita aŭ skribita. — Kaj
La Historio estu akceptata
Kun kredo kaj kun fido. — Aŭ ĉu ne?
Nu, do al kiuj oni pleje kredas
Kaj fidas? Ĉu ne estas ja la siaj?
La samsanguloj? Ĉu ne estas tiuj
Do, kiuj sian amon al ni pruvis
De infaneco? kiuj nin trompetis
Nur kiam tromp' kuraca por ni estis? —
Do kial mi prapatrojn miajn kredu
Eĉ pli malmulte ol vi miajn? aŭ inverse: —
Ĉu mi de vi postuli povas, ke
Vi antaŭulojn viajn ne plu kredu
Por ne kontraŭi miajn? — Aŭ inverse. —
Rilatas samo al kristan'. — Ĉu ne?

SALADIN

(Je la Plejalta! Jes, li estas prava!
Mi ekmutiĝu!)

NATAN

Ni do reparolu
Pri miaj ringoj. — Kiel jam dirite:
La filoj plendis, al juĝisto ĵuris,
Ke ĉiu de la patro mem senpere
Ricevis sian ringon — kiel vere! —,
Antaŭe jam havinte la promeson,
Ke li de l' ring' privilegion havos. —
— Eĉ tio estis laŭ la ver'! — La patro,
Asertis ĉiu, certe kontraŭ li
Ne estis malverema. Kaj — anstataŭ
Permesi tian pri la kara patro
Suspekton — li akuzas siajn fratojn,
Pri kiuj li nur pensis la plejbonon,
Pro falsa ago; kaj li certe trovos
La perfidulojn kaj li sin venĝegos.

SALADIN

Kaj la juĝisto? — Mi deziras scii,
Kiele vi l' juĝiston paroligos.

NATAN

Ĉi tiu diris: „Nu, se vi ne baldaŭ
Ĉeigos vian patron, mi forigos
Vin de ĉe mi. — Ĉu vi do opinias,
Ke mi enigmojn solvu? Aŭ ĉu vi
Atendas, ĝis la ĝusta ring' parolos? —
Sed halt'! Vi diras, ke la ĝusta ring'
La sorĉan forton havas, amatigi
Kaj agrabligi antaŭ Di' kaj homoj.
Decidu tio! Ĉar la falsaj ringoj
Ne tion povos. — Kiun pleje amas

Du inter vi? — Parolu! — Vi silentas? —
 La ringoj reen nur efikas? Ne
 Eksteren? — Ĉiu pleje nur sin mem
 Do amas? — Sekve ĉiuj tri vi estas
 Trompitaj trompemuloj! Viaj ringoj
 Ja ĉiuj estas falsaj. Ring' la ĝusta
 Perdiĝis konjekteble. Kaj por kaŝi,
 Por anstataŭi, via patro unu
 Por tri fabrikatigis.“

SALADIN

Ho, bonege!

NATAN

„Kaj“, la juĝist' daŭrigis, „se vi ne
 Konsilon volas nur anstataŭ juĝo:
 Foriru! — Sed konsilo mia tekstas:
 Pri la afero kontentiĝu! Ĉiu
 El vi la ringon de la patro havas;
 Do ĉiu konsideru sian ringon
 La ĝusta. — Eble via patro volis
 Ne plu toleri en la familio
 La tiranecon de nur unu ringo! — Kaj
 Li certe vin amegis ĉiujn tri
 Kaj sammezure, kaj ne volis premi
 Du, por preferi unu. — Jen la solvo!
 Kaj ĉiu nun sen antaŭjuĝo pruvu
 La amon sian sen influiteco!
 Kaj ĉiu inter vi nun vetklopodu,
 Elmontri l' forton de la ŝtono en
 La ringo. Helpu al la forto per
 Bonfaro, bonkoreco, pacemeco
 Kaj pleja devoteco antaŭ Dio!
 Kaj se de l' ŝton' la forto videbliĝos
 Estonte ĉe pra-pra-infanoj viaj:

Ja tiam ilin ree mi invitos
 Al mi post mil' kaj mil' da jaroj. Tiam
 Pli saĝa vir' ol mi ĉi tie sidos
 Kaj juĝos. — Iru for!“ — Ĉi tion diris
 Juĝisto mia.

SALADIN

Dio!

NATAN

Saladin,

Se vi supozas, esti tiu viro
 Pli saĝa, profetita...

SALADIN

*(kiu precipitas¹⁾ al li kaj ekkaptas lian manon, kiun li
 ne lasas ĝis la fino)*

Mi neniom?

Mi polvo? — Dio!

NATAN

Kio?

SALADIN

Natan, kara Natan!

La mil-mil jaroj de juĝisto via
 Ne pasis jam, kaj lia juĝo-seĝo
 Ne estas mia. — Iru for! — Sed estu
 Amiko mia!

NATAN

Krome Saladin

Nenion volas?

SALADIN

Ne.

NATAN

Ne?

SALADIN

Ne! — Kaj kial?

¹⁾ precipiti al = G: sich stürzen auf; F: se précipiter à; A: to precipitate

NATAN

Mi krome aldeziris la okazon
Por ion peti.

SALADIN

Ĉu por ion peti
Okazon vi bezonas? — Nu, parolu!

NATAN

Mi de vojaĝo longa venas, kaj
Mi enkasigis ŝuldojn. — Preskaŭ mi
Tro multan monon havas. — Komenciĝas
Danĝere esti. — Kaj mi nun ne scias,
Sekure meti ĝin. — Mi pensis, ĉu
Ne eble vi... — Proksima militiro
Postulas ĉiam multan monon, kaj
Vi eble ĝin bezoni povos.

SALADIN

(fikse rigardante en liajn okulojn)

Natan! —

Mi ne demandi volas, ĉu Al-Hafi
Jam ĉe vi estis — kaj mi ne esploros,
Ĉu ne suspekto ia vin instigas,
Memvole ĝin proponi...

NATAN

Ĉu suspekto?

SALADIN

Mi tian ja meritas! — Nu, ne helpas!
Pardonu! — Mi konfesu: mi intencis...

NATAN

Ĉu, fakte, tion saman min demandi?

SALADIN

Jes, efektive!

NATAN

Tio ĉi ja helpus

Al vi kaj mi samtempe! — Sed mi ne
La tutan monon al vi sendi povas
Pro la Templano juna. — Vi ja ankaŭ
Lin konas. — Mi al li alian ŝuldon
Antaŭe pagi devas.

SALADIN

Al Templano?

Ĉu vi per via mon' do helpi volas
Al miaj malamikoj plej grandegaj?

NATAN

Mi ja parolas nur pri ununura
De vi indulgumita...

SALADIN

Ha, pri kio

Vi memorigas min! — Mi eĉ forgesis
Junulon tiun! — Vi lin konas?

NATAN

Kio?

Vi do ne scias, ke per via bono
Al li, per li min tiom trafis? — Li,
Riskante sian vivon nov-donitan,
Filinon mian savis el la fajro.

SALADIN

Li? Li ĝin faris? Tion mi ja kredas
Pri li! — Jen far' laŭ mia frato, tiom
Al li simila. — Ĉu li do ankoraŭ
Ĉeestas? — Lin venigu! — Mi al Sittah
Parolis tiom pri la frato, kiun
Ŝi jam ne konis, ke mi ankaŭ devas
Al ŝi vidigi lian homportreton! —
Venigu lin! — El unu bona faro,

Naskita tamen el pasio nura,
 Elsekvi tiom da bonfaroj povas!
 Venigu lin!

NATAN

(lasante la manon de Saladin)

Jes, tuj! — Pri la alio
 Vi ja konsentas. *(Li foriras)*

SALADIN

Kial mi ne lasis
 Aŭskulti la fratinton? — Tuj al ŝi! —
 Sed kiel mi rakontu ĉion tion? *(Li foriras aliflanken)*

8a SCENO

*Ejo: sub la palmoj, proksime de la monaĥejo,
 kie la TEMPLANO atendas NATAN-on.*

TEMPLANO

*(iras tien kaj reen, kombatante¹⁾ en si mem, ĝis kiam
 li eksplodas)*

Ĉi tie lace haltas la viktimo. —
 Nu bone! Mi ne volas, volas scii,
 La enan senton, nek antaŭe flari
 La estontaĵon. — Mi forkuris vane!
 Jes, vane! — Krom forkuri mi ja povis
 Nenion fari. — Venu kio ajn!
 Por ĝin eviti, venis tro rapide
 La okazaĵo, kiun tiel longe
 Mi penis nerenkonti. — Vidi ŝin,
 Kun kiu mi ne celis revidiĝon, —
 Ŝin vidi kaj decidi, ŝin neniam
 Forlasi el la vid' — Decidi? Kio?

¹⁾ kombati = G: kämpfen; F: combattre; A: to combat; I: combattere.

Decidi estas far', intenco; mi,
Mi nur suferas. — Vidi ŝin kaj senti
Min tuj al ŝi plektita kaj teksita,
Nur unu estis, — restis. — Vivi
De ŝi apartigite estas morto
Por mi kaj nepenseble — kaj eĉ morto
Post nia morto, kie ajn ni estos. —
Jen amo! Jes, Templano tiel amas —
Kristano tiel amas judidinon.
Hm! — Kiel ajn! Mi en la sankta lando —
Pro tio eĉ por mi eterne sankta! —
Formetis multe jam da antaŭjuĝoj. —
Kaj la ordeno? La Templano mortis,
Li mortis en moment' lin estiganta
Kaptito de l' sultano Saladin.
Ĉu do la kapo, donacita de l'
Sultan' la sama estas? — Estas nova,
Neniom plu scianta pri la aĵoj
Al tiu parolitaj. — Estas eĉ
Pli bona, por la patra Ĉiel' farita. —
Mi tion sentas: mi per ĝi nur pensas
Samkiel certe pensis mia patro,
Se ne pri li fabelojn oni nur
Al mi mensogis. — Ĉu fabelojn? — Jes;
Sed tre kredeblajn, kiuj pli kredeblaj
Neniam al mi ŝajnis, ol nun kiam
Mi ekfaletas, kie li falegis. —
Ĉu li falegis? — Mi preferas fali
Kun viroj al staradi kun infanoj.
Li pro modelo sia min aplaŭdos.
De kiu mi aplaŭdon celas? — Natan? —
Ho, tiu certe ja instigos min
Pli multe ol aplaŭdos. — Kia judo! —

Kaj li nur tuta volas ŝajni judo! —
Jen li! — Li kuras pro sereno arda. —
Neniu de l' sultan' alie venis! —
He! Natan!

9a SCENO

NATAN kaj la TEMPLANO.

NATAN

Estas vi?

TEMPLANO

Vi restis

Tre longatempe ja ĉe Saladin.

NATAN

Ne tro! Sed oni min retenis troe
Dum la aliro. — Vere, Kurd, la viro
Meritas sian gloron. — Lia gloro
Nur estas lia ombro. — Sed unue
Mi diru...

TEMPLANO

Nu?

NATAN

Li volas vin paroli,
Vi senprokraste al li venu. — Nur
Min akompanu hejmen, kie mi
Por li disponu ion. Poste ni
Al li tuj iru.

TEMPLANO

Natan, mi revenos
En vian domon ne pli frue, ol...

NATAN

Vi do jam dume tie estis? — Vi
Kun ŝi parolis jam? — Nu? — Diru: kiel
Do Recha al vi plaĉas?

TEMPLANO

Nedireble! —

Sed — ŝin revidi — mi neniam volos!
Neniam! — Aŭ vi tuj al mi promesas,
Ke mi por ĉiam, ĉiam povos ŝin
Revidi.

NATAN

Kiel do mi tion ĉi
Komprenu?

TEMPLANO

(post longa paŭzo ekfalante al lia kolo)
Patro!

NATAN

Nu, junul'!

TEMPLANO

(same, lasante lin)

Ne filo? —

Mi petas, Natan! Ho!

NATAN

Junulo kara!

TEMPLANO

Ne filo? — Mi vin petas, vin petegas
Je la ligil' unua de natur' —
Al ĝi ligilojn postajn ne preferu! —
Do kontentiĝu, esti homo! — Min ne
Forpuŝu!

NATAN

Amikego ...!

TEMPLANO

Kaj ne filo?

Ne filo? — Eĉ ne tiukaze, se
Dankemo jam trabatis por la amo
La vojon al la koro de l' knabino?
Eĉ tiukaze ne, se ambaŭ nur
Atendas signon por la kunfandiĝo?
Parolu!

NATAN

Vi mirigas min, junulo!

TEMPLANO

Mi vin mirigas? — vin mirigas, Natan,
Per via propra penso? — Ĉu vi ĝin
Malkonas do en mia buŝo? — Mi
Mirigas vin?

NATAN

Jes! Antaŭ ol mi scias
Almenaŭ, kia Staŭffen via patro
Estadis!

TEMPLANO

Natan, kion vi eldiras?
En tiu ĉi moment' vi scivolemon
Nur sentas?

NATAN

Vidu: iam mi konadis
Mem unu Staŭffen, kiu nomis sin
Ja Konrad.

TEMPLANO

Kaj se eble mia patro
Sin nomis tiel same?

NATAN

Efektive?

TEMPLANO

Mi mem min nomas ja laŭ mia patro: Kurd
Ja estas Konrad.

NATAN

Tamen — mia Konrad
Ne estis via patro; mia Konrad
Templano estis kiel vi — do fraŭla.

TEMPLANO

Nu, tamen . . . !

NATAN

Kio?

TEMPLANO

Tamen: mia patro
Li povus esti.

NATAN

Ŝajnas, ke vi ŝercas.

TEMPLANO

Vi vere estas tro ekzakte! — Kial
Do ne? — Nu, jen hibrido aŭ bastardo! —
La raso ankaŭ estas atentinda!
Sed ne demandu pri prapatroj miaj!
Min ankaŭ viaj ja ne interesas.
Sed tamen: ho, mi tute ja ne dubas
Pri via listo familia. — Dio!
Vi povas nom' post nomo ĝin denombri
Ĝis Abraham. Kaj antaŭ tiu viro
Mi mem ĝin konas kaj priĵuri povus.

NATAN

Vi maldolĉiĝas! — Ĉu vi estas justa? —
Ĉu mi rifuzis ion? — Mi ja nur
Ne volis tuj ekkapti vian vorton.
Nenion krome.

TEMPLANO

Jes? — Nenion krome?

Pardonu do!

NATAN

Kunvenu, venu!

TEMPLANO

Kien?

En vian domon? — Ne! — Ne tion! — Ne!

En ĝi ja brulas! — Mi ĉi tie restos. —

Se mia sorto volos: mi ŝin vidos

Sufiĉe ofte plu. — Se ne: mi jam

Ŝin vidis tro.

NATAN

Mi pleje rapidiĝos.

10a SCENO

La TEMPLANO kaj baldaŭ poste DAJA.

TEMPLANO

Mi tro jam vidis ŝin. — La homa cerbo

Enhavipova tiom estas; tamen

Ĝi ofte eke estas plena. — Plena

Je neniaĵo. — Sed neniom taŭgas!

Ĝi se je kio ajn ĝi plena estas. —

Pacienciĝu! — La animo baldaŭ

La ŝvelitaĵon kunemiksos kaj

Estigos spacon: ordo, lum' revenos. —

Ĉu mi unuafoje amas? — Aŭ

Ĉu la antaŭa am' ne estis amo? —

Ĉu mi nur amas nun?

DAJA

(kaŝe alveninte de flanke)

Pst! via moŝto!

TEMPLANO

He, kiu vokas? — Daja, vi?

DAJA

Jes, mi

Ŝteliris preter li. — Sed tamen li
Nin vidi povus, kie vi nun staras. —
Do proksimiĝu. — Venu post la arbon.

TEMPLANO

Nu, kio estas? — Tiel sekrete?

DAJA

Rilatas fakte al sekreto, kio
Min alvenigas, jes: eĉ al duobla.
Nur mi la unu scias; la alian
Nur vi. — Ĉu ni do interŝanĝu?
Konfidu vian; kaj mi tuj konfidos
La mian.

TEMPLANO

Volontege. — Se mi nur
Jam scius, kian vi en mi supozas.
Sed tion eble via eksciigos.
Komencu do.

DAJA

Aj, vere? — Ne, sinjoro:
Antaŭe vi! mi poste. — Al mi kredu:
Neniom al vi taŭgos mia scio;
Se ne antaŭe vi parolis. — Do:
Rapide! — Mi do vin demandos: poste
Neniom vi konfidis. Kaj eĉ mia
Sekreto mia restos, kaj vi perdis
La vian. — Kompatinda moŝto! — Kiel
La viroj kredas, povi gardi tian
Sekreton antaŭ inoj!

TEMPLANO

Ofte mem ne

Sciante ĝin!

DAJA

Jes, eble. Tial mi

Antaŭe eĉ bonvolu vin sciigi

Pri ĝi. — Do estu! — Bone! — Al mi diru:

Pro kio — kvazaŭ el aer' al tero —

Vi malaperis? — Kial vi tiele

Nin lasis? — Kial nun vi ne revenas

Kun Natan? — Ĉu do tiom ete Recha

Je vi efikis? Nu? — Aŭ tiom ege?

Jes! Tiom ege! — Ha, vi min instruu

Pri la barakto de la kompatinda

Birdeto eniĝinta en kaptilon!

Nu, unuvorte: Vi pli bone tuj

Konfesu, ke vi amas ŝin, freneze;

Kaj mi rakontos...

TEMPLANO

Nu, freneze? Vi

Ja kompetenta ŝajnas.

DAJA

Nur konfesu

La amon. — Pri l' frenezo mi ne volas

Persisti.

TEMPLANO

Ĉar ne estas pridubeble?

Templano, kiu amas judidinon! —

DAJA

Jen kio ŝajnas ja sensenca. — Tamen

Afer' enhavas ofte pli da senco,

Ol ni supozas. Eble eĉ ne estas

Tro eksterordinare, ke l' Savinto
 Altiras nin per vojoj, kiujn eĉ
 Saĝulo ne paŝumus mem.

TEMPLANO

Nu? Tiom

Solene? — (Se mi dirus „singardemo“
 Anstataŭ „la Savinto“, ŝi ja pravus!) —
 Vi igas min pli scivolema, ol
 Mi ĝenerale estas.

DAJA

Jen la lando

De la mirakloj!

TEMPLANO

(Nu! — De l' mirindaĵoj!

Ĉu do alie povas esti? Ja
 La tuta mondo tie ĉi kunfluas.) —
 Nu, Daja: konsideru konfesita,
 Ke mi ŝin amas, ke mi ne komprenas
 Eĉ, kiel mi sen ŝi vivadu; ke...

DAJA

Jes? Fakte? — Do ekjuru, via moŝto,
 Ke vi ŝin faros via kaj ŝin savos!
 Ĉi tie tempe kaj eterne tie!

TEMPLANO

Kaj kiel? Kiel do mi povus ĵuri
 Pri io ekster mia pov'?

DAJA

Ĝi estas

En via pov'! Per unu vorto mi
 Estigas ĝin en via povo.

TEMPLANO

Tiel

Ke l' patro eĉ konsentos?

DAJA

Patro! Patro!

La patro devi devas!

TEMPLANO

Devas, Daja?

Li inter rabemulojn ne jam falis! —
Ne! Li ne devi devos.

DAJA

Do li volos

Ĝin voli kaj volonte.

TEMPLANO

Voli? kaj

Volonte? — Daja, sed se mi konfesas,
Ke mi jam mem ĉi tiun kordon tuŝi
Ekprovis?

DAJA

Nu? Kaj li ne tuj kunludis?

TEMPLANO

Per fuŝakordo li kunludis, kiu —
Insultis min!

DAJA

He, nu? — Vi videbligis

Ereton da dezir' pri Recha, kaj
Li pro ĝojeg' ne tuj leviĝis salte?
Frostece li eĉ retirigis? Li
La vojon baris?

TEMPLANO

Jes, pli-malpli tio.

DAJA

Mi do momenton pluan ne hezitu — *(Paŭzo)*

TEMPLANO

Kaj tamen vi hezitas? —

DAJA

Ĝenerale

Li estas tiom bona! — Kaj mi ŝuldas

Al li tre multe. — Kial li ne sekvas! —
Ho, sangas mia kor', lin devigante.

TEMPLANO

Mi petas: unuvorte liberigu
Min de la necerteco. Sed se vi
Eĉ mem ne scias, ĉu intenco via
Laŭdinda aŭ perfida, bona aŭ
Malbona estas: ne parolu! — Mi
Forgesu, ke vi havas sekretaĵon.

DAJA

Ĉi tio ne haltigas, sed instigas!
Do: Reĉa estas kristanino — ne
Hebreidino!

TEMPLANO

(malvarme)

Mi gratulas! Ĉu
Tre malfacile estis? — Ne bedaŭru
La naskdolorojn. — Plue loĝatigu
La Ĉielon, se la ter' ne havas spacon.

DAJA

Ĉu tian mokon la novaĵ' meritas?
Ĉu ke kristanidino Reĉa estas,
Ne igas vin pli ĝoja, vin, Templanon,
Kristanon, kiu amas ŝin?

TEMPLANO

Speciale,

Ĉar estas kristanin' per via faro!

DAJA

Jen via opini'? — Malprave! — Ne!
Ŝi estas per neniu konvertebla!
Feliĉe ŝi de longe estas, kia
Ŝi ne ekŝajnas.

TEMPLANO

Ĝin klarigu, aŭ . . . ! (*Li faras geston de foririgo*)

DAJA

Kristanidin' ŝi estas, de kristanoj
Naskita, kaj baptita . . .

TEMPLANO

(*urĝe*)

Nu, kaj Natan?

DAJA

Ne ŝia patro.

TEMPLANO

Natan ne la patro?

Ĉu vi konscias, kion vi parolas?

DAJA

La veron, kiu ofte min plorigis.
Ne, li ne estas ŝia patro . . .

TEMPLANO

Li

Ŝin nur edukis sia infaneto?
Li nur edukis kristaninon kvazaŭ
Judinon?

DAJA

Certe!

TEMPLANO

Kaj ŝi eĉ ne scias

Pri tio, kia ŝi naskiĝis? — Ŝi
De li neniam aŭdis, ke ŝi estas
Ja kristanino, ne judino?

DAJA

Ne!

TEMPLANO

Ne la infanon nur li edukadis
En tiu kredo? Eĉ al la knabino
Li lasis tiun kredon?

DAJA

Bedaŭrinde!

TEMPLANO

La saĝa, bona Natan do aroĝis,
 Tiele falsi de l' natur' la voĉon?
 Tiele fuŝdirekti disvolviĝon
 De koro, kiu laŭnature estus
 Irinta tutaliajn vojojn? — Daja,
 Vi efektive ion nun konfidis... —
 Gravegan ion — kies sekvoj povus...
 Ĝi embarasas min — mi ne tuj scias
 Nun, kion fari. — Lasu al mi tempon. —
 Foriru! — Li ĉi tie pretervenos. —
 Li povus nin surprizi!

DAJA

Mi ekmortus!

TEMPLANO

Ho, mi ne povus nun kun li paroli!
 Se vi renkontos lin, nur al li diru,
 Ke reciproke ni nin trovos ĉe l'
 Sultan'.

DAJA

Sed lasu ne rimarki ion.

Mi volis doni nur la lastan tuŝon
 Al la afero; mi nur volis vin
 Senskrupuligi pri l' knabino. — Sed
 Se poste vi kondukos ŝin Eŭropon:
 Vi ne postlasos min, ĉu jes, ĉi tie?

TEMPLANO

Pri tio ni parolu poste! — Iru!

AKTO KVARA

1a SCENO

Ejo: En la klaŭstroj de la monaĥejo.

La MONAĤEJANO kaj baldaŭ poste la TEMPLANO.

MONAĤEJANO

Li estas prava ja, la Patriarko!
 Al mi tre multe ne sukcesis de
 Ĉi ĉio, kion li al mi ordonis
 Faradi! — Kial do li komisiis
 Min nur por tiaj aĵoj? — Mi ne ŝatas
 Konduti elegante, nek cediĝi,
 Nek meti mian nazon en fremdaĵojn.
 Nek miksi min en ĉiujn farojn. — Ĉu
 Pro tio mi foriris el la mondo?
 Ĉu por impliki min nun speciale
 Por la aliaj kun la mondo?

TEMPLANO

(rapide proksimiĝante)

Frato!

Jen vi ja estas. — Mi longtempe jam
 Vin serĉis.

MONAĤEJANO

Min?

TEMPLANO

Ĉu vi min jam ne konas?

MONAĤEJANO

Ho, jes! — Mi kredis nur, ke vian moŝton

Neniam mi dumvive ree vidos.

Ĉar mi esperis tion de Kardio. —

Ĉar Li ja scias, kiom malfacile

Al mi estadis la misio, kiu

Al vi venigis min. — Jes, Dio scias,

Ĉu mi deziris, trovi vin cedema;

Li scias, kiom mi ĝojegis, ho,

Ĝojegis kore, kiam senpripense

Kaj glate ĉion vi rifuzis, kio

Ne decas ja al kavaliro. — Nun

Vi tamen venas. Nun do postefikis.

TEMPLANO

Vi scias jam, pro kio mi alvenas?

Apenaŭ mi ĝin scias mem.

MONAĤEJANO

Nu, vi

Meditis, trovis, ke la Patriarko

Ne estas ja malprava; ke honoro

Kaj mon' per lia plan' gajneblaj estas;

Ke malamiko restas malamiko,

Eĉ se sepfoje li anĝelo estis.

Vi tion nun ĝisfunde meditadis

Kaj venas, por vin ofri. — Dio mia!

TEMPLANO

Ho viro pia, kara! kontentiĝu!

Ne tial mi alvenas; tial mi

Ne volas kun la Patriark' paroli.

Ankoraŭ mi pri tiu punkto pensas

Samkiel tiam, kaj je l' tuta mondo

Ne volus perdi mian opinion,
 Al mi taksitan eĉ de rekta, pia
 Kaj brava viro. — Mi nur venas por
 Demandi pri afer' de l' Patriarko
 Konsilon . . .

MONAĤEJANO

Vi? kaj de la Patriarko?

De pastro . . . kavalir'? (*Timeme ĉirkaŭrigardante*)

TEMPLANO

Jes, la afer'

Pastraĵa estas.

MONAĤEJANO

Tamen: ne demandas

La pastro kavaliron, eĉ se temas
 Pri aĵo kavalira.

TEMPLANO

Ĉar li havas

La rajton krimi, rajt', pri kiu ni
 Lin ne envias. — Certe: se mi nur
 Por mi agadi devus, jes! se mi
 Nur estus respondeca al mi mem:
 Mi tiam ne bezonus Patriarkon!
 Sed certajn agojn mi prefere laŭ
 Alia vol' malbone faras, ol
 Laŭ mia bone. — Krome, mi nun vidas:
 Eĉ religi' partio estas, kaj
 Eĉ kiu kredas sin tut-senpartia,
 Nur agas laŭ la sia, kvankam ofte
 Eĉ sen konscio. — Kaj ĉar tiel estas,
 Ja certe estas ĝuste.

MONAĤEJANO

Mi preferas

Silenti; mi vin ne komprenas.

TEMPLANO

Tamen —

(Cetere: kion mi deziras? Ĉu
 Ordonon aŭ konsilon? — puran aŭ
 Konsilon kleran?) — Frato mi vin dankas
 Pro la parolo. — Kio: Patriark'? —
 Vi estu mia Patriark'! Mi ja
 Prefere turnas min al la kristan'
 En Patriark', ol al la Patriark'
 En la kristan'. — Jen la afer':...

MONAĤEJANO

Mutigu!

Pro kio? — Vi malkonas min. — Ho, kiu
 Tro multe scias, devas multe zorgi;
 Mi min dediĉis nur al unu zorgo. —
 Ho, bone! — Vidu! Aŭdu! Jen li mem.
 Do restu tie ĉi. Li vin jam vidis.

2a SCENO

La PATRIARKO en tuta eklezia pompo, alvenante laŭlonge
 de klaŭstro, kaj LA ANTAŬAJ.

TEMPLANO

Prefere mi evitus lin. — Li min
 Ne plaĉas. — Dika, ruĝa, eĉ afabla
 Prelato. — Kia pomp'!

MONAĤEJANO

Ho, se vi vidus

Lin iri al kortego! — Nun li venas
 De malsanulo nur. —

TEMPLANO

Ja tiukaze

Sultano honti devos!

Patriarko

(proksimiĝas kaj faras signon al la Monaĥejo)

He, do, vi!

Ĉu estas la Templano? — Kion li
Deziras?

Monaĥejo

Mi ne scias.

Patriarko

(alpaŝas lin. La Monaĥejo kaj sekvantaro iras malantaŭen)

Kavaliro! —

Mi ĝojas vidi la junulon bravan! — —
Ankoraŭ tiom juna! — Dio helpos,
Kaj vin estigos io. —

Templano

Via moŝto,

Apenaŭ plio ol ĝis nun. — Verŝajne
Malplio eĉ.

Patriarko

Almenaŭ mi deziras,

Ke tia pia kavaliro plu
Longtempe floru, verdu por la bono
De l' tuta kristanar' kaj la afer'
De Dio! — Kaj ne mankos tio, se l'
Kuraĝo juna sekvos la konsilon
Maturan de l' maljuno! — Ĉu alie
Mi povos servi vin?

Templano

Per tio, kio

Al mia aĝo mankas: per konsilo.

Patriarko

Volonte! — Sed vi sekvu la konsilon!

Templano

Sed ne blindece!

PATRIARKO

Tute ne! — Sed tamen:

Neniu malatentu la prudenton
 De Di' al li donitan — kie taŭgas.
 Sed ĉu ĝi ĉie taŭgas? — Ne! — Ekzemple:
 Se Dio volus al ni montri per
 Anĝelo — tio estas: per servisto
 De Sia vort' — rimedon por akceli
 Kaj plifortigi de la eklezio,
 De l' tuta kristanismo eĉ, la savon
 Per maniero tutspeciala: kiu
 Arogi tiam rajtus, ekzameni
 Por serĉi la prudenton en la faro
 Arbitra de l' Plejalta, kiu kreis
 Prudenton? kaj esplori la eternan
 Leĝegon de l' grandeco de l' Ĉielo
 Laŭ leĝoj de honoro vanta? — Sed
 Pri tio jam sufiĉe! — Kio estas,
 Pri kio la sinjoro nun deziras
 Konsilon mian?

TEMPLANO

Ni supozu, patro,

Ke judo havas solinfanon — nu,
 Knabinon — kiun li edukis per
 Zorgemo pleja kaj al ĉio bona;
 Ke li ŝin plie amas ol la vivon;
 Ke ŝi lin amas per plej sankta amo.
 Kaj iu nun al ni denuncas, ke l'
 Knabin' ne estas de la jud' filino.
 Dum ŝia infaneco li ŝin trovis,
 Aĉetis, ŝtelis — kiel ajn —; ni scias:
 Ŝi estas ido de kristanoj kaj
 Baptita; ŝin la judo nur edukis

Judino kaj filino sia; — diru,
Ho, honorinda patro, kio estus
Farenda nun?

PATRIARKO

 Mi tremas! — Sed unue
Klarigu do, ĉu tiu kozo¹⁾ estas
Tutvera fakto aŭ nur hipotezo?
Mi volas diri: ĉu vi nur fabelas
Ĉi tion, aŭ ĉu ĝi okazis kaj
Ankoraŭ nun okazas?

TEMPLANO

 Mi konjektas,
Ke tio estas same, por nur aŭdi
De via moŝto opinion.

PATRIARKO

 Same?

Jen vidu, kiel la prudent' laika
Erari povas pri ekleziaĵo! —
Ho ne! — Se tiu kozo rakontita
Spritaĵo estas nur: ĝi ne valoras
La penon, ĝin pripensi serioze.
Mi vin nur atentigu pri l' teatro,
En kiu tia „por“ kaj „kontraŭ“ povus
Por granda ĝuo esti pritraktata.
Sed se vi ne nur volas min amuzi
Per burleskaj' teatra, se la kozo
Do fakto estas, se ĝi eĉ okazis
En nia eparkio, tie ĉi
En nia kara urb' Jeruzalem:
Nu, tiam . . .

TEMPLANO

 Kio do ekestus tiam?

¹⁾ kozo = A: cause, F: cause, G: Rechtsfall, I: causa.

PATRIARKO

Nu, tiam oni devus sur la judo
 Apliki tiun punon, kiun fiksas
 La leĝoj papa kaj imperiestra
 Por tia krimo, tia malvirtaĵo.

TEMPLANO

Hm!

PATRIARKO

Kaj la leĝoj menciitaj diras:
 La judo, kiu al apostateco
 Kristanon logas: — al la brulŝtiparo —
 Al fajrmortigo!

TEMPLANO

Hm!

PATRIARKO

Kaj des pli multe
 La jud', perforte fortreninta el
 La ligo de la bapto kristanidon!
 Ĉu ne perforto estas ĉio al
 Infan' farita? — Tio estas: krom
 La far' de l' eklezio al infanoj.

TEMPLANO

Sed se l' infano en mizero mortus,
 Se ĝin ne trafus la kompat' de l' judo?

PATRIARKO

Ne grave! Tiu judo brulos! — Ĉar:
 Prefere morti en mizero ol
 Savita esti por purgatorio
 Eterna. — Krome: kial tiu judo
 Arogas agi kontraŭ Dio? — Dio
 Sen li ja savi povas, se Li volas!

TEMPLANO

Eĉ salvi¹⁾ spite li, mi opinias!

PATRIARKO

Ne grave! — Tiu judo brulos!

TEMPLANO

Tio

Kortuŝas min. — Speciale, ĉar mi aŭdis,

Ke li edukis ŝin eĉ ne en sia,

Sed en nenia religio kaj

Instruis ŝin pri Di' nur tiom, kiom

Postulas nepre la prudent'.

PATRIARKO

Ne grave!

La judo brulos! — Nur pro tio li

Meritas jam trifojan morton per

La fajro! — Kio? — He? — Sen ia kredo

Eduki idon? — Tute ne instrui

La grandan devon „kredi“ al infano?

Jen troe! — Kavalir', mi forte miras,

Vin mem . . .

TEMPLANO

Cetero, patro honorinda,

Se Dio volos, dum konfeso. (*Li volas foriri*)

PATRIARKO

Kio?

Eĉ ne respondi nun? — Al mi ne nomi

La judon-malindulon? — Kaj lin ne

Tuj allokigi? — Ho, mi al mi helpas! —

Mi senprokraste iros al sultan'!

Pro l' kapitulacio, kiun li

Ĵurumis, li ja devas nin protekti;

¹⁾ salvi = G: selig machen; salvo = G: (ewige) Seligkeit, A: salvation, F: le salut (eternel).

Protekti ĉiujn rajtojn, ĉiujn leĝojn
 De ni alkalkulatajn al plejsankta
 La religio nia! — Dank' al Dio!
 Ni ja posedas tiun dokumenton.
 Ni havas la subskribon kaj sigelon!
 Facile mi lin komprenigos, kiom
 Danĝere estas por la ŝtato, eĉ
 Nenion kredi! Ĉiu lig' civila
 Ja disŝirita, forigita estus,
 Se hom' nenion kredi devus. — For!
 For tia peko! . . .

TEMPLANO

Ho, domaĝe, ke
 Mi la sermonon ne pli libertempe
 Ĉuegi povas. Mi vokita estas
 Al Saladin.

PATRIARKO

Jes? — do — nu, jes — se tio —

TEMPLANO

Volonte la sultanon mi preparos,
 Se plaĉas al la Patriarka moŝto . . .

PATRIARKO

Ho! Mi ja scias, ke vin favorumis
 Sultano. — Mi vin petas nur, favore
 Pri mi lin memorigu. — Min instigas
 Nenio krom la amo al Kardio. —
 Kaj ĉiun troon mi por Li nur faras. —
 Vi tion konsideru! — Kaj, ĉu ne,
 Sinjoro?, kion vi antaŭe diris
 Pri l' judo, nur alegorio estis?
 Mi volas diri . . .

TEMPLANO

Jes, alegorio. (*Li foriras*)

PATRIARKO

(Kaj tamen mi esploros ĝin ĝisfunde.

Jen ree por la frato Bonafides

Misio.) — Min aŭskultu, filo mia!

(Forirante li parolas kun la monaĥejo)

3a SCENO

Ejo: Ĉambro en la palaco de Saladin, en kiun sklavoj enportas amason da sakoj kaj metas unu apud alian sur la plankon.

SALADIN kaj baldaŭ poste SITTAH.

SALADIN

(dumtempe envenante)

Nu? Ĉu ne estas fino jam? Ĉu multe

Da ĝi ankoraŭ restas?

SKLAVO

La duono.

SALADIN

La reston do al Sittah portu. — Kie

Al-Hafi estas? — Tion tuj Al-Hafi

Al si ekprenu. — Aŭ ĉu al la patro

Mi ĝin pli bone sendu? — Tie ĉi

El miaj manoj ĉio glitas. — Oni

Ja fine malmoliĝas, kaj apenaŭ

De mi monsumon iu plu ricevos.

Almenaŭ ĝis alveno de la monoj

El Egiptujo malriĉuloj serĉu

Alie helpon! — Se l' donacoj nur

Ĉe l' tombo daŭros! — Se nur la pilgrimoj

Kristanaj ne foriros sendonacaj!

Se nur . . .

SITTAH

Do kio estas? Kial monon
Al mi vi sendas?

SALADIN

Pagu vin per ĝi kaj
Deponu, se ankoraŭ restos.

SITTAH

Ĉu

Kun la Templan' ne Natan jam alvenis?

SALADIN

Li serĉas lin.

SITTAH

Jen vidu, kion mi
Eltrovis, traserĉante ornamilojn
Malnovajn miajn. (*Ŝi montras al li malgrandan pentron*)

SALADIN

Ha! Jen mia frato!

Jen estas li! — Jen estis li! — Jes, li! —
Ho, brava, kara burŝo, kial mi
Vin perdis tiom frue? — Kion mi
Kun vi, ĉe via flank' farinta estus! —
La bildon al mi lasu! Mi ĝin konas:
Li donis ĝin al sia Lilla, via
Fratin' pli aĝa, kiu iam lin
El siaj brakoj ne forlasi volis:
La lastan tagon, kiam li forrajdis. —
Mi lasis lin forrajdi kaj eĉ sola. —
Ŝi mortis de ĉagren' kaj ne pardonis
Al mi, ke mi lin lasis rajdi sola. —
Li restis for!

SITTAH

Frat' kompatinda!

SALADIN

Ne

Pri ĝi parolu plu! — Ja ĉiu iam
 Forrestas. — Krome: ne la morto nur
 La celon delokigas al junulo
 De lia speco. — Multajn malamikojn
 Li havas, kaj la plej malforta venkas
 Plej fortan ofte. — Estu kiel ajn! —
 Al la Templan' la bildon mi komparu
 Por vidi, kiom mia fantazi'
 Min trompis.

SITTAH

Mi pro tio ĝin alportis.
 Sed ĝin redonu! Mi al vi ĝin diru:
 Okul' virina ĝin plej bone vidas.

SALADIN

(al pordstaranto, kiu envenas)

Do kiu? — La Templan'? — Li venu!

SITTAH

Por

Vin ne malhelpi, por ne konfuzigi
 Lin per scivolo mia...

(Ŝi sidiĝas apude sur sofo kaj mallevas la vualon)

SALADIN

Bone! — (Kiel

La voĉo estos? — Certe l' voĉon
 De Assad ie mia kor' konservis!)

4a SCENO

La TEMPLANO kaj SALADIN.

TEMPLANO

Kaptito via, mi, sultan' . . .

SALADIN

Kaptito?

Se mi la vivon lasis, ĉu mi ne

La liberecon ankaŭ lasas?

TEMPLANO

Kion

Vi fari volas, mi unue aŭdu,

Ne hipotezu. — Sed, sultano: Dankon,

Specialan dankon diri pro la vivo,

Konvenas nek al karaktero mia,

Nek rango mia. — Ĉiukaze ĝi al

Dispono via estas.

SALADIN

Nur ne kontraŭ mi

Ĝin uzu! — Mi ja malenvias pro

La par' da manoj miajn malamikojn;

Sed vere malfacile nur mi lasas

Al ili koron tian. — Vi min tute

Ne seniluziigis, ho bravulo! —

Vi vere estas Assad mia! Vidu:

Mi povus vin demandi, kie vi

La tutan tempon estis, kie dormis?

Kaj kiu sorĉa lando, kiu bona

Feino tiun floron tiom freŝa

Restigis? — Mi vin povus memoriĝi

Pri tio, kion tie ni kaj tie

Komune faris. Vidu: eĉ riproĉi

Mi ankaŭ povus, ĉar vi antaŭ mi
 Sekreton havis! unu aventuron
 Eĉ al mi kaŝis; jes, mi tion povus,
 Se mi nur vidus vin, ne ankaŭ min.
 Nu, tiu dolĉa revo tiom vera
 Ja estas, ke al mia viv-aŭtuno
 Nun nova Assad ree floros! — Ĉu vi
 Pri ĝi konsentas?

TEMPLANO

Ĉio, kio min

De vi alvenas — estu kio ajn —
 De mia kor' deziro estis.

SALADIN

Tion

Ni provu tuj. — Ĉu vi ĉe mi restadus? —
 Ĉu kiel islamano aŭ kristano,
 En Jamerlonk¹⁾ aŭ en mantelo blanka,
 En via felto aŭ turbano: kiel
 Vi volos! Mi neniam ja postulis,
 Ke ĉiu arbo havu saman ŝelon.

TEMPLANO

Sen tio vi ne estus la heroo
 Estanta ĝardenist' de Di', prefere.

SALADIN

Se vi ne pli malbone pri mi pensas,
 Ni ja duone estas klaraj?

TEMPLANO

Tute!

SALADIN

(ofrante al li manon)

Jen man'!

¹⁾ Araba vestaĵo.

TEMPLANO

(ekkaptante la manon de Saladin)

Jen mia! — Tiel nun ricevu
Pli ol vi povis preni! — Tuta via!

SALADIN

Jen tro' da gajn' por unu tago! — Tro! —
Ĉu li ne venis?

TEMPLANO

Kiu?

SALADIN

Natan.

TEMPLANO

(frote)

Ne!

Mi venis sola. —

SALADIN

Kia far' de vi!

Kaj kia bona ŝanc', ke tia far'
Okazis por la bon' de tia viro!

TEMPLANO

Jes, jes!

SALADIN

Nu! Tiom froste? — Ne, junulo!

Se Dio per ni faris ion bonan,
Ni tiom froste ne konduitu! Eĉ
Pro modestec' ne ŝajnu tiom frostaj.

TEMPLANO

Du flankojn ĉio en la mondo havas! —
Kaj oni ofte eĉ ne kredi povas,
Ke ili kune taŭgas.

SALADIN

Ĉiam nur

Atentu la plej bonan kaj gloradu
Kardion! — Kiel ili kune taŭgas,

Li scias. — Sed se tiom komplikite
 Vi pensas, ho junulo, mi ja devas
 Min gardi kontraŭ vi! Eĉ mi ja estas
 Tiela aj' kun multaj flankoj, kiuj
 Ne ŝajnas ĉiam nepre kunetaŭgi.

TEMPLANO

Doloras tio! — Ĉar malfido estas
 Ne mia eco . . .

SALADIN

Sed pri kiu vi
 Koleras? — Ŝajnas esti Natan. Nu?
 Malfid' pri Natan? Vi? — Klarigu! Diru!
 Unuan pruvon pri konfido donu.

TEMPLANO

Ne estas Natan. Mi ekkoleretas
 Nur pri mi mem. —

SALADIN

Pro kio?

TEMPLANO

Ĉar mi songis,

Ke jud' mallerni povus, judo esti;
 Mi koleretas, ĉar mi tion songis
 Maldorme.

SALADIN

Túj rakontu vian songon!

TEMPLANO

Vi aŭdis pri l' filin' de Natan. Kion
 Mi faris, nu, mi faris ĝin! — Tro fiero
 Ja, por rikolti dankon, kiun mi
 Ne semis, mi evitis, ŝin revidi.
 La patro estis malproksime, li
 Revenas, aŭdas, serĉas min; li dankas,
 Deziras, ke filino lia plaĉu

Al mi; parolas pri estontaj ŝancoj,
 Pri perspektivoj. — Nu, mi lasas min
 Cedigi, venas, vidas, fakte trovas
 Knabinon . . . Ha, mi hontas, ho sultano!

SALADIN

Vi hontas? — Ĉar efikis judidino
 Sur vin? ja ne pro tio, mi esperas!

TEMPLANO

Ĉar al efiko tiu, instigita
 Per de la patro dolĉa babilado,
 Kor' mia ne sufiĉe rezistadis! —
 Ho mi! En fajron mi denove saltis. —
 Nun varbis mi, kaj nun li min rifuzis.

SALADIN

Rifuzis?

TEMPLANO

Nu, la saĝa patro min
 Ne glate malakceptas. Tamen: la
 Saĝulo devas informiĝi kaj
 Mediti! Ĉu ne saĝe? Mi ja ankaŭ
 Ĝin faris. Ĉu ne ankaŭ mi meditis
 Kaj informiĝis, kiam ŝi kriadis
 El fajro? — Jes! Ja estas io bona:
 Saĝeca, meditema esti!

SALADIN

Nu!

Al maljunul' pardonu iomete!
 Kaj ja eterne lia rifuzado
 Ne povos daŭri! — Ĉu li do postulos,
 Ke vi fariĝu judo?

TEMPLANO

Kiu scias?

SALADIN

Ĝin scias, kiu lin pli bone konas.

TEMPLANO

La superstiĉo, kun ni edukita,
 Eĉ kiam ni ekkonas ĝin, ne perdas
 La forton. — Eĉ ne ĉiuj, kiuj mokas
 Katenojn siajn, estas ja liberaj.

SALADIN

Mature parolite! — Tamen, Natan . . .

TEMPLANO

La plej danĝera superstiĉo estas,
 La sian kredi la plej tolerebla . . .

SALADIN

Jes, eble! — Tamen . . .

TEMPLANO

. . . al ĝi sola

Transmeti la homaron stultan, ĝis
 Ke por ĝi venis luma tag' de vero . . .

SALADIN

Nu, jes! Sed Natan! — Natan ne posedas
 Malforton tiun!

TEMPLANO

Mi ĝin ankaŭ pensis . . .

Sed se nu tamen tiu homodelo
 Malinda judo estas, haviganta
 Al si la idojn de kristanoj por
 Eduki ilin kiel judojn: — Nu . . .

SALADIN

Kaj kiu tion diras?

TEMPLANO

La knabino,

Per kiu li min logas, kiu estu

La rekompenco por la faro, por ke
 Mi ne senpage estu ĝin farinta:
 Knabino tiu mem ne estas lia
 Filino, sed rabita kristanino.

SALADIN

Kaj tamen li ŝin volas forrifuzi?

TEMPLANO

(kolere)

Ĉu voli aŭ ne voli! Mi malkovris
 Lin! Jes! La frazemulon mi malkovris!
 Mi ĉaskurigos tiun judan lupon
 Sub ŝafa felo filozofa per
 Hundaro, kiu bone lin skuados!

SALADIN

(serioze)

Kristan', kalmiĝu!

TEMPLANO

Ha, „kristan', kalmiĝu“?

Se jud' kaj islaman' defendas siajn
 Judismon, islamismon: ĉu kristan'
 Do ne defendu sin?

SALADIN

(eĉ pli serioze)

Kristan', kalmiĝu!

TEMPLANO

(netuŝate)

Mi sentas la riproĉon, kiun vi
 Enpremas en silabojn tiujn! Ho,
 Se mi nur scius, kiel via Assad
 En mia lok' kondukus!

SALADIN

Ne pli bone!

Mi kredas: same urĝe! — Sed de kiu

Vi lernis, min korupti kiel li?
 Per ununura vorto? Nu, se fakte
 Ĉi ĉio estas, kiel vi asertas,
 Mi mem apenaŭ Natan ja rekonas. —
 Sed li amiko mia estas, kaj
 Amikoj miaj nepre ne malpacu.
 Obeu! Kaj atentu! Ne tuj kredu
 Al revemuloj el popolamaso!
 Kaj kaŝu, kion mi ekvenĝi devus
 Laŭ la postul' de via eklezio!
 Kristan' ne estu por — per tio — spiti
 Al jud' kaj islamano!

TEMPLANO

Preskaŭ tro

Malfrue! Dank' al sangsoifo de
 La Patriarko, kies ilo . . .

SALADIN

Kio?

Vi iris al la Patriark' pli frue
 Ol tien ĉi?

TEMPLANO

Pelita de pasio,

Sendecideco! — Min pardonu! — Vi
 Ne plu bonvolos trovi en mi ion
 De via Assad, mi ektimas.

SALADIN

Ho,

Eĉ penton vian! — Ŝajnas, ke mi konas
 Malvirtojn, kiuj naskas nian virton.
 Ĉi tiun vartu, kaj ne malutilos
 Al vi ĉe mi malvirtoj viaj. — Iru!
 Nun serĉu Natan, kiel li vin serĉis;
 Kaj alvenigu lin. — Mi ja vin ambaŭ

Tuj repacigi devas. — Se serioze
 Vi celas la knabinon: kvietiĝu.
 Ŝi estos via! Natan iom pentu,
 Ke sen porkaĵo li kristanidinon
 Edukis! — Iru for!

(La Templano foriras, kaj Sittah leviĝas de la sofo)

5a SCENO

SALADIN kaj SITTAH.

SITTAH

Jes, vere strange!

SALADIN

Ĉu ne? — Ĉu ne belulo devas esti
 Estinta mia Assad, kara Sittah?

SITTAH

Se tiel li estadis, kaj se ne
 Model' de l' bildo estis la Templano! —
 Sed kiel vi forgesi povis, pri
 Gepatroj liaj iom informiĝi?

SALADIN

Precipe ja pri la patrin', ĉu ne?
 Ĉu la patrino en ĉi tiu lando
 Ne iam estis? — Jes?

SITTAH

Jen bela penso!

SALADIN

Ho, eble estas ja! — Ĉar Assad estis
 Bonvena ĉe la kristaninoj belaj,
 Pri belaj kristaninoj tre pasia.
 Kaj iam eĉ la famo kuris — nu,

Ne tre volonte tion mi mencias. —
 Sufiĉas, ke mi lin rehavas — kaj
 Kun ĉiuj malmeritoj kaj kapricoj
 De lia mola kor' rehavi volas.
 Ho, Natan donu la knabinon!

SITTAH

Donu?

Li lasu ŝin!

SALADIN

Jes, jes! Kaj kian rajton
 Pri ŝi do havas Natan, se li ne
 La patro estas? — Kiu ŝian vivon
 Konservis tiel, nur la rajtojn havas
 De tiu, kiu donis ĝin.

SITTAH

Se simple

Vi la knabinon al vi prenis, frato?
 Ŝin forprenante simple de la patro
 Nerajta?

SALADIN

Ĉu necese estos?

SITTAH

Nu,

Ja ne necese! — Nur la scivolemo
 Instigas min, ekdoni la konsilon;
 De kelka viro mi volonte sciis
 Plejeble rapidege, kian inon
 Li povus ami.

SALADIN

Nu, do sendu for

Kaj ŝin venigu.

SITTAH

Ĉu mi rajtas, frato?

SALADIN

Sed Natan indulgumu! — Li ne kredu,
Ke ni perforte lin disigi volas
De ŝi!

SITTAH

Ne zorgu!

SALADIN

Kaj mi mem esploru
Nun, kie mia Hafi ja restadas.

6a SCENO

Ejo: En la domo de Natan la aperta koridoro kontraŭ la palmoj, kiel en la 1a sceno de l' 1a akto. Parto de la varoj kaj valoraĵoj menciataj en tiu ĉi sceno kuŝas elpakita.

NATAN kaj DAJA.

DAJA

Ho, ĉio bele! ĉio elegante!
Kaj kiel vi nur ĝin donaci povas!
Sed kie la arĝentan ŝtofon kun
La ora rando oni faras? — Kia
Vestaĵ' de fianĉin'! — Eĉ ne reĝino
Pli belan havas.

NATAN

Fianĉina vesto?

DAJA

Nu jes! Vi ja pri tio ne jam pensis,
Ĝin aĉetante. — Natan, fakte, ĝi
Kaj ne alia povas esti. — Ĝi
Mendita ŝajnas kiel vest' edziĝa.
La blanka fono: la ĉasteco! Kaj
La oraj strioj dise serpentantaj:
Riĉeco estas. — Ĉu vi vidas? — Ĉarme!

NATAN

Ĉu vi fabelas? — Kaj pri kia vesto
Vi metaforas? — Ĉu vi estas mem
La fianĉino?

DAJA

Mi?

NATAN

Do kiu?

DAJA

Mi? —

NATAN

Do kiu? — Kaj pri kia vest' edziĝa
Vi frazas? — Ĉio tio estas via!

DAJA

Ĉu mia? — Mia estas? — Ne por Recha?

NATAN

Ne! — En alia bloko estas, kion
Por ŝi mi havas. — Tuj! — Forprenu ĝin!
Forportu viajn aĵojn.

DAJA

Tentemulo!

Ne, eĉ se estus la multvaloraĵoj
De l' tuta mond'! Ne tuŝi! Se vi ne
Antaŭe ĵuras, ke vi tuj ekkaptos
La oportunon, kiun al vi sendas
La Providenco ja ne duan fojon.

NATAN

Ekkapti? kion? — Kian oportunon?

DAJA

Ne hipokritu! — Unuvorte: la
Templano amas Recha'n! — Do konsentu! —
Per tio via peko ekfinaĝos,
Pri kiu mi ne plu silenti povos.

Per tio ŝi revenos al kristanoj,
 Kaj ree estos, kio ŝi antaŭe
 Estadis. Kaj vi mem per ĉio bona,
 Pro kio ni ne povos eldankegi,
 Ne nur kolektis ardajn karbojn sur
 La kapon vian!

NATAN

Ree do la samo?

La sama kanto, nur sur nova kordo,
 Sed kiu eĉ ne harmonias.

DAJA

Kial?

NATAN

Tre bone al mi plaĉus la Templano;
 Mi plej volonte Recha'n al li donus;
 Sed . . . paciencon havu!

DAJA

Paciencon?

Ĉu jen ne estas via kant' malnova?

NATAN

Pacienĉigu nur malmultajn tagojn! —
 Sed vidu! — Kiu venas? — Ĉu monaĥo?
 Demandu pri la vol'.

DAJA

Ja estas klare!

(Ŝi iras al li renkonte kaj demandas)

NATAN

Do donu! — Antaŭ ol li petas. — (Se mi
 Nur scius, kiel elspioni la
 Templanon, sen malkaŝi de l' scivolo
 La kaŭzon! — Se mi diras ĝin, kaj la
 Suspekt' senkaŭza estas: la patrecon
 Mi vane riskis!) — Nu? pri kio temas?

DAJA

Li volas vin paroli.

NATAN

Lasu lin

Alveni kaj foriru.

7a SCENO

NATAN kaj la MONAĤEJANO.

NATAN

(Mi volonte

Ja restus ŝia patro! — Sed ĉu mi

Ne povos tia resti, ne restante

Nomata tiel? — Ŝi eĉ certe nomos

Min patro, se ŝi konos la deziron.)

Nu, kion vi deziras, pia frato?

MONAĤEJANO

Ne multe. — Natan, kore mi ĝojegas,

Vin vidi sana.

NATAN

Ĉu vi do min konas?

MONAĤEJANO

Nu, kiu vin ne konas? — Al multiu

Vi vian nomon stampis en la manon!

En mia man' de jaroj ĝi jam staras.

NATAN

(serĉante sian monujon)

Mi tuj ĝin refreŝigu!

MONAĤEJANO

Koran dankon!

Plimalriĉulojn mi ŝtelumus. Ne! —

Sed nur permesu, ke mi refreŝigu

En vi la nomon mian; ĉar mi povus
Fieri, ke en vian manon mi
Nemalsateblan ion iam metis.

NATAN

Pardonu! — Mi ekhontas! — Diru: kion?
Kaj pentkompenso estu la sepoblo
De la valor' de tio.

MONAĤEJANO

Nu, antaŭe

Aŭskultu, kiel ja mi mem hodiaŭ
Nur estis rememorigata pri
La don' tiama.

NATAN

Pri la don' tiama?

MONAĤEJANO

Ĝis antaŭ temp' mallonga mi sidadis
Sur Kvarantan' apude de Jeriĥo.
Araba kanajlaro venis kaj
Detruis mian ĉelon kaj preĝejon
Kaj min forkaptis. Sed feliĉe mi
Min savis; al la Patriarko kuris,
Por peti pri por mi alia loko,
Sur kiu en soleco mi servadu
Al mia Di' ĝis fin' de mia vivo.

NATAN

Sur pingloj mi ja staras, kara frato.
Do unuvorte: kia don' tiama?

MONAĤEJANO

Tuj, Natan! — Nu, la Patriark' promesis
Sur Tabor ermitejon, kiam tia
Vakanta estos, dume mi restadu
En monaĥejo kiel frat' laika.
Mi tie estas nun, kaj ĉiutage

Centfoje mi petegas lin pri Tabor.
La Patriark' min uzas nun por kelka
Afero, kiu min naŭzigas; nu,
Ekzemple . . .

NATAN
Do rapidu!

MONAĤEJANO
Tuj! — Aŭskultu!

Hodiaŭ iu ajn al li alflustris:
„Vivadas tie ĉi hebreo, kiu
Edukas kristaninon kiel sian
Filinon“.

NATAN
(*ektimigite*)
Ha!

MONAĤEJANO
Aŭskultu min! — Nu, li

Min komisias, serĉi la postsignojn
De tiu judo tuj, se eble — kaj
Li koleregas pro l' sakrilegio
De li konsiderata vera peko
Al la Spirito Sankta — tio estas
La peko, kiu al ni ŝajnas la
Plej granda peko de la pekoj; nur
Ni, dank' al Dio, ne tre klare scias,
En kio ĝi konsistas. — Kaj subite
Mi ekkonscias, ekmemoras, ke
Mi mem ja iam igis la okazon
Al tiu pek' nepardonebla. — Diru:
Ĉu ne rajdisto antaŭ dek ok jaroj
Al vi idinon kelksemajnan donis?

NATAN
Pro kio? — fakte! — sed —

MONAĤEJANO

Do min rigardu

Atente! — La rajdisto estis mi!

NATAN

Ĉu vi?

MONAĤEJANO

Kaj la sinjor', de kiu mi

Ĉin portis, estis — se mi ne eraras —
Von Filnek . . . Wolf . . .

NATAN

Jes!

MONAĤEJANO

Kaj ĉar ĵus antaŭe

Formortis la patrino, kaj la patro —
Mi kredas — devis iri al . . al Gazza,
Kaj la idin' al li ne sekvi povis,
Li sendis ĝin al vi. — Ĉu mi vin ne
Renkontis en Darun?

NATAN

Jes!

MONAĤEJANO

Mi ne mirus,

Se la memor' min erarigus. — Mi
Posedis tiom da sinjoroj, kaj
Mi nur mallongan tempon servis tiun.
Li estis bona vir', kaj baldaŭ poste
Ĉe Askalon li restis.

NATAN

Prave. Jes,

Mi tiom multe al li ŝuldas! Li
Plurfoje min forsavis de la glavo!

MONAĤEJANO

Ho certe, vi des pli volonte ja
Zorgadis pri la filineto kara.

NATAN

Jes! Estu certa!

MONAĤEJANO

Kie do ŝi estas?

Mi esperegas, ke ŝi ne formortis. —
Prefere ne ĉi tion diru! — Se
Aliaj ne pri tio scias, tiam
Ja bone estas.

NATAN

Estas?

MONAĤEJANO

Al mi fidu!

Jen mia penso: se al io bona
De mi volata, io tro malbona
Allimas, mi prefere ne ekfaros
La bonon. Ĉar ni ja ekzakte konas
Malbonon, sed la bonon tute ne!
Ja estas kompreneble, ke — se vi
Eduki devis la kristanidinon —
Vi ŝin ja edukadis kiel vian
Samsangan filineton. Kaj se vi
Ĉi tion faris kun fidel' kaj amo:
Ĉu vi meritus tian rekompencan?
Ne, ne! Almenaŭ mi ĝin ne komprenas.
Sed pli prudente vi aginta estus,
Se la idino per persono dua
Kristane edukita estus; sed vi
Ne tiom, tiukaze, amus la
Infanon de l' amik'. Infanoj amon
Bezonas — eĉ se estus nur la amo

De besto bruta — pli ol kristanisman.
 Por kristanismo restas ja sufiĉe
 Da temp'. — Se la knabin' nur kreskis sane
 Kaj pie antaŭ viaj du okuloj,
 Ŝi sama restis antaŭ la Plejalta.
 Kaj ĉu la tuta kristanismo ne estas
 Sur la judismo konstruita? Mi
 Koleris ofte, mi sufiĉe ploris,
 Se la kristano forgesi povis, ke
 Sinjoro nia mem ja estis judo.

NATAN

Vi, frato, estu mia advokato,
 Se perfideco kaj malam' starigos
 Sin kontraŭ mi — pro faro — ho, pro faro . . .!
 Nur vi, nur vi ĝin sciuj! — Prenu ĝin
 Kun vi en vian tombon! Ja neniam
 Ĝis nun fiero min instigis, ĝin
 Rakonti al person' alia. — Nur
 Al vi mi ĝin rakontos. — Al la pia
 Simplec' nur mi rakontos ĝin. — Ĉar ĝi nur
 Komprenas, kiajn farojn la piulo
 El si elpremi povas.

MONAĤEJANO

Via koro

Tuŝita estas, la okul' — malseka?

NATAN

Vi kaj l' infano min trafis en Darun.
 Sed vi ne scias, ke malmultajn tagojn
 Antaŭe la kristanoj ĉiujn judojn
 Kun ido kaj edzin' en Gath mortigis;
 Ke inter tiuj ankaŭ estis mia
 Edzin' kun sep esperoplenaj filoj;

Ke ĉiuj tiuj brulis en la domo
De mia frato, kie ili volis
Rifuĝi.

MONAĤEJANO

Granda Dio!

NATAN

Kiam vi

Alvenis, mi en polv' kaj cindro estis
Kuŝinta kaj plorinta antaŭ Dio
Tri tagojn kaj tri noktojn; mi koleris,
Furiozis kaj malbenis min kaj l' mondon
Kaj ĵuris al la kristanar' eternan
Malamon . . .

MONAĤEJANO

Ho, mi tion al vi kredas!

NATAN

Sed la prudento pli kaj pli revenis,
Per dolĉa voĉo parolante: „ . . . tamen
Ja Dio estas! Ankaŭ tio estis
La vol' de Dio! Venu! Faru tion
De vi de longe komprenitan, kio
Farebla estas pli facile ja
Ol komprenebla, se vi ĝin nur volas.
Leviĝu!“ Kaj mi kriis: „Jes, mi volas!
Nur volu, ke mi volu!“ — Dume vi
Deĉevaliĝis kaj al mi knabinon
Transdonis en mantelo. — Kion tiam
Ni interdiris, mi forgesis. Mi
Nur scias: mi ŝin prenis kaj ŝin metis
Sur mian ejon, kisis ŝin kaj ĵetis
Min teren, singultante: Dio! unu
Por sep denove jam!

MONAĤEJANO

Ho, Natan, Natan!

Kristan' vi estas! — Jes, kristan', je Dio;
Ne estis jam pli bona!

NATAN

Bone! Kio

Por vi estigas min kristan', por mi
Estigas judo vin! — Sed nun ne plu
Ni nin kortuŝu. — Ni bezonas agojn!
Kaj kvankam min sepobla amo ligis
Al la knabin', kaj min la pens' mortigas,
Ke mi per ŝi denove perdos miajn
Sep filojn: — se prudent' ŝin repostulos
El inter miaj manoj — mi obeos!

MONAĤEJANO

Nu, prave! Ĝuste tion mi intencis
Al vi konsili! — Kaj nun ĝin konsilis
Al vi anĝelo via bona jam!

NATAN

Nur iu ajn ne venu, por de mi
Forsiri ŝin!

MONAĤEJANO

Ne, certe ne!

NATAN

Kaj kiu

Pri ŝi ne rajton havas eĉ pli grandan,
Almenaŭ pli malnovan havu —!

MONAĤEJANO

Certe!

NATAN

Per sango kaj naturo.

MONAĤEJANO

Tion mi

Samopinias.

NATAN

Tuj do al mi nomu

La viron, kiel frato, onklo, kuzo

Aŭ kiel ajn al la knabin' parenkan:

Al li mi ne rifuzos ŝin, ŝin, kiu

Ja estas edukita por estadi

Ornam' de ĉiu hejmo, ĉiu kredo. —

Ho, mi esperas, ke pri la sinjoro

Kaj ties gento vi pli multe scias.

MONAĤEJANO

Nu, bona Natan — tio — ne! Vi ja

Jam aŭdis, ke mi nur mallongan tempon

Al li servadis.

NATAN

Ĉu do ne almenaŭ

Vi scias de l' patrin' la familion?

Ĉu ŝi ne estis el la gento Staŭffen?

MONAĤEJANO

Jes, eble. — Mi eĉ kredas.

NATAN

Ĉu la frato

Ne estis Konrad Staŭffen? — kaj Templano?

MONAĤEJANO

Jes, se mi ne eraras. — Halt'! Aŭskultu:

De la sinjoro mi ankoraŭ havas

Libreton. — Mi el lia brusto ĝin

Eltiris je la enterigo.

NATAN

Nu?

MONAĤEJANO

En ĝi preĝaĵoj estas. — Ni ĝin nomas
Breviero. — Kaj mi pensis, ke kristano
Ĝin uzi povus. — Tamen ja ne mi —
Mi ne scipovas legi.

NATAN

Nu daŭrigu!

MONAĤEJANO

Antaŭe la libret' kaj malantaŭe
Enhavas — laŭ la diro — de la mano
De la sinjoro mem la parencaron
De li kaj ŝi.

NATAN

Ho, tute laŭespere!

Tuj iru! kuru! Donu la libreton!
Per oro mi ĝin pagos laŭ la pezo
Kaj per mil dankoj krome. Tuj!

MONAĤEJANO

Volonte!

Arabe estas, kion la sinjoro
Enskribis. (*Li foriras*)

NATAN

Jen ne grave! Nur alportu!

Ho, Dio! Se mi povus ŝin konservi
Kaj krome eĉ per ŝi ekhavi tian
Bofilon! — Ne verŝajne! — Kiel ajn
Fariĝu! — Kiu povas esti, kiu
Parolis tiel al la Patriarko?
Mi ne forgesu, tion ĉi demandi.
Ĉu eble la afer' devenas eĉ
De Daja?

8a SCENO

DAJA kaj NATAN.

DAJA

(urĝe kaj embarase)

Ho, imagu, Natan!

NATAN

Nu?

DAJA

La kompatindulino eĉ timiĝis!

Ĵus sendis . . .

NATAN

Ĉu la Patriarko?

DAJA

Sittah,

Prinzino¹⁾ Sittah.

NATAN

Ne la Patriarko?

DAJA

Ne, Sittah! — Aŭdu do! — Prinzino Sittah

Alsendas, por venigi ŝin.

NATAN

Ŝin? kiun?

Venigi Recha'n? Sittah ŝin venigas?

Nu, se nur Sittah ŝin venigas, ne

La Patriark'!

DAJA

La Patriark'? Pro kio?

¹⁾ Prinzo = titolo de princo, kiu ne estas la filo de (la nuna) regnestro. La patro de Saladin kaj Sittah ne estas sultano. Ŝi tial ne estas reĝidino, nek sultanidino, sed havas la titolon „Prinzino“.

NATAN

Ĉu vi de longa tempo lin ne vidis?

Ĉu ne? Nenion al li diris?

DAJA

Mi?

NATAN

Kaj kie estas la sendito?

DAJA

Ene.

NATAN

Mi kun li mem parolu. Venu! — Se
Nur ne la Patriark' la kaŭzo estas! (*Li eniras*)

DAJA

Mi ion tutalian eĉ timegas.

La supozata sol-filino de

Riĉega judo povus esti eĉ

Laŭ plaĉ' de islamano! Huj, Templano,

Vi perdis ŝin! — Vi perdis ŝin, se mi

Ne ankaŭ faros nun la duan paŝon

Kaj la aferon al ŝi mem malkovros! —

Al tio mi dediĉu la unuan

Momenton, kiam mi ŝin havos sola!

Kaj tio estos — eble ĝuste kiam

Mi akompanos ŝin. — Unua tuŝo

Dumvoje certe ja ne malutilos.

Jes, jes! Antaŭen! Nune aŭ neniam!

(*Ŝi sekvas lin*)

AKTO KVINA

1a SCENO

*Ejo: En la palaco de Saladin, la ĉambro, en kiun la sakoj
kun la mono estis portataj. Tiuj ankoraŭ enestas.*

SALADIN kaj baldaŭ poste kelkaj MAMELUKOJ.

SALADIN

(envenante)

Ankoraŭ jen la mono! Kaj neniu
Eltrovi povas la derviŝon, kiu
Opinieble ie ludas ŝakon,
Per kio li forgesas eĉ sin mem. —
Kaj krome min! — Nu bone! — Kio estas?

MAMELUKO

Sciigo bona! Ĝojo, ho sultano!
La karavano de Kahiro venas,
Alvenis bone! Kun tribut' sepjara
De riĉa Nilo!

SALADIN

Bone, Ibrahim!

Vi fakte ja perant' agrabla estas! —
Ho, fine, fine! — Prenu koran dankon
Pro la sciigo bona.

MAMELUKO

(atendante)

(Nu? — do donu!)

SALADIN

Pro kio vi atendas?

MAMELUKO

Por peranto

Neniom krome?

SALADIN

Kio do?

MAMELUKO

Ĉu do

Nenia rekompenco? — Mi ja estus
Unua, kiu vortojn nur ricevis
De Saladin. — Nu, bone! — La unua,
Al kiu li avaras.

SALADIN

Do ekprenu

Jen sakon.

MAMELUKO

Ne! ne nun! Eĉ se vi volus
Nun ĉiujn al mi doni.

SALADIN

Vi do spitas? —

Alvenu! Prenu du! — Nu? li foriras?
Pli nobla eĉ ol mi? — Pli malfacile
Li malakceptas ja, ol mi donacas.
He, Ibrahim! — Per kio do okazas,
Ke tiom proksimege de l' foriĝo
Mi tute ŝanĝas mian agmanieron? —
Ĉu Saladin ne mortos Saladin? —
Li ankaŭ Saladin do ja ne vivis! —

DUA MAMELUKO

Sultan'!

SALADIN

Se vi alvenas por raporti . . .

MAMELUKO

Ke ĵus alvenis karavan' Egipta.

SALADIN

Mi scias!

MAMELUKO

Tro malfrue mi do venas!

SALADIN

Pro kio? — Prenu pro la bonintenco
Jen sakon aŭ eĉ du!

MAMELUKO

Do estas tri!

SALADIN

Se vi kalkuli povas! — Prenu ilin!

MAMELUKO

Eĉ tria poste eble venos — se
Li veni povos.

SALADIN

Kial tio?

MAMELUKO

Nu!

Li eble rompis sian kolon! — Ĉar
Tuj kiam ni tri estis certaj pri l'
Alveno de l' transport', ni senprokraste
Galopis! La unua falas, kaj
Mi nun unua estis ĝis la urbo,
En kiu la ruzeca Ibrahim
Pli bone konas stratojn.

SALADIN

Kaj l' falinto?

Nu, la falint'? — Al li renkonte rajdu!

MAMELUKO

Jes, mi ĝin faros! — Kaj se li vivadas,
Li havos de la sakoĵ la duonon. (*For*)

SALADIN

Do tiu ankaŭ bona, nobla homo! —
Nu, kiu havas tiajn mamelukoĵn? —
Ĉu mi ne rajtas do al mi imagi,
Ke ili sekvos al ekzemplo mia? —
Jes! Kaj mi tial ilin ne kutimu
Nun pri model' alia!

TRIA MAMELUKO

Ho, sultano!

SALADIN

Ĉu vi l' falinto estas?

MAMELUKO

Ne! — Mi nur

Raportu, ke deĉevaliĝas la
Karavanestro Mansor . . .

SALADIN

Lin venigu!

Tuj! — Jen li estas!

2a SCENO

MIRO MANSOR kaj SALADIN.

SALADIN

Nu, emiro, kiel

Do estis? Kaj bonvenon! — Mansor, Mansor!
Longtempe vi min atendigis!

MANSOR

Tiu

Letero pruvos, ke forigi devis
Rivolton Abulkessem en Thebais;

Ke ni pli frue ne foriri povis.
Mi kiel eble pleje rapidigis
La almarŝadon.

SALADIN

 Mi ja kredas vin! —
Kaj prenu, kara Mansor, prenu tuj —
Vi ja volonte faros ĝin! — kunprenu
Eskorton freŝan tuj. — Vi senprokraste
Pluiru, por plej grandan parton de
La mono porti al la patro.

MANSOR

Tuj

Kaj volontege!

SALADIN

 Kaj ne tro malfortan
Eskorton prenu. — Ĉirkaŭ Libanon
Ne estas plu sekure. — Ĉu vi ne
Jam aŭdis? — La Templanoj removiĝas.
Singarde estu! — Venu nun! — Kaj kie
La karavano staras? — Mi ĝin vidu
Kaj mem aranĝu! — *(al la mamelukoj:)*
 Mi al Sittah iros!

3a SCENO

*Ejo: La palmoj antaŭ la domo de Natan,
kie la TEMPLANO promenas.*

TEMPLANO

Ne, mi ne iru en la domon! — Li
Ja videbligis sin. — Ja ĉiam oni
Volonte kaj rapide min rimarkis! —
Mi eĉ ĝisvivos, ke li postulegos,
Ke mi evitu, tiom ofte veni

Ĝis antaŭ lia dom'. — Mi fakte estas
 Tre incitita! — Kio do min tiom
 Instigas kontraŭ li? — Li diris ja:
 „Ĝis nun mi ne rifuzas.“ — Saladin
 Promesis eĉ, alipensigi lin. —
 Nu? Ĉu pli firme do en mi sterniĝas
 Kristana sento, ol en li la juda? —
 Neniu konas sin! — Alie mi
 Ne estus enviema ja pro la
 Malgranda rabo, kiun ĉi-okaze
 Li faris de l' kristanoj. — Nu, ne estas
 Malgranda rabo: tia kreitaĵo!
 Ĉu kreitaĵ'? Kaj kies? Ĉu de l' sklavo,
 Flosinta blokon al la bord' de l' vivo
 Kaj sin pafinta for? — Ne! de l' artisto
 Pensinta en la blokon alĵetitan
 La dian formon, kiun li prezentis.
 De Recha vera patro ĉiam restos —
 Eĉ malgraŭ la kristan' ŝin generinta —
 Ja tamen tiu judo. — Se mi ŝin
 Imagas simple nur kristanidino;
 Se mi imagas ŝin sen ĉio, kion
 Al ŝi nur povis doni tia judo:
 De ŝi do kio al vi plaĉus, koro?
 Nenio! aŭ malmult'! Se ŝia rido
 Nur estus de muskol' funkcio bela,
 Se ĝia kaŭz' ne estus inda je
 La ĉarm' de ŝia sur la buŝ' rideto:
 Eĉ la ridet' ne plaĉus! Mi jam vidis
 Pli belan, dediĉatan al nenio,
 Al mok', sensenco, al flatuloj kaj
 Al adultuloj! Ĉu ĝi tie ankaŭ
 Min ĉarmis? Kaj min ankaŭ dezirigis,

En ĝia brilo vivon forflirtigi? —
Ho, ne! mi kredas: ne! — Ĉu mi koleras
Pri tiu, kiu ŝin multvalorigis?
Do kiel? kial? — Se de Saladin
La mokon mi meritas! Jam sufiĉas,
Ke tion Saladin ekkredi povis!
Ho, kiom mi malgranda al li ŝajnis
Kaj malŝatinda! — Ĉio pro knabino? —
Kurd! Kurd! Ne povas daŭri! — Haltu! — Kaj
Se Daja nur babilis ion, kio
Pruvebla estus malfacile? — Vidu!
Jen fine li en interparolado
Elvenas el la dom'! — Kun kiu? — Nu?
Li kun la frato? — Ha! Li tiukaze
Jam scias ĉion! Eble perfidita
Jam estas al la Patriarko! — Ha! —
Do kion mi, stultulo, nun estigis! —
Ke unu nur fajrero da pasio
De nia cerbo tiom forbruligas! —
Do tuj decidu, kion fari nun! —
Apude mi atendos ilin — ĉu
La frato eble tuj de li foriros.

4a SCENO

NATAN kaj la MONAĤEJANO.

NATAN

(alproksimiĝante)

Refoje, bona frato, koran dankon!

MONAĤEJANO

Al vi la samon!

NATAN

Mi? de vi? Pro kio?

Pro mia obstineco, al vi trudi
De vi ne bezonatan ion? — Jes,
Se via nur cedinta estus; se
Vi ne rifuzus, esti pli bonhava
Ol mi!

MONAĤEJANO

Sen tio tiu libro estas
Ja ne la mia, sed la posedaĵo
De la filino, heredaĵ' de l' patro. —
Sed ŝi ja havas vin! — Nur Dio donu,
Ke vi ĝismorte ne bedaŭros, ke
Vi tiom por ŝi faris.

NATAN

Ĉu mi povos?

Ho, ne! neniam! Estu tute certa!

MONAĤEJANO

Nu! la Templanoj kaj la Patriarkoj . . .

NATAN

Ne povas tiom da malbono fari
Al mi, ke ion mi bedaŭri povus;
Eĉ tion? certe ne! — Kaj ĉu vi estas
Tutcerta ankaŭ, ke Templano fakte
Incitis vian Patriarkon?

MONAĤEJANO

Ja

Nur povas esti tiel. — Ĵus antaŭe
Templan' kun li parolis, kaj la vortoj
De mi aŭditaĵ, tiel sonis.

NATAN

Sed

Nur unu estas en Jeruzalem.
 Mi tiun konas. Li amiko mia
 Eĉ estas: bona, nobla viro!

MONAĤEJANO

Prave!

La sama! — Sed ne ĉiam ja egalas
 En mondo, kio estas ni kaj kio
 Ni esti devus.

NATAN

Bedaŭrinde! — Kiu

Ajn estas, faru kion ajn li volos!
 Kun la libret' mi ĉiun kontraŭstaros
 Kaj rekte kun ĝi iros al sultano.

MONAĤEJANO

Prosperon bonan! Mi do vin nun lasos.

NATAN

Vi eĉ ne vidis ŝin! — Revenu baldaŭ
 Kaj ofte! — Se la Patriarko nur
 Ne jam hodiaŭ ion scios. — Tamen:
 Eĉ jam hodiaŭ diru kion ajn!

MONAĤEJANO

Ne mi! — Adiaŭ! (*Li foriras*)

NATAN

Ne forgesu, frato! —

Mi volus tuj, ĉi tie sub ĉielo,
 Sur la genuojn fali. Dio! — Kiel
 La nodo, kiu ofte min timigis,
 Nun mem disiĝas! — Ho, mi sentas min
 Libera, ĉar mi nun ja sur la tero
 Ne plu bezonas, ion kaŝi! ĉar

Mi nune povas paŝi antaŭ homoj
 Libere kiel antaŭ Vi, Vi, kiu
 Ne juĝas homon ja laŭ faroj liaj,
 Estantaj nur malofte liaj faroj.

5a SCENO

NATAN kaj la TEMPLANO, kiu proksimiĝas de flanko.

TEMPLANO

Atendu, Natan; min kunprenu!

NATAN

Kiu?

Vi, kavaliro? — Kie do vi estis,
 Ke mi ne trovis vin ĉe la sultano?

TEMPLANO

Ni nin maltrafis reciproke. — Ne
 Koleru min!

NATAN

Ne mi, sed Saladin.

TEMPLANO

Vi ĵus forestis ...

NATAN

Sed vi lin parolis?

Nu, des pli bone!

TEMPLANO

Li nin ambaŭ kune

Paroli volas.

NATAN

Des pli bone! Venu

Kun mi. — Mi volis ja al li nun iri. —

TEMPLANO

Permesu, ke mi vin demandu: kiu
Foriris ĵus?

NATAN

Ĉu vi lin eble konas?

TEMPLANO

Ĉu li ne estas la laika frato,
Uzata de la Patriarko por
Spioni?

NATAN

Eble. — Ĉe la Patriarko

Li estas ja.

TEMPLANO

La artifiko taŭgas:

Al friponeco antaŭsendi la
Naivon!

NATAN

Jes, la stultan — ne la pian.

TEMPLANO

Ne kredas Patriark' je pia.

NATAN

Mi

Pri tiu garantias! — Li ne helpos
Al Patriark', estigi la malbonon.

TEMPLANO

Almenaŭ tiel li kondutas. — Ĉu
Pri mi li ne parolis?

NATAN

Ĉu pri vi?

Pri vi ne nome! — Li apenaŭ scias
Ja vian nomon!

TEMPLANO

Jes, apenaŭ! — Certe.

NATAN

Sed tamen: pri Templano li rakontis . . .

TEMPLANO

Kaj kion?

NATAN

Nu, li ion diris, kio
Al vi ne adaptebla povas esti.

TEMPLANO

Nu, eble? — Lasu aŭdi!

NATAN

Ke min iu
Denuncis ĉe la Patriarko . . .

TEMPLANO

Vin

Denuncis? — Tio estas — li permesu! —
Mensogo! — Natan, min aŭskultu! — Mi
Ne estas homo, kiu malkonfesi
Kapablus. — Miajn farojn mi respondas!
Mi eĉ ne estas tiu, kiu nomas
Faritaj bone ĉiujn miajn agojn. —
Ĉu pri erar' mi hontu? — Ĉu mi ne
Intencon firman havas, pliboniĝi?
Ĉu mi ne scias, kion hom' per tio
Atingi povas? — Natan, min aŭskultu! —
Mi estas la Templano de la frato,
Kaj mi — laŭ ties diro — vin denuncis. —
Mi scias, kio min incitis, — kio
La sangon en la vejnoj ekboligis!
Ho mi! — Mi venis por min ŝeti tuta
En viajn brakojn! — Kiom vi akceptis
Min froste — malvarmete — (pli malbone
Ol froste estas malvarmete!); kiom

Singarde vi klopodis, min eviti;
 Kaj kiom vi ŝajnis, min respondi
 Per tiom da demandoj tre glitigaj;
 Pri tio mi eĉ nun ne pensu, se
 Mi volas resti kalma. — Min aŭskultu!
 En tiu stato koagula min
 Alpaŝis Daja kaj al mi eldiris
 Sekreton sian, ŝajne eksplikantan
 Konduton vian strangan . . .

NATAN

Kiel tio?

TEMPLANO

Aŭskultu min! — Mi jam al mi imagis,
 Ke vi ne volas al kristan' redoni
 Ĉi tion, kion vi de la kristanoj
 Forrabis. — Kaj mi tial ekintencis,
 Perforte simple vin devigi tiel.

NATAN

Perforte? simple? — simple? — ĉu do simple?

TEMPLANO

Ho, min aŭskultu! — Mi ne agis bone!
 Vi eble eĉ ne estas kulpa ja. —
 Ne scias Daja, kion ŝi babilas!
 Ŝi estas malamema — volas vin
 Impliki en aferon malbonegan. —
 Ja povas esti! — Mi ankoraŭ estas
 Ja senspertulo flamiĝema, kiu
 Jen troe faras kaj jen tro malmulte. —
 Eĉ tio povas esti! — Min pardonu! —

NATAN

Se tiel vi min kaptas . . .

TEMPLANO

Unuvorte:

Mi iris al la Patriarko! — sed
 Mi vin ne nomis! — Jen mensogo estas!
 Mi malspeciale nur al li rakontis
 La kozon ja pro opinio lia. —
 Eĉ tion mi ne devis fari: jes! —
 Ĉar: ĉu mi ne jam sciis, ke fripono
 La Patriarko estas? Ĉu mi ne
 Vin mem demandi povis? — Ĉu mi rajtis
 Elmeti la knabinon al danĝero,
 Ekperdi tian patron? — Nu, ne grave!
 De l' Patriark' la friponeco, kiu
 Simila ĉiam restas, revenigis
 Plej rektavoje min ja al mi mem. —
 Do min aŭskultu, Natan, elaŭskultu! —
 Eĉ se li sciis vian nomon: nu,
 Do kio plu? — Li la knabinon povas
 Nur preni, se ŝi estas via nur.
 Li ja nur povas ŝin el via domo
 Forporti en monahinejon. — Do:
 Al mi ŝin donu! — Donu ŝin, kaj li
 Alvenu! Ho! — Li certe ne sukcesos,
 Edzinon mian rabi! — Donu tuj! —
 Se ŝi filino via estas, aŭ
 Se ne! — Judino, kristanino aŭ
 Nenio! — Ja egale! — Mi nek nun,
 Nek iam ajn en mia tuta vivo
 Pri ĝi demandas. — Estu kiel ajn!

NATAN

Vi ŝajne kredas, ke mi devas kaŝi
 La veron?

TEMPLANO

Estu kiel ajn!

NATAN

Mi ja ne

Al vi — aŭ kiu rajtas, ĝin ekscii —
 Jam malkonfesis, ke ŝi kristanino
 Kaj nur prizorgatino mia estas. —
 Kaj kial mi al ŝi ĝin ne jam diris? —
 Pri tio mi bezonas senkulpiĝi
 Nur antaŭ ŝi!

TEMPLANO

Vi tion ne bezonas

Eĉ antaŭ ŝi. — Al ŝi do malenviu,
 Ke ŝi neniam vin rigardu per
 Okul' alia. — Ŝparu la malkovron! —
 Ĝis nun ja sole vi pri ŝi disponas!
 Al mi ŝin donu! Natan, mi vin petas.
 Nur mi ŝin duan fojon savi povas —
 Kaj mi ĝin volas!

NATAN

Ne — vi povis, povis!

Sed ne plu nun! Nun tro malfrue estas.

TEMPLANO

Malfrue? kial?

NATAN

Dank' al Patriarko . . .

TEMPLANO

La Patriarko? Dank'? Al li? pro kio?
 De ni ĉi tiu dankon eĉ meritus?
 Do kial? kial?

NATAN

Ĉar ni scias nun,
Kun kiu ŝi parenças; ĉar ni scias,
En kies manojn ni ŝin meti povos.

TEMPLANO

Lin danku, kiu dankos lin pro plio!

NATAN

El tiuj manoj vi postulu ŝin,
Kaj ne el miaj.

TEMPLANO

Kompatinda Reĉa!
Vi dronas en malŝancoj, kompatinda!
Feliĉo por alia orfo, estos
Por vi la malo! — Natan! — Kie estas
Parencoj tiuj?

NATAN

Kie?

TEMPLANO

Jes! — Kaj kiuj?

NATAN

Speciale unu fraton mi eltrovis,
Ĉe kiu vi aspiru.

TEMPLANO

Unu fraton?

Kaj kio estas tiu frat'? Soldato?
Aŭ pastro? — Min sciigu, kion mi
Esperi povas.

NATAN

Li, mi kredas, estas
Nek . . . nek — aŭ ambaŭ. — Mi lin ne jam konas
Tre bone.

TEMPLANO

Nu, kaj krome?

NATAN

Brava viro!

Ĉe kiu Recha fartos tute ne
Malbone.

TEMPLANO

Sed kristano! — Mi kelkfoje
Ne scias, Natan, kion pri vi pensi; —
Ne min koleru! Ĉu ŝi kristanino
Ne devos ludi inter gekristanoj?
Kaj ĉu ŝi ne fariĝos, kion ŝi
Sufiĉe longe ludis? Kaj ĉu ne la
Tritikon puran, kiun vi semadis,
Mortigos la herbaĉo? — Ĉu ĉi tio
Vin ne timigas. — Tamen ja vi diras —
Vi! — ke ĉe sia frato ne malbone
Ŝi fartos?

NATAN

Mi esperas! pensas! — Se
Ĉe li al ŝi eĉ tamen io mankos,
Ŝi ja ankoraŭ havos vin kaj min!

TEMPLANO

Sed kio povos al ŝi manki? Ĉu
La frato al la fratinetino ne
Sufiĉe donos da manĝaĵo kaj
Vestaĵo, ornamaĵo kaj frandaĵo?
Kaj kion krome la fratino bezonos?
Nu, ŝi cetere edzon ja bezonos!
Nu, nu: eĉ tian ja al ŝi havigos
La frato, kiam estos tempo. — Ho,
Plej belan li al ŝi havigos! La
Plej belan, plej kristanan! Natan, Natan!
Anĝelon tian vi ja formis, kaj
Aliaj baldaŭ tiom ĝin difektos!

NATAN

Ne kredu tion! Ĉiam ŝi meritos
Ja amon nian.

TEMPLANO

Estu ne tro certa.

Pri mia amo tion ĉi ne diru!
Ĉar ĝi de si neniom lasas preni,
Eĉ plejmalmulton ne . . . kaj eĉ ne nomon.
Halt'! — Ĉu ŝi eble jam suspektas, kio
Fariĝos?

NATAN

Eble! Kvankam mi ne scias,
De kie.

TEMPLANO

Kiel ajn! — Ŝi nepre devas,
En ambaŭ kazoj, kio ŝin minacas,
De mi unue scii. — Mia penso,
Ke mi ŝin ree vidu kaj parolu
Nur kiam mi ŝin nomi povos mia,
Forfalas. — Tuj . . .

NATAN

Do kien?

TEMPLANO

Tuj al ŝi!

Por vidi, ĉu ĉi tiu kor' knabina estas
Sufiĉe forta, por decidon solan
Je ŝi nur indan fari.

NATAN

Kian?

TEMPLANO

Tiun:

Ne plu demandi sian fraton kaj
Eĉ vin —

NATAN

Kaj?

TEMPLANO

Kaj min sekvi! eĉ se ŝi

Per tio devus esti la edzino

De islamano.

NATAN

Restu! Vi ŝin jam

Ne trafos. Ŝi ĉe Sittah estas nun.

TEMPLANO

De kiam? kial?

NATAN

Kaj se vi ĉe ili

La fraton volas trovi: tuj kunvenu.

TEMPLANO

La fraton? Ĉu de Sittah aŭ de Recha?

NATAN

De ambaŭ eble! Mi vin petas: venu!

*(Li forkondukas lin)***6a SCENO***Ejo: en la haremo de Sittah.*

SITTAH kaj RECHA en interparolado.

SITTAH

Mi tiom pri vi ĝojas, dolĉulino! —

Ne estu tiom strange, time, honte! —

Pli vigle! paroleme! familiare!

RECHA

Prinzino . . .!

SITTAH

Ne prinzino! Simple nomu

Min Sittah — amikino — aŭ fratino.

Aŭ nomu min patrinjo! — Mi ja povus

Eĉ esti tio. — Tiom juna, saĝa

Kaj pia! Kiom vi ja scias! — Kiom

Vi legis jam!

RECHA

Mi legis? mi? — Ho, Sittah,

Vi mokas ja pri fratineto via!

Apenaŭ mi scipovas legi!

SITTAH

Ne?

RECHA

La skribon de la patro — iom; aŭ

Ĉu vi pri libroj pensas?

SITTAH

Jes, pri libroj.

RECHA

Nu, librojn mi nur malfacile legas! —

SITTAH

Ĉu vere?

RECHA

Vere, jes! — La patro ŝatas

Malmulte la saĝecon de la libroj,

Ĉar per senvivaj signoj ĝi sin premas

En nian cerbon.

SITTAH

Ĉu do vere? — Li

Ne estas ja malprava. — Kaj kelkio

De vi sciata . . . ?

RECHA

Mi ĝin lernis nur
El lia buŝo; kaj mi de l' plejmulto
Ankoraŭ scias kiel, kie, kial.

SITTAH

Nu, tiel ĉio ja plej bone restas;
Samtempe tiel lernas la animo.

RECHA

Eĉ vi neniom aŭ malmulte legis! —

SITTAH

Do kial? — Mi ne fieras pro la malo. —
Sed kial? — Via kaŭzo? — Nur parolu!

RECHA

Vi estas tiel rekta, senafekta,
Nur al vi mem simila . . .

SITTAH

Nu?

RECHA

Kaj tion

Al ni malofte nur la libroj lasas,
Laŭ mia patro.

SITTAH

Kia viro estas

Ja patro via!

RECHA

Jes?

SITTAH

Li tutproksime

La celon ĉiam trafas.

RECHA

Ĉu ne vere? —

Kaj tiun patron . . .

SITTAH

Kio?

RECHA

Tiun patron . . .

SITTAH

Vi ploras? Dio!

RECHA

Tiun patron — ho!

Mi diru! — Mia kor' eksplodi volas!

(Pro la forto de la larmoj ŝi falpuŝiĝas al ŝiaj piedoj)

SITTAH

Do kio estas? Recha!

RECHA

Tiun patron —

Mi perdi devas!

SITTAH

Perdi? vi? la patron?

Pro kio? — Certe ne! — Leviĝu! — Kalme!

RECHA

Ne vane vi vin faris amikino

Kaj patrineto mia, Sittah! — Ho!

SITTAH

Mi tio estas ja! — Leviĝu! aŭ

Mi helpon vokos!

RECHA

(refortiĝinte kaj leviĝante)

Ho, pardonu min!

Doloro mia igis min forgesi,

Kun kiu mi parolis. Antaŭ Sittah

Valoras nek plorad' nek malespero.

Prudento kalma ĉiel nur efikas

Sur ŝin. Nur tiu antaŭ ŝi ekvenkas.

SITTAH

Do kio?

RECHA

La fratino, amikino,
Ĝin ne permesos. Ne permesos, ke
Alian patron oni al mi trudos.

SITTAH

Alian patron? Trudi? kaj al vi?
Do kiu povos? Kiu tion volos?

RECHA

Malbona, bona Daja mia povos
Ĝin voli — kaj ĝin volos povi —. Jes,
Malbonan, bonan Daja'n vi ne konas!
Nu, Dio ŝin pardonu! — rekompencu!
Ŝi al mi faris tiom da malbono
Kaj bon'.

SITTAH

Al vi malbonon? Sekve ŝi
Malmulte nur da bono havas.

RECHA

Eĉ multe!

Ne!

SITTAH

Kiu estas?

RECHA

Kristanino,
Vartinta min de mia infaneco;
Ho, tiom min vartinta. — Vi ne kredas? —
Ŝi tute anstataŭis la patrinon! —
Ŝin Dio rekompencu! — Sed ŝi ankaŭ
Timigis kaj turmentis min!

SITTAH

Kaj kial?

Per kio?

RECHA

Ho, la kompatinda estas
 Ja kristanino. — Do pro amo ŝi
 Turmenti devas. — Estas unu el la
 Revemulinoj, kiuj kredas scii
 La solan vojon al Kardio.

SITTAH

(*komprenante*)

Ha!

RECHA

Ŝi kredas devi sur la vojon gvidi
 Personon ĉiun, kiu ĝin maltrafas. —
 Alie ili ja ne povas; ĉar
 Se tiu vojo nur la ĝusta estas,
 Amikojn siajn ili ja ne povas
 Trankvile lasi sur alia vojo,
 Nur kondukanta al pere' eterna. —
 Ja devus esti eble, saman homon
 Samtempe ami, kaj malami ankaŭ. —
 Sed ne pro tio mi nun fine devas
 Pri ŝi plendegi. Ŝian preĝon, ĝemon,
 Averton kaj minacon mi volonte
 Eĉ pli longtempe estus elteninta!
 Ŝi ĉiam al mi donis ja ideojn
 Utilajn, bonajn. Nu, kaj kiu ne
 Fieras, sin sentante tiom multe
 Ŝatata, ke alia — kiu ajn —
 Eĉ ne elporti povas la ideon,
 Ke iam li eterne nin malhavos?

SITTAH

Tre prave!

RECHA

Sed — tro multe fine estas!

Al tio mi ne kontraŭmeti povas
Paciencon, nek prudenton.

SITTAH

Do al kio?

RECHA

Al tio, kion ŝi ĵus nun malkaŝis.

SITTAH

Ĵus nun? malkaŝis?

RECHA

Jes! ĵus nun malkaŝis.

Dumvoje tien ĉi ni preterpaŝis
Kristanan templon kadukeman. — Ŝi
Subite haltis, kun si mem luktante,
Ploreme al ĉiel' jen rigardadis
Kaj jen al mi. — Kaj fine diris: „Venu!
Tra tiu templo rekte ni plupaŝu!“
Ŝi iras, mi ŝin sekvas, kaj timeme
Mi vidas la ruinojn kadukemajn. —
Ŝi ree haltas; kaj mi vidas min
Kun ŝi ĉe la ŝtuparo de la putra
Altaro. Kiel mi min sentas, kiam
Kun plor' varmega, manoj preĝmetitaj
Al miaj piedoj ŝi falegas...

SITTAH

(kompateme)

Recha!

RECHA

Kaj min petegis pro la Di-patrino,
Aŭdinta kelkan preĝon jam, farinta
Miraklon kelkan — min petegis, ke

Mi min kompatu! — kaj pardonu ŝin
Almenaŭ, ĉar ŝi nun al mi malkaŝos
La al mi rajton de la kristanismo.

SITTAH

(Ho, kompatinda! — mi supozis ĝin!)

RECHA

Ŝi diris, ke mi estas kristanido,
Baptita kaj de Natan ne filino. —
Ho Dio! Li ne estas mia patro!
Ho Sittah! — Ree antaŭ viaj piedoj...

SITTAH

Leviĝu, Recha! — Mia frato venas!

7a SCENO

SALADIN kaj LA ANTAŬAJ.

SALADIN

Nu, kio estas, Sittah?

SITTAH

Ho, ŝi svenis!

SALADIN

Ŝi kiu estas?

SITTAH

Nu,...

SALADIN

Filin' de Natan?

Ŝi kion havas?

SITTAH

Recha! malsveniĝu!

RECHA

*(sin trenante sur la genuoj al la piedoj de Saladin,
kun mallevita kapo)*

Mi ne leviĝos; ne pli frue! — Mi
Vizaĝon lian ne pli frue vidu!
La brilon de justec' eterna kaj
De bono en okulo lia, nek
Sur lia frunt' admiru...

SALADIN

Do leviĝu!

RECHA

Nur kiam li promesis...

SALADIN

Mi promesas...

Eĉ estu kio ajn!

RECHA

Ne pli, nek malpli,

Ol al mi lasi mian patron kaj...
Kaj min al li! — Mi ne jam scias, kiu
Aspiri povas, esti mia patro.
Mi eĉ ne volas scii. Ĉu la sango
La patron pruvas? Nur la sang'?

SALADIN

(levas sin)

Leviĝu! —

Kaj kiu estis tiom kruelega,
Por tion bati en kapeton vian?
Ĉu tio estas certa kaj pruvita?

RECHA

Opinieble! Daja ĝin ja scias
De mia nutristino.

SALADIN

Nutristino?

RECHA

Mortante tiu ĝin al ŝi konfidis.

SALADIN

Mortante? — Ne fablante jam? — Kaj eĉ:
 Se estus prave! — Jes! La sango sole
 Ne faras jam la patron! — Ĝi de besto
 Apenaŭ faras ja la patron! — Ĝi
 Plej eble donas la unuan rajton,
 Akiri tiun nomon! — Ne timiĝu! —
 Aŭskultu! — Se du patroj reciproke
 Pro vi disputas: lasu ilin ambaŭ
 Kaj prenu trian! — Mi la patro estu!

SITTAH

Jes, faru tion!

SALADIN

Bona patro mi,
 Tre bona patro volas esti. — Halt!
 Mi havas eĉ pli bonan penson: kial
 Do vi bezonas patrojn? Ili mortos!
 Elektu ĝustatempe iun, kiu
 Intencon havas, vete kun vi vivi!
 Ĉu vi ne iun konas?

SITTAH

Ŝi ruĝiĝas!

SALADIN

Jes, ĝuste tion mi ja volis kaŭzi!
 Malbelulinojn la ruĝiĝ' beligas,
 Kaj ĝi ne plibeligus belulinojn?
 Mi tien ĉi venigas vian patron
 Kaj plian — plian viron ja krom li.
 Ĉu vi divenas? — tien ĉi. Vi ja
 Permesos, Sittah?

SITTAH

Frato!

SALADIN

Antaŭ li

Ruĝiĝu bone, kara knabineto!

RECHA

Ruĝiĝi? antaŭ li?

SALADIN

Ho hipokrita!

Nu, do paliĝu! — Faru laŭ la volo

Kaj povo! —

(Sklavino envenas kaj proksimiĝas al Sittah)

Ĉu do ili jam alvenis?

*

SITTAH

Enlasu ilin! — Estas ili, frato!

LASTA SCENO

NATAN kaj la TEMPLANO al LA ANTAŬAJ.

SALADIN

Amikoj karaj miaj. — Natan, vin

Mi antaŭ ĉio ja sciigi devas,

Ke vi nun povos, kiam ajn vi volos,

Repreni vian monon...

NATAN

Saladin!...

SALADIN

Nun vi pri mi disponu...

NATAN

Saladin!...

SALADIN

La karavano venis. Mi nun estas
 Pli riĉa ol de longa temp' mi estis. —
 Min diru, kiom vi bezonas por
 Komenci ion grandan. — Ankaŭ vi,
 Vi komercistoj ja ne povas havi
 Tro multan monon.

NATAN

Kial do unue
 Pri tiu malgravaĵo? — Jen mi vidas
 En plor' okulon, kiun mi pli urĝe
 Sekigi volas. (*Iras al Recha*) Ĉu vi do ploradis?
 Ĉu vi ankoraŭ estas mia Recha?

RECHA

Ho, patro!

NATAN

Ni komprenas nin! Sufiĉas! —
 Kvieta, gaja estu! — Se la koron
 Ankoraŭ vi posedas...! — Se minacas
 Al koro via ne alia perdo...!
 La patro restos!

RECHA

Krome ne alia!

TEMPLANO

Ĉu ne alia? Nu, mi do eraris!
 Neniam oni kredis, nek esperis
 Posedi tion, kies perdon oni
 Ne timis. — Bone! Bone! — Tio, Natan,
 Ja ĉion ŝanĝas! — Saladin, ni venis,
 Ĉar vi ordonis. — Mi vin ja instigis,
 Sed mi vin petas: nun ne plu klopodu!

SALADIN

Denove jam sovaĝe? Ĉu do ĉiu
 Divenu vin? kaj faru koncesiojn
 Al vi?

TEMPLANO

Sultan', vi aŭdas, vidas mem ja!

SALADIN

Nu, jes! Malbone ja, ke vi ne estis.
 Pli certa pri l' afer'!

TEMPLANO

Sed nun mi estas!

SALADIN

Se tiom vi postulas pro bonfaro,
 Vi ĝin nuligas! — Kion vi elsavis,
 Ne estas tial via posedaĵo!
 Alie eĉ rabisto, kiun puŝas
 En fajron avareco, same estus
 Heroo! (*Li iras al Recha por ŝin konduki al la Templano*)
 Venu, Recha! Lin ne juĝu

Eĉ tro severe; vidu: se li estus
 Alia, malpli varma, malpli fiera;
 Li ne savinto via estus. Nu,
 Kalkulu unu por alia. — Venu! —
 Ekagu vi: al li konfesu vian amon!
 Kaj se li malakceptas vin, se li
 Forgesos iam, ke por li vi faris
 Pli multe ja, ol li por vi... — Nu, kion
 Por vi li faris? Li sin lasis iom
 Fumumi! Jen malmulte! — Tiam li
 Neniom ja de mia Assad havas!
 Li havas la vizaĝon, ne la koron.
 Do venu, Recha...

SITTAH

Iru, Recha, iru!

Por via dankemeco estas ja
Malmulte aŭ neniom!

NATAN

Haltu! Haltu!

SALADIN

Eĉ vi?

NATAN

Kromulo tie ĉi parolu...

SALADIN

Ja certe! — Kiu malpermesas tion?
Ja ankaŭ la zorginto voĉon havas.
Eĉ la unuan, se vi volas. — Vidu:
Mi scias la aferon tutan.

NATAN

Sed ne tute!

Mi ne pri mi parolas. — Sed mi petas:
Antaŭe aŭdu, Saladin, alian,
Eĉ tutalian viron.

SALADIN

Kiu estas?

NATAN

La frato.

SALADIN

Ĉu de Recha?

NATAN

Jes.

RECHA

Ĉu frato?

Mi fraton havas?

TEMPLANO

(eliĝante el muta meditado)

Kie? kie estas

La frato? Ne jam tie ĉi? Mi devis
Lin vidi tie ĉi!

NATAN

Paciencon havu!

TEMPLANO

(tre cinisme)

Li patron por ŝi fablis: ĉu li ne
Por ŝi eĉ fraton trovos?

SALADIN

Tio vere

Malinda estas! — Ho, kristano! Tia
Suspekt' ne estus eliĝinta trans
La lipojn ja de Assad!

NATAN

Lin pardonu!

Samkiel mi. — Ĉar kiu scias, kion
En lia lok' kaj aĝ' ni ambaŭ pensus!

(Amike proksimiĝas al li)

Nature, ja! — Suspekt' malfidon sekvas! —
Se tuj vi vian veran nomon estus
Dirinta . . .

TEMPLANO

Kio?

NATAN

Vi ne estas Staŭffen!

TEMPLANO

Do: kiu?

NATAN

Vi ne estas Kurd von Staŭffen!

TEMPLANO

Do: kiu?

NATAN

Leŭ von Filnek!

TEMPLANO

Kio?

NATAN

Nu,

Vi miras?

TEMPLANO

Jes! Kaj kiu tion diras?

NATAN

Mi, kiu povus plion diri eĉ. —
Sed mi ne volas.

TEMPLANO

Ne?

NATAN

Ĉar eble vi

Ja eĉ pri tiu nomo rajton havas.

TEMPLANO

Jen, prave! — (Tio estas vort' de Dio

NATAN

Ĉar Staŭffen nomis sin patrino via.
Kaj ŝia frato, via onklo, kiu
Edukis vin, ĉar vin en Germanujo
Gepatroj viaj lasis, kiam ili
Ĉi tien venis, kiam la tiea
Ĉielo kruda ilin forkurigis:
Li estis Kurd von Staŭffen, kaj li eble
Adoptis vin! — Ĉu antaŭ longe vi
Kun li ĉi tien venis? Ĉu li vivas?

TEMPLANO

Mi kion diru? — Jes! Vi estas prava!
Li mortis jam! — Mi venis kun la lastaj
Kromtrupoj de l' ordeno nur. — Sed, sed —
Ĉu ĉio ĉi koncernas tiun fraton
De Recha?

NATAN

Via patro . . .

TEMPLANO

Ĉu eĉ tiun

Vi konis?

NATAN

Li de mi amiko estis.

TEMPLANO

Amiko? Estas eble?

NATAN

Tiu nomis

Sin Wolf von Filnek; sed li ne Germano . . .

TEMPLANO

Vi ankaŭ tion scias?

NATAN

Li nur estis

De Germanino edzo; Germanujon
Patrinon vian sekvis nur . . .

TEMPLANO

Sufiĉe!

Mi vin petegas! — Sed la frat' de Recha?

NATAN

Vi estas!

TEMPLANO

Mi — la frato?

RECHA

Mia frato?

SITTAH

Gefratoj!

SALADIN

Ĉu gefratoj?

RECHA

(volas proksimiĝi al li)

Frato mia!

TEMPLANO

(reiras)

La frato, mi?

RECHA

(haltas kaj turnas sin al Natan)

Ne eble! Lia koro

Pri ĝi neniom scias. — Ni do estas
Trompisto?

SALADIN

(al la Templano)

Ĉu trompisto? Kion vi

Do pensi povas? Mem trompisto! — Ĉio
Sur vi mensogo estas: voĉo, paŝo,
Vizaĝo! Ne ekkoni tian fratineton!

TEMPLANO

*(humile proksimiĝante al li)*Ho, ne erarkomprenu mian miron!
Kaj en moment', en kia vi ne vidis,
Verŝajne, vian Assad, ne malkonu
Nin ambaŭ. *(Kurante al Natan)*

Ho, vi prenis kaj vi donis

Al mi kaj per plenmanoj! — Ne, vi donis
Pli multe ol vi prenis — pli, pli multe!

(Ĉirkaŭprenante Recha'n)

Fratino! ho, fratino mia!

NATAN

Blanda

Von Filnek!

TEMPLANO

Blanda? Blanda? — Kaj ne Recha?

Ne via Recha plu? — Ho, vi forpelas

Ŝin? — Ŝin pro mi forpelas? kaj redonas

Al ŝi kristanan nomon ŝian? Natan!

Pro kio ŝi suferu tiom? ŝi!

NATAN

Infanoj miaj! — ho, infanoj miaj!

La frato de filino mia ankaŭ

Infano mia estas!

*(Dum kiam li cedas al ilia ĉirkaŭpreno, Saladin kun
malkvieta miro alpaŝas sian fratinnon.)*

SALADIN

Sittah, vidu!

SITTAH

Mi estas kortuŝita...

SALADIN

Mi tremetas

Ja preskaŭ pro pli granda kortuŝeco!

Preparu vin plej bone kiel eble.

SITTAH

Nu?

SALADIN

Natan, unu vorton! Diru!

*(Natan iras al li; Sittah paŝas al la gefratoj por montri sian kunsenton, kaj Natan kaj Saladin parolas mallaŭte)*Aŭskultu, Natan! Ĉu vi ne antaŭe
Eldiris —?

NATAN

Kion?

SALADIN

Ke la patro ne

El Germanujo estis, ne Germano?

Do kio estis li? kaj — kaj de kie?

NATAN

Li tion eĉ al mi ne diri volis.

De li pri tio mi neniom scias.

SALADIN

Li Frank' ne estis? ne Okcidentano?

NATAN

Ke li ne tia estas, li konfesis. —

Prefere li parolis Perse...

SALADIN

Perse?

Sufiĉas! — Estas li! Li estas!

NATAN

Kiu?

SALADIN

Nu, mia frato; — Assad! — Tute certe!

Tutcerte!

NATAN

Se vi mem ja ĝin rimarkas:

En tiu libro trovu la certigon!

(Al li donante la brevieron)

SALADIN

(avide malfermante ĝin)

Ha, lia skribo! Ĝin mi ja rekonas!

NATAN

Neniom ilin scias jam! Ankoraŭ
Nur vi decidu, kion ili sciuj!

SALADIN

(foliante en ĝi)

Ĉu mi de l' frato idojn ne agnosku?

Ne miajn nevojn — ne infanojn miajn?

Mi? ne agnoski? — Ilin al vi lasi? *(Ree laŭte)*

Jen ili! Sittah, estas ili! Ili!

De mia . . . via frato la infanoj!

(Kuras en ilian ĉirkaŭprenon)

SITTAH

(sekvas lin)

Ĉu vere? — Ĉu alie povas esti?

SALADIN

(al la Templano)

Sed nun, spitulo, vi min ami devas!

(Al Recha) Nun mi ja estas, kia mi min ofris!

Vi volu aŭ ne volu!

SITTAH

Mi ja ankaŭ!

SALADIN

(reen al la Templano)

Ho, filo! Assad! fil' de mia Assad!

TEMPLANO

De via sango mi! — Do tiuj revoj,

Lulintaj mian infanecon, estis . . .

Eĉ pli ol revoj! *(Li falas antaŭ liajn piedojn)*

SALADIN


(lin relevante)

Tia malbonulo!

Li sciis jam pri tio, kaj li povis

Min igi murdi lin! Ho, malbonulo!

*(Dum muta ripetiĝo de ĉiuflanka ĉirkaŭpreno
falas la kurteno)*



Esp

134639

Książnica Podlaska
im. Łukasza Górnickiego w Białymstoku



000735105